

IL POPOLO CINIO

中國新聞

3 1987





Infano en tigrokapa ĉapo kaj tigrokapaj ŝuoj

Foto de **PANG SOŬSIN**

POPOLA TIGRORNAMO

Fotoj de LI ŜJA

En la kamparo de Ŝandong-provinco tigro estas rigardata kiel favora aŭspicio. Tial la patrinoj plejparte faras por siaj infanoj ĉapojn, ŝuojn kaj ludilojn kun tigra kapo. La infanoj havas ankaŭ similan kapkusenon. En iuj lokoj konserviĝas ankoraŭ malnova moro, ke ne longe post kiam infano estas naskita, ĝia onklo de la patrino flanko portas al ĝi litaĵon kaj



Infano ludanta ŝtofan tigron


mangaĵon ĉefe kun ŝtofa tigro, kiu simbolas vigecon, bravecon kaj fortecon de la juna generacio.

Tia tigro estas farita el ŝtofoj flava kaj ruĝa kaj remburita per kotono aŭ segaĵo. Ĝiaj haŭtstrioj kaj okuloj estas broditaj, farbitaj aŭ eltonditaj el kolora ŝtofo. La tigro verŝimila kaj eleganta aspektas brava kaj naiva.

Onklo alportanta litaĵon kaj mangaĵon kun ŝtofa tigro



Stando en foiro





La infano rigardas kiel la avino faras ŝtofan tigron.

*Infano dormanta kun kapo apogita
sur tigrokapa kapkuseno*



Enhavo

| | |
|---|----------------|
| Idealo de virinoj kaj idealaj virinoj | 2 |
| Ŝen Ŝinĉjŭan kaj ŝia butikoj de kokoj | 5 |
| Petrol-kemia urbo sur ruino de antikva ĉefurbo | 8 |
| Bravaj ekspedicioj sur Jangzi-rivero | 13 |
| VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (3): Mirindaĵoj ĉe la fonto de Jangzi-rivero | 65 |
| JUBILEA JARO DE ESPERANTO: | |
| Planoj kaj agadoj por la Centjara Jubileo de Esperanto | 10 |
| Invito al Jugoslavio | 12 |
| Rememoro pri Ŭang Lujan kaj V. Eroŝenko | 21 |
| SUR NIA LIBROBRETO: Unu plia solida briko | 23 |
| POR KOMENCANTOJ | 24 |
| ESP-NOVAĴOJ | 26 |
| Ŭang Janping kaj ŝiaj "ruĝaj ŝuoj" | 28 |
| POEMOJ: Respondo de knabino; La amikoj | 37 |
| ĈINA LITERATURO: | |
| "Kroniko de la Historio" kaj ĝia aŭtoro Sima Ĉjan | 38 |
| Du fragmentoj el "Kroniko de la Historio" | 41 |
| Gravuraĵoj sur haro | 42 |
| ĈINAJ ARTOJ: Pentritaj vizaĝoj de aktoroj en la pekina opero | 30 |
| Vojbarado — originala bonveno al gastoj | 46 |
| En buji-a vilaĝo (Kolora bildoserio) | 49 |
| ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Poŝtmarkoj de Ĉinio | 53 |
| Sovetia Danc-ensemblo en Pekino (Nigra-blanka bildoserio) | 56 |
| Multesukcesa Unesko | 58 |
| AMUZO | 60 |
| KURANTAJ AFEROJ | 62 |
| INTER NI: Nia espero | 45 |
| KORESPONDI DEZIRAS | 25, 48, 61 |
| SUR LA KOVRILO: Ĝenro de li-oj | de ĜIN ĜJEGONG |
| TRA NIA LENSŬO: Popola tigrornamo (Kolora bildoserio) | Foto de LI ŜJA |

| | | | | | | | | | | | |
|-----------------------------|-----|--------|-----------|------|---------|--|------|--------|--------|-------|-------|
| JARABONTARIFO | | Britio | £ | 8.00 | Japanio | Yen | 3000 | Svisio | SF | 25.00 | |
| Aŭstralio | \$A | 14.00 | Finnlando | Fmk | 64.00 | Jugoslavio | Din. | 500 | Usono | US\$ | 12.00 |
| Aŭstrio | Sch | 200 | Francio | FF | 90.00 | Nederlando | Gld. | 34.00 | Kanado | Can\$ | 13.00 |
| Belgio | BF | 550 | Hispanio | Ptas | 1200 | Nov-Zelando | NZ\$ | 20.00 | | | |
| FR Germanio | DM | 30.00 | Italio | Lit | 18000 | Portugaliao | Esc | 1100 | | | |
| Por aliaj landoj en Eŭropo: | | £ | 8.00 | US\$ | 10.00 | Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50 | | | | | |

IDEALO DE VIRINOJ KAJ IDEALAJ VIRINOJ

La ĉinaj virinoj de la nuna tempo havas siajn idealon kaj aspiron, kiuj tamen estas katenitaj de malsamaj sociaj postuloj.

Infanoj esperas, ke la patrinoj zorgos pri ilikiel vartistinoj, instruos ilin kiel instruistoj kaj komprenos ilin kiel amikoj.

Edzoj postulas, ke la edzinoj subtenu ilin en ilia kariero, zorgu pri ili en la vivo kaj havu la saman senton kun ili.

Profesioj postulas, ke la oficistinoj kaj laboristinoj lernu de sia plej inteligenta kaj plej talenta koleginino.

...

Kion do la virinoj devas fari tiukaze? Por tio, la redakcio de la gazeto «Women of China» faris ĉiuflankan enketadon ne nur al virinoj, sed ankaŭ al viroj kaj infanoj. Jen ni aperigas la respondojn pri kelkaj demandoj faritaj en la enketado.

— La Red.

KIA VIRINO VI VOLAS ESTI?

— Mi esperas havi pli da sendependeco kaj memstareco kaj plene montri la socian valoron propran al virino de la nova epoko.

— Mi adoras Lin Ĉjaŭĝi (forpasinta fama ginekologino — la red.). Ŝi oferis ĉion sian al la medicino. Dum sia vivo ŝi akuŝigis sennombrajn virinojn, sed ŝi mem ne havis eĉ unu infanon. Mi estimas virinon, kiu metas sian karieron super ĉion.

— Pro socia kaŭzo mi tre esperas havi fidindan edzon. Iun tagon mia fianĉo diris al mi: “Vi virinoj ne devas viziti lernejon, kio perdigas vian junecon. Simple mi lernu anstataŭ vi.” Kvankam la diro pikis min, tamen ĝi pli malpli trankviligis min.

— La tempo forportis ne nur mian junecon, sed ankaŭ miajn belajn idealojn. Laŭ mi, miaj antaŭaj idealoj ĉiuj ne konformis al la realo. Nun mi prizorgas kaj la infanojn kaj la edzon. Kelkiam mi sentas, ke mi estas tro maljusta al mi mem, tamen mi volantas tion fari.

— Ni virinoj ne estas homoj el “unuopaj

ĉeloj”. Nia ĝojo enkorpiĝas ne nur en strebado por la kariero sed ankaŭ en oferado al la vivo. La kariero sen vivo ne estas perfekta vojo de la vivo. Ni neniel iros tiun vojon.

KIO ĈAGRENAS VIN EN VĪA STREBADO AL LA IDEALOJ?

— Iuj homoj en la socio ne komprenas nin, kiuj pene klopodas en la kariero; tio plej dolore ĉagrenas nin. En iliaj okuloj, ni esplor-studentinoj estas nur pedantoj kaj strangulinoj, kiuj ne konas la vivon nek havas senton. Kontraŭ sukceso en nia kariero ni iam eĉ devas multe pagi en la formo de perdo de la vivo.

— Virinoj ofte ĉagreniĝas pri sia malsupereco en intelekto, talento kaj volo. Tamen ni intelektaj virinoj havas novan ĉagrenon — supercon. Iu studentino malĝoje diris al mi: “Efektive tio estas tro alta takso por ni, ke oni opinias nin malhumilaj kaj fieraj. Kaj mi sentas, ke ni tro humiliĝas. Ni prenu nian amaĵon kiel ekzemplon. Studentoj povas trovi amatinon post diplomiĝo, dum studentinoj devas trovi amaton antaŭ sia diplomiĝo. Kiu kuraĝas fieri tiurilate? Iuj

studentinoj okupas la antaŭajn lokojn en lernado kaj havas grandan talenton, sed ili ne kuraĝas montri sin entuziasmaj, timante, ke oni rigardos ilin 'frivolaj'. Ili ankaŭ maltrankviliĝas pro sia elstareco en lernado. En la okuloj de iuj homoj la devokonscio pri kariero de virinoj ĉiam estas nedisigebla de fiereco, malhumileco kaj senscio pri la vivo. Kiu ne timas tion? Ne taŭgas superco nek malsuperco. La socio estas tro maljusta al ni virinoj.”

— Mi amas mian karieron kaj tre esperas, ke mia edzo metos min en la unuan lokon en la familio, sed li diris, ke li devas esti sur la unua loko, nia infano sur la dua kaj mi sur la tria.

— Mi opinias, ke nun la virinoj estas malpli feliĉaj ol antaŭe. En la pasinteco virinoj servis nur al siaj edzo kaj infanoj en la hejmo, sed nun ili devas fari profesion laboron kaj ankaŭ dommastrumadon. De mateno ĝis vespero ili estas terure okupitaj. Estas pli malfeliĉe, se la edzo estas senprudenta.

KIA VIRINO ESTAS PERFEKTA KAJ KIA ESTAS PERFEKTA VIVO POR VIRINOJ?

— Mi opinias, ke perfekta virino devas esti unue devoscia por la socio kaj kuraĝe okupi sin pri kariero, monopoligita de viroj tradicie; due esti elstara laborantino sur sia posteno kaj bona edzino kaj modela patrino en la hejmo; kaj trie esti sente sendependa, kuraĝi modli kaj kultu sin.

— Mi opinias, ke oni ne devas tro severigi la kondiĉojn pri la perfekta vivo de virinoj. En la reala vivo la kariero kaj vivo ne povas ne esti kontraŭdiraj. Iuj preferas dediĉi sin al la kariero, aliaj al la edzo kaj infanoj. La vivo de ambaŭ formoj povas esti rigardata kiel perfekta.

— Ne ekzistas perfekta vivo por la virinoj. Ili estas kiel meza argumento de polinomo, antaŭe estas edzo kiel monto, malantaŭe estas infanoj kiel remorkoj. Por sukcesi en kariero sola solvo estas dumviva fraŭlineco.

— Virinoj estas katenitaj de pluroblaj roloj kaj juĝataj de pluroblaj normoj. Kiel malfacile estas por virinoj gajni perfektan vivon.

KIA VI DEVAS ESTI LAŬ LA DEZIRO DE VIA EDZ(IN)O AŬ AMAT(IN)O?

— Mia edzo esperas, ke mi unue adoros lin,



Traktoristino Li Juĝen kaj ŝia solĝilo

due komprenos lin kaj trie multe zorgos pri li en la vivo.

— Mi ŝatas kaj serĉas talentulinon. Modernaj viroj devas havi la kuraĝon montri sian amon al talentulino. Ili estas elito de la socio kaj enkorpiĝos la spiriton humanan, sciencan, demokratian kaj progreseman. Iuj homoj rigardas ilin strangaj, sed mi laŭdas ilin pro ilia memfido.

Mi malŝatas talentulinon, ĉar tia sinjorino subkonscie ordonas al sia edzo en la hejmo. Mi ne ŝatas ke mia edzino ordonas al mi, kion mi faru kaj kion ne. Certe min ŝokos, se mia edzino traktas min kiel sian subulon.

— Ni viroj ne ŝatas, ke la estonta edzino havos edukitecon pli altan ol tiu de la edzo. Mi neniel povus akcepti la fakton, ke mia edzino

superus min en la edukiteco. En iu semajnfina vespero mi konatiĝis kun gracia kaj senĝena junulino. Ŝi bone impresis min. Sed, informiĝinte, ke ŝi estas elstara studentino, mi senhezite foriris de ŝi.

KION LA INFANOJ ESPERAS DE SIA PATRINO?

— Mi havas filon en mezlernejo. Li estas saĝa kaj tre aminda. Sed li iam ĉagrenas min. Antaŭe li ofte plendis, ke mi zorgas pri li malpli bone ol la patrino de lia kunlernanto pri sia filo, kelkiam li plendis ankaŭ, ke mi neniom helpis al li en lernado. Antaŭ nelonge li diris al mi, ke li jam plenkreskis, ke mi pli multe respektu kaj komprenu lin anstataŭ kritiki lin senĉese. Unuvorte, li esperas, ke mi estos bona vartistino, bona instruisto kaj bona amikino. Vere estas tro malfacile esti patrino.

— Mi malŝatas bagateleman patrinon, kiu triviale pasigas la vivon tamen estas troprofitema super ajna bagatelo. Kelkiam ŝi grumblas dum horoj pro io bagatela.

— Mi havas patrinon, sed mi sentas, ke mi ne havas ŝin. Ŝi amas min, sed tio ne signifas komprenon kaj fidon al mi. Mi estas spirita orfo kaj iafoje mi sentas grandan solecon.

— Mia ĉefinstruistino estas tre bona. Paŝintjare ŝi estis honorita kiel modela ĉefinstruistino. Pro tio ni tre ĝojis. Sed kiam nia lernejestro rakontis en la premia kunveno, ke ŝi dediĉis sian tutan tempon al prizorgo pri ni flankemetante sian malsanan infanon, kaj sekve li mortis pro perdo de ĝustatempa kuraco, mia koro estis forte premita. Mi pensis en mi: Terure estas se mia patrino kondukus same kiel ŝi.


KIO ESTAS LA MAKSIMUMAJ POSTULOJ DE ENTREPRENOJ AL SIAJ OFICISTINOJ?

— Foje en kunsido por celebri la Virinan Tagon, niaj gvidantoj faris versparon por la virinoj: Virinoj ambiciaj kaj inteligentaj ne malsuperas virojn; animo sen antaŭjuĝo estas libera.

— Mi pli-ol-30-jara, estas patrino de tri-jara infano. Antaŭ ol iri al laboro mi devas porti ĝin en infanvartejon kaj post laboro reporti ĝin hejmen. Mia ŝarĝo estas sufiĉe granda. Sed niaj gvidantoj ne komprenas nin. Ili zorgas nur pri nia laboro.

— Post edziniĝo virinoj devas longe foresti de laboro pro gravediĝo, akuŝo, ripozado pro akuŝo . . . kaj post tio ili ankoraŭ elmetas diversajn postulojn. Verdire, se mi estus gvidanto, mi preferus akcepti ok virojn ol dek virinojn. □

Elstaraj ĉinaj gimnastinoj U Ĝjani (dekstre) kaj Ma Janhong



ŜEN ŜINCĴŬAN KAJ ŜIA BUTIKO DE KOKOJ



Ŝen Sinĉjŭan

Ĉe la tagiĝo, ŝi kaj du aliaj knabinoj eklaboris: boligi akvon, buĉi kokojn kaj ilin purigi. Pretinginte pli ol cent kokojn, ili ĉiuj estis plenaj de ŝvito. Sen ripozo, ili hejtis la fornon, fritis la kokojn kaj poste ilin stufadis.

Kiam bonodoro ekŝvebis el potoj, ekrumoris la longa vico da klientoj ekster la butikoj. La pli ol 120 stufitaj kokoj estis elvenditaj en unu horo.

Ŝi estas Ŝen Sinĉjŭan, la mastrino de la malluksega Ĝisengjong-butiko de Stufitaj Kokoj. “Kial viaj kokoj estas tiel ŝatataj?” mi demandis al la mastrino de la butikoj. “Por tion ekspliki mi devas paroli multe.” Pro mia insistado, Ŝen Sinĉjŭan detale rakontis de komence.

OBSTAKLOJ

Ŝen, 33-jara, trairis neglatan vojon de la vivo. Ŝi pasigis sian infanecon en malriĉeco. Post diplomiĝo el mezlernejo, ŝi la-

boris en malproksima kamparo, tie ŝi spertis multe da malfacilaĵoj. En 1976, ŝi revenis en Pekinon kaj eklaboris kiel vendistino. Ŝi plurfoje estis laŭdata pro bona servo, sed ŝi ĉagreniĝis, ke ŝiaj deziroj ne povas realiĝi kaj ŝi ne sciis kien ŝi devas turni sian energion. Do, ŝi rezignis sian oficon kaj fondis en sia hejmo butikon de kokoj.

Antaŭ pli ol 30 jaroj, ŝiaj gepatroj havis en Junnan-provinco butikon de kokoj kaj ankaŭ ŝiaj bogepatroj havis en Ŝandong-provinco butikon de kokoj. Ŝi deziris asimili ilian sperton kaj elfari pekinan stufitan kokon, kaj tiu certe havos grandan debiton.

Sed fakte ŝi rigardis la aferon tro simple.

Kiam ŝi bezonis vivajn kokojn, oni rifuzis vendi al ŝi sub preteksto ke ŝia butikoj estas privata. Ŝi povis nur peti sian edzon bicikli al antaŭurbo je 20 km. for de la urbo por aĉeti kokojn.

Kiam ŝi bezonis kuiroleon, oni respondis, ke nur restoracioj estas provizataj, kaj ŝi nur povis aĉeti oleon en alta prezo. Tamen la plej malfacila problemoj estis aĉeti hejtaĵon, ke ŝi bezonis 30 kg. ĉiutage. Ŝi akiris de karbo-kompanio slipon, laŭ kies direktivo oni devis vendi al ŝi 250 kg. da karbo. Sed tute ekster ŝia atendo, ke la karbovendejo konsentis vendi al ŝi nur 25 kg. da karbo. En kolero ŝi foriris, neniom da hejtaĵo aĉetinte.

Per granda volo ŝi detenis sin de larmado, kaj iris per plata triciklo al proksima antaŭurbo por kolekti sekajn branĉaĵojn kaj fosi radikojn de arboj. La stako de brulaĵoj en ŝia korto pli kaj pli altiĝis kaj ŝiaj manoj pleniĝis je sangaj cikatroj.

MALPROSPERO

Vintre de 1984, ŝia Ĝisengjong-butiko de Stufitaj Kokoj oficiale malfermiĝis. En la unua



Ŝen Ŝinĉjŭan rakontas historieton al infanoj

komerca tago, ŝi elprenis el la marmito 20 stufitajn kokojn olebrilajn kaj bonorde metis ilin en vitrinon. Estis la horo de laborfino, multaj preterpasis ŝian butikon. Ŝi varme salutis ilin. Iuj haltis, ĵetis rigardon al la butikon, ekkonis en ĝi privatan butikon ĵus malfermitan, kaj ĝin forlasis sen demandi la prezon. Ŝen per laŭta voĉo kriis: "Kokoj ĵus preparitaj en tradicia maniero de la familio!" sed neniu venis.

Tiutempe estis multaj butikoj de kokoj en Pekino, kaj jam 7 tiaj butikoj sidis sur la strateto, kie loĝas Ŝen. Iuj malhonestuloj el ili detruis la renomon de la privataj butikoj, kiel oni povis senpripense kredi al ŝia butikon?

Pasis unu monato. Ŝia komerco restis malvigla. Ŝi ne povis vendi ĉiutage eĉ tri kokojn. En la tuta monato ŝi vendis kokojn nur de 200-300 jŭanoj, per kiuj

ŝi eĉ ne povis vivteni sian familion, por ne paroli pri pago de la ŝuldo kaj kredito. La du helpantoj, kiujn ŝi dungis el siaj parencoj, forlasis ŝin.

ŜLOSILO

Malsukceso ne deturnis ŝin de la vojo, kiun ŝi mem elektis. Ŝi cerbumis kaj cerbumadis kaj finfine elpensis novan ofertan manieron, t.e., klientoj povas gustumi la kokaĵon unue kaj ĝin aĉeti poste. Tiel, ŝi dispecigis freŝe stufitan kokon kaj la kokaĵon metis en teleron, por ke klientoj gustumu. Tiu metodo tuj efikis. Ĉiuj, kiuj gustumis la kokaĵon, laŭdis ĝian bonguston kaj aĉetis kokojn. Oni ekfrekventis ŝian butikon. Iuj volis aĉeti la de ŝi stufitan kokaĵon kaj manĝi ĝin ĉe la loko, ŝi do alportis seĝon kaj tason da teo aŭ vino. Kiam la najbaraj klientoj

aĉetis kokon, ŝi ĉiam aldonis al ili bongustan supon.

Do, ĉiutage ŝi povis elvendi ĉ. 60 kokojn, kaj en festaj tagoj oni mendis pli ol mil.

FIDO

Okazis en ŝia butikon jena afero: Iu maljunulino revenis en la butikon, tuj post sia forlaso kun la aĉetita koko. Ŝi diris, ke Ŝen ne donis al ŝi la pagoreston de duonjŭano. Ŝen kaj ŝiaj kunlaborantoj klare memoris, ke ili jam kvitigis sin kontraŭ la maljunulino. Sed por trankviligi la maljunulinon, Ŝen enmanigis al ŝi duonjŭanon kaj petis de ŝi pardonon. Poste Ŝen akompanis la maljunulinon elbutikigi.

Ekster ĉies atendo, post la negocaj horoj, la maljunulino ŝanceliĝe enbutikigis kun apogbastono en mano kaj diris kaptante la manon de Ŝen: "Finjo, mi trovis la duonjŭanon en mia poŝo. Mi miskulpigis vin." Rigardante la maljunulinon kun larmoj en la okuloj, Ŝen povis diri nenion.

La afero estis bagatela, tamen ĝi komprenigis Ŝen, ke por prosperigi sian negocon oni devas unue interkompreniĝi kun la klientoj.

Iuj volis aĉeti de ŝi kokon, sed ne havis monon ĉe la mano aŭ la mono ne sufiĉis, do ili volis lasi sian brakhorloĝon, fingroringon k.a. kiel garantiaĵon ĉe ŝi. Sed Ŝen diris: "Vi aĉetas kokon en mia butikon ĝuste pro via kredo al mi. Ĉu mi povas ne kredi al vi?" Ŝi rifuzis la garantiaĵojn de la klientoj kaj al ili vendis kokojn eĉ sen demandi ties adreson kaj nomon. En la lastaj du jaroj, pli ol 140 klientoj kredite aĉetis de ŝi kokon, sed neniu el ili malkonfesis la ŝuldon.

Multaj klientoj fariĝis amikoj de Ŝen. Iuj volonte helpis ŝin

stufi kokojn. Aliaj bonvole donis al ŝi informojn de la merkato. Triaj alportis al ŝi diversajn donacojn. Pluraj alilokaj klientoj portis al ŝi lokajn produktojn preskaŭ ĉiufoje, kiam ili venis en Pekinon.

Nun, ĉe Ĝisengjong estas tiel homplene kiel en foirejo, la monata enspezo atingis 5 000 jŭanojn kaj la neta monata profito meznombro 350 jŭanojn.

FAVORANTO DE INFANOJ

Ŝen ofte diris: "Mi komercas ne nur por mono, sed ankaŭ pro devo." En aprilo de 1985, oficisto de la Dombloka Administrejo demandis, ĉu ŝi volantas prepari tagmanĝon por la elementlernejoj proksime loĝantaj, kies gepatroj laboras fore. Ŝen tuj konsentis. Ŝi aĉetis por la infanoj servicon, du tabletojn, dekelkajn seĝetojn, kanapojn kaj faldeblajn litojn, kaj poste libroŝrankon, mil librojn kaj multajn ludilojn.

Pli ol 20 infanoj prenis manĝa-

ĵon ĉe ŝi. Ŝen dungis iun por prepari manĝaĵon speciale por la infanoj. La menuo estis difinita de ŝi persone. Ĉiu manĝo konsistis el du pladoj kaj supo, post la manĝo ili havis fruktojn aŭ malvarmajn trinkaĵojn. Efektive la monata manĝaĵpago de la infanoj ne povis kovri la koston, ŝi devis subvencii la infanojn ĉiumonate per pli ol 100 jŭanoj.

Somere, ŝi cedis du el siaj tri ĉambroj al la infanoj por ke ili siestu. Vintre, ŝi rakontis rakontojn al ili kaj akompanis ilin ludi ŝakon kaj sin amuzi. Ŝi sentis sin ĝoja kaj kontenta, vidante, ke tiuj karesindaj infanoj bone manĝis kaj ripozis.

Iuj el ŝiaj parencoj kaj amikoj ne komprenis ŝian konduton, vidante, ke ŝi, ŝia edzo kaj infano enpakiĝis en malvasta ĉambro sen moderna meblo. Laŭ ili mastroj de privataj butikoj senescepte laboras por mono, kaj multaj el ili fariĝis riĉaj. Al tia diro Ŝen respondis nur per rideto.

REKOMPENCO AL ŜEN

La 1-an de junio 1985, la kelkdek infanoj prenantaj manĝon ĉe Ŝen ĉirkaŭis ŝin kaj prezentis al ŝi diversajn donacetojn. Antaŭ ŝi kuŝis ŝipo kaj aŭto falditaj el papero de Ĝuan Ŝin de tria klaso. Li diris: "Onklino, post kiam mi plenkreskos, mi kondukos verajn aŭton, ŝipon kaj aviadilon, per kiuj mi vojaĝigos vin tra la mondo." La 8-jara Ŭanĝu elpoŝigis naktukon kvaroble falditan kaj diris: "Onklino Ŝen, kiam vi kuiras kokojn, vi ĉiam ŝvitegas. Viŝu ŝviton per tiu ĉi tuko!"

Informiĝinte, ke Ŝen havas malfacilojn por aĉeti brullignon, iuj klientoj bonvole alportis al ŝi brullignon. Kelkfoje en la korto aŭdiĝis bruoj. Sed kiam ŝi malfermis la pordon ŝi vidis nur faskojn da brulligno. En pli ol unu jaro, la butiko uzis ĉ. 20 000 kg. da brulligno, plejparto el kiu estis donacita de la klientoj. □


Lucky-filmoj

tre utilaj por vi!

La Unua Filma Fabriko sub la Kemi-industria Ministerio de Ĉinio estas la plej granda fabriko, kiu produktas plurspecajn filmojn kaj magnetajn materialojn. Ĝiaj produktaĵoj estas uzataj en kinematografio, televizio, kulturo, eduko, nacidefenda industrio, astronautika telegvido, medicino, presado, fotado k.a. Estas pli ol 70 specoj de produktaĵoj, el kiuj tri oni premiis per ŝtata arĝenta medalo, 12 oni titolis elstaraj produktaĵoj de Hebej-provinco aŭ la nomita ministerio kaj 12 oni vendas en 12 landoj kaj regionoj de Azio, Eŭropo kaj Afriko.



乐凯胶卷给您留下幸福的回忆



化工部第一胶片厂

中国保定

电话: 37901 37902
电报: 5231

Bonkvalitaj kaj bonvenaj estas la koloraj kaj pankromataj Lucky-filmoj de ĉiaj normoj.

**Unua Filma Fabriko sub la
Kemi-industria Ministerio de Ĉinio
Baŭding, Ĉinio**

Tel.: 37901 37902

Telekso: 5231

PETROL-KEMIA URBO SUR RUINO DE ANTIKVA ĈEFURBO


La distrikto Linzi de la urbo Zibo en la okcidenta parto de Ŝandong-duoninsulo estis la ĉefurbo de Ĉji-regno en la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (770-221 a.K.). Ĝi estas landfama pro siaj longa historio kaj multaj eminentaj personoj.

Hodiaŭ, kvankam ne estas plu la majestaj, antikvaj temploj, grandiozaj domoj kaj pavilonoj, tamen videblas iliaj ruinoj. Kaj pli alloga estas la nova moderna petrolkemia urbo — la Ĉjilu-a Petrol-kemia Industria Kompanio ĉe ruino proksime de la malnova ĉefurbo.

La produktaj konstruaĵoj, loĝdomoj kaj publikaj servoj de la kompanio dislokiĝas sur la tero de 110 kvadrataj kilometroj, tiel granda kiel Ŝanhajo, la plej granda urbo en Ĉinio. En la olerafinejo arbare staras ŝakto-skafaldoj, rete kruciĝas oleduktoj. Sur la larĝaj stratoj navete cirkulas veturiloj. Nun sur la konstruejo de etilena fabriko alte leviĝas arĝentkoloraj skafaldoj, verdaj polimerigujoj kaj okraj globaj vazegoj. Depost 1966, kiam la konstruantoj metis la unuan angulŝtonon, tie jam aperis sendependa petrol-kemia bazo kun olerafinejo, petrol-kemiaj fabrikoj, scienc-esplora kaj projekta

fakoj, ekipaĵ-farejo, kultura kaj eduka departementoj, hospitaloj kaj aliaj sociaj servoj. Sub la kompanio funkcias 6 fabrikoj, kiuj produktas ĉefe benzinon, kerosenon, dizeloleon, asfalton, sintezan amoniakon, ureon, kaŭĉukon, katalizilon por olerafinado kaj aliajn 45 produktaĵojn. Iliaj produktaĵoj, kiaj dizeloleo, petrolo, tolueno kaj asfalto, estis premiitaj de la ŝtato per oraj kaj arĝentaj medaloj. Iliaj produktaĵoj, kiel dizeloleo, kaŭĉuko, asfalto, nafto kaj benzeno, estas vendataj en Azio, Afriko kaj Eŭropo. Tiuj varoj ĝuas certan reputacion en internaciaj merkatoj.

Regadejo de la etilena fabriko



En la kompanio nun laboras 32 000 laboristoj kaj oficistoj. La olerafinejo ĉiujare povas prilabori 6 milionojn da tunoj da nafto. La du kemisterkaj fabrikoj ĉiujare produktas 380 000 tunojn da sterko. Antaŭ 20 jaroj la ŝtato investis al ili 980 milionojn da jŭanoj, dume la totala sumo de iliaj donitaj impostoj kaj profito atingis 7.6 miliardojn da jŭanoj. Sole la profito kaj imposto en 1985 egalas al la totala investo de la ŝtato por konstrui la kompanion.


La 1-an de aprilo, 1984, oficiale komenciĝis la konstruado de la fabriko kun produktopovo de 300 000 tunoj da etileno. Ĝiaj ekipaĵoj estas importitaj de eksterlande en la periodo de la 6-a Kvinjara Plano (1981-1985), kun totala investo de 4.65 miliardoj da jŭanoj kaj la konstruo baziĝis sur la plivastigo de malnovaj fabrikkonstruaĵoj. Je la fino de 1986 la unuaperioda konstruado estis jam fundamente plenumita kaj oni faros provan produktadon en majo ĉijare. En 1988, kiam ĝi estos plene plenumita, ĉiujare ĝi produktos 500 000 tunojn da plasto, 80 000 tunojn da kaŭĉuko, 200 000 tunojn da kaŭstika sodo kaj 400 000 tunojn da organik-kemia materialo. Tiam ĝia jara produktovolumo atingos 2.5 milionojn da jŭanoj. Estas antaŭvideble, ke post sia ekproduktado ĝi kune kun aliaj pli ol 100 gravaj konstruaĵoj de Ĉinio certe ludos gravan rolon por meti firman bazon al la ĉina ekonomio en la 90-aj jaroj kaj por ĝia prosperiĝo en la 90-aj jaroj.

En la konstruejo la oficistoj kaj laboristoj serioze laboras por garanti la konstruan progreson kaj ĝian kvaliton.

La 55-jara Guj Zutong, supera inĝeniero de la instituto sub la

kompanio, diplomigis el Ĝjaŭtong-universitato de Ŝanhajo en 1952 kaj apartenas al la unua generacio de studentoj elkulturita de la nova Ĉinio. En dekoj da jaroj li sin dediĉis al studo pri elektroniko, altpolimera fizik-kemio kaj scienc-teknikaj informoj. La konstruado de fabriko kun produktopovo de 300 000 tunoj da etileno donis al li bonan ŝancon disvolvisian talenton. Por popularigi la konstruan teknikon kaj akceli la konstruan rapidecon, ĉiutage li klopodis en la konstruejo de mateno ĝis vespero kaj akiris grandajn sukcesojn. La 45-jara Meng Ŝjangong, inĝeniero de la akvo-proviz-drena fabriko, memvole prenis sur sin la malfacilegan taskon instali la akvokonduktilojn kaj drenilojn. Ĉiutage li klopodis en la konstruejo 61 kilometrojn longa. Juna laboristo Sun Ĝoŝjun kaj lia elektreveldista grupo estis ŝarĝitaj per elektra veldado teknike malfacilega. Pro manko de spertoj ili renkontis multajn malfacilojn en la komenco. Por venki ilin Sun Ĝoŝjun kaj liaj kolegoj lernis elektran veldadon en libro kaj en la praktikado foje refoje kaj fine ekposedis la teknikon. La ekzamenaj fotoj faritaj en la prova veldado montris, ke 119 el la 120 fotoj pri liaj veldadoj atingis la unuaklasan nivelon. Pro tio fremdlandaj fakuloj nomis lin magia veldisto.

Dank' al la principo konduki samtempe la konstruadon de produktado kaj tiun de vivinstalaĵoj, tiu siatempe mizera loko nun aspektas kiel harmonia tuto de belaj naturaj pejzaĝoj kaj modernaj domaroj. Interne de la petrol-kemia urbo interkruciĝas rektaj kaj larĝaj asfaltitaj stratoj. La trotuaroj estas ombraj somere. Jen kaj jen leviĝas vico post vico da novaj loĝdo-



Nova ekipaĵo de olerafinejo por trakti malpuran akvon

moj. Tie funkcias poŝtoŝtancoj, vendejoj, restoracioj, bankoj, librejoj, almanĝaĵvendejoj, hospitaloj, infanvartejoj, infanĝardenoj, lernejoj, naĝejoj, rulskeletoj, kulturaj palacoj, kinejoj, teatroj kaj belaj parkoj. Ĉio ĉi donis al la laboristoj kaj oficistoj bonan vivmedion. La ferma-cirkvita televido de ĉiu fabriko povas kovri la areon kun perimetro de pli ol 30 kilometroj kaj ĉiuj familioj povas ĝui la programon.

Nun la meznombra salajro de la laboristoj kaj oficistoj de la tuta kompanio duoble pli altiĝis ol tiu en la frua periodo de la fabriko. En la hejmoj de la plejparto de la laboristoj kaj oficistoj nun estas multekostaj konsumaĵoj, kiaj fridujo, stereofonia aparato, televidilo, motorciklo k. a. □

Planoj kaj Agadoj por la Centjara Jubileo de Esperanto

de NI DONGJANG

La jaro 1987 estas memorinda por la tuta esperantistaro de la mondo. Por ĝia alveno multaj Esp-organizoj eklaboris jam antaŭ kelkaj jaroj. Laŭ la ricevitaj informoj mi resume aperigas en tiu ĉi numero parton de la planoj kaj agadoj de diversaj landoj kaj internaciaj Esp-organizoj. El ili iuj estas plenumitaj kaj aliaj plenumotaj.

ORGANIZAJOJ KAJ FONDUSOJ

La Universala Esperanto-Asocio starigis la Internacian Kunordigan Komitaton en 1981. La landaj komisionoj por la jubileo estas starigitaj en Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Bulgario, Danlando, Hispanio, Islando, Italio, Madagaskaro, Malto, Norvegio, Nov-Zelando, Pollando kaj Svislando. Por financi sian agadon, iuj Esp-organizoj starigis sian jubilean fondaĵon, ekzemple, UEA en 1983 en Budapeŝto deklaris la fondon de la Internacia Jubilea Fondaĵo; IKUE starigis la Jubilean Fondaĵon; PEA la specialan fonduson; Nov-Zelando la J. T. Allan-Fonduson; Danlando kaj Belgio la "Klubojn 100"; la Kroatia Esperanto-Ligo (KEL) buĝetas 1 250 000 gld.

akiritajn per profito de la ŝtata loterio, subvencio de Unesko, koncertoj, aŭkcioj ktp.

KONFERENCOJ, RENKONTIĜOJ, SIMPOZIOJ KAJ FESTIVALOJ

Komprenoble multaj landaj asocioj kaj Esp-organizoj okazigos landajn tradiciajn kunvenojn de esperantistoj kun enhavo de la Jubilea Jaro, kiujn mi ne mencias ĉi tie. Mi publikigas nur specialajn. Kiel konate, la plej granda, impona renkontiĝo de la esperantistaro estos la 72-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio en la Jubilea Jaro. Mi antaŭvidas, ke en ĝi partoprenos certe pli multaj esperantistoj ol antaŭe. La Neŭtrala Esperanto-Movado okazigos Jubilean Esperanto-Konferencon en Graz, Aŭstrio, inter 18-25 de julio, 1987. La Jubilea Kongreso de S.A.T. okazos en Bolonjo ĉe Maro (Bolongne-sur-Mer) de la 22-a ĝis la 29-a de aŭgusto 1987. KEL de Jugoslavio organizos internacian festivalon "100 jaroj de Esperanto-Kulturo" kaj internacian simpozion pri internacia kultur-interŝanĝo inter evolulandoj; en Japanio okazis konferenco organizita de JEI en kunla-

boro kun la Etnologia Nacia Muzeo kaj konferenco pri sociolingvistikaj aspektoj de interlingvaj ideoj en 1986; en Pollando okazos simpozio pri la internacia lingvokomunikado, pri la internacia lingvo Esperanto kaj diversaj kulturaj popularigaj manifestacioj; la Ĉeĥa Esperanto-Asocio planas la Esperantistan Kulturan Festivalon en Opava en 1987; la Germana Esperanto-Asocio okazigos kelkajn preparajn seminariojn de aktivuloj por la loka agado; en Argentino okazos simpozio pri Esperanto kaj ĝia historio; la Bulgara Esperanto-Asocio (BEA) organizos en Sofio la Solenan Sciencan Sesion. Krome la Argentina Esperanto-Ligo proponas la Internacian Renkontiĝon de la Latinamerikaj Landoj en 1987 ktp.

ELDONAJ AGADOJ

Ekde 1982 UEA eldonas "Kiu Faru Kion", kiu indikas la taskojn plenumendajn kaj plenumoblajn prepare al la Jubileo, respektive de la centraj instancoj de UEA, de ĝiaj landaj asocioj, de la fakaj asocioj, de la Esperanto-gazetaro, de la lokaj societoj kaj de la unuopaj esperantis-

toj. Eldonon de antologio planas Aŭstralio, Francio, Pollando, Malto, Islando, Bulgario, Hungario, Brazilo, Ĉeĥoslovakio k.a. La libron pri la historio de Esperanto-movado en sia lando sin preparas por eldoni la Aŭstralia Esperanto-Asocio, la Flandra Esperanto-Ligo, la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, la Bulgara Esperanto-Asocio, la Pollanda Esperanto-Asocio, Malto kaj la Meksikia Esperanto-Asocio. BEF, FEL kaj aliaj eldonoj libretojn pri la vivo de Zamenhof en sia nacia lingvo. En Hispanio eldoniĝos "Vortaro Esperanta-Hispana" kaj "Ilustrita Broŝuro pri la Esperanto-Movado" en la nomo de HEF, "Astura Bukedo" de la Astura Esperanto-Asocio, "La Homa Vivaventuro de Giordano Moya kaj Malsupra Tero" tradukita el la kataluna lingvo de la Barcelona Esperanto-Centro, "Sanga Edzino kaj la Domo de Bernarda Alba" de la Madrida Esperanto-Liceo, "Analoj de la Hispana Esperanto-Movado" de la Zaragoza esperantistaro, bildobendo pri la Elementa Esperanto-Kurso preparata de la Esperanto-Grupo Callosa de Segura. La Hispana Ministerio de Transportado, Komunikado kaj Turismo eldonis grandan koloran afiŝon de la Jubileo. La Germana Esperanto-Asocio eldonis "Varbfolion" en la franca, nederlanda kaj germana lingvoj kaj stoko de 15 000 ekzempleroj en Germanio jam estas disdonita, eldoniĝis ankaŭ afiŝo kaj broŝuro pri

GEA; UEA eldonis "Bazan Libron pri Esperanto" de konata aŭtoro William Auld; la Aŭstralia Esperanto-Asocio eldonis la libron "Esperanto en Aŭstralio"; NEL tradukis la anglalingvan sociologian studon de Peter Forster pri "The Esperanto Movement" (la Esperanto-Movado); BEA aperigos libron kun opinioj de sciencistoj kaj verkistoj pri Esperanto; kaj ELNA aperigos televidan filmon pri Esperanto. Krome pli ol 15 landaj asocioj petis sian nacian instancon emisii en 1987 poŝtmarkojn pri Esperanto. -

EKSPOZICIOJ

KEL aranĝos ekspozicion pri originala Esperanto-literaturo, tradukitaj libroj kaj retradukoj al aliaj lingvoj, pri revuoj kaj naciaj temoj, pri manifestacioj, kiuj peras naciajn kulturojn kaj uzas Esperanton k. s.; BEA preparas porteban ekspozicion pri la atingoj de Esperanto en la mondo kaj Bulgario kaj alian ekspozicion pri la 100-jara jubileo de la apero de la Unua Libro en la Nacia Biblioteko; UEA planas grandan ĝeneralan ekspozicion, por kiu buĝetitaj estas 25 000 gld; la Aŭstralia Esperanto-Asocio asignis 2 000 aŭstraliajn dolarojn al sia Jubilea Ekspozicio; ĈEA organizos tutŝtatan ekspozicion "Centjaroj de Batalo por Mondpaco kaj Interkompreniĝo", fakliteraturan ekspozicion "Esperanto — Komunka Lingvo de Scienco kaj Tekniko" kaj beletran ekspozicion.

KONKURSOJ

La Esperantlingva Verkista Asocio organizas la Jubilean Internacian Konkurson por verkaĵo de Originala Teatraĵo en Esperanto; la Esperanto-Societo (Malto) organizos literaturan konkurson pri eseoj kaj poemoj; en Argentino okazos konkurso pri literaturo; la Madrida Esperanto-Liceo aranĝos tradukkonkurson por hispanlingvanoj; BEA jam okazigis oratoran konkurson pri la plej bonaj artikoloj en Esperanto; kaj la Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj ebligas perlabori radioamatoran diplomon al tiuj, kiuj povas poŝtkarte garantii 100 esperantajn komunikojn; ĈEA organizos konkursojn pri la plej bona informado pri Esperanto dum la Jubilea Jaro kaj pri tradukoj el la ĉeĥa en Esperanton.

ESPERANTO-INSTRUADO

GEA fondis kelkajn provincajn suborganizaĵojn por respondi pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn en la kulture aŭtonomaj provincoj. Ankaŭ multaj popol-altlernejoj en FR Germanio ofertas Esperanto-kur-



Glumarkoj memore al la centjariĝo de Esperanto



sojn kaj festprelegojn okaze de la Jubileo. BEA preparas materialojn pri la Jubileo por lernejoj, en kiuj oni lernas Esperanton; la Flandra Esperanto-Ligo daŭrigos siajn konatajn kadrokursojn, en kiuj oni lernas pri movadaj taskoj.

ALIAJ AGADOJ

Por plenumi la rekomendon de la Araka Medicina Asocio de Irano okaze de la Jubilea Jaro de Esperanto, pli ol triono de la araka kuracistaro (150) presis siajn receptojn unuforme, dulingve — perse kaj Esperante; la Nederlanda Esperanto-Asocio regule sendas novaĵojn pri Esperanto al la nacia Unesko-komisiono kaj ĝia agadcentro, por ke

la lasta aperigu en siaj eldonaĵoj artikolojn pri la 100-jara jubileo de Esperanto; la laborgrupo ĉe UN planas por la Jubilea Jaro grandan kampanjon por certigi, ke ĉiu ano de la ĉefoficejo de UN havu bazajn informojn pri Esperanto. PEA starigos en Varsovio monumenton al Zamenhof; la Neŭtrala Esperanto-Movado starigos la Jubilean Esperantomonumenton "La Espero" en Graz, Aŭstrio; BEF starigos ekzamenkomisionon de Esperanto; BEA malfermos la Esperantan Bibliografian Centron; ĈEA planas eldoni afiŝon pri la Jubileo kaj medalon "1987 — Centjara Jubileo de Esperanto", kaj malfermi la Esperantan Turisman Centron; PEA celas fondi la Centran Esperanto-Bibliotekon

kun arkivo kaj muzeo; la Kultura Centro Esperantista starigas kunordigan centron por Esperanta edukado; PEA organizas mondan bibliografian centron pri Esperanto; la Jugoslavia Esperanto-Ligo kaj la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista eldonis kaj eldonos Jubileajn medalojn; la Hispana Esperanto-Federacio organizos karavanojn al la UK en Varsovio kaj al la I. J. K. en Krakovo; post kontakto kun la Pola Esperanto-Asocio, la Madrida Esperanto-Liceo organizos hispanan ĥoron por partopreni en la UK. Multaj landoj starigos apartan informilon aŭ gazetaran servon por 1987. Ankaŭ multaj internaciaj fakaj Esp-organizoj aranĝas sian jubilean agadon. □



La aŭtoro

Dum la jaro 1987 la centa jubileo de Esperanto estos pri-festata en multaj anguloj de la mondo. Zagreb, la dua plej granda urbo en Jugoslavio, planas ampleksan solenaĵon por pri-festi la jubileon. Kunlabore kun Universala Esperanto-Asocioto post la jubilea kongreso en Varsovio okazos en Zagreb de la 2a ĝis la 9a de aŭgusto la aranĝo "100 jaroj de Esperanto-Kulturo".

Ne estas hazarde, ke la kul-

Invito al Jugoslavio

de **SPOMENKA STIMEC**
(Jugoslavio)

tura festo okazos ĝuste en Zagreb: ĉi tie Esperanto havas longan kaj riĉan tradicion: la veteranoj de la Esperanto-Movado aktivas en la urba societo "Bude Borjan", fervojistoj-esperantistoj vigle aktivas en sia klubo, tramista gazeto ZET pli ol 25 jarojn regule publikigas fakajn informojn akiritajn per Esperanto. Studenta Esperanto-Klubo en Zagreb festos en 1987 tridek jarojn de sia seninterrompa ekzistito. Ĉi tie ekde 1972 funkcias entrepreno Internacia Kultura Servo, kies plentempaj profesuloj prezentas diversajn kulturajn aspektojn de Esperanto: ĉi tie jam 19 jarojn ĉiujare estas organizita Pupteatra Internacia Festivalo. En tia framo okaze de la jubileo estos organizita ampleksa kultura programo: granda ekspo-

zicio pri Esperanto, renkontiĝo de profesiaj kaj amatoraj Esperanto-teatroj, vilaĝa Esperanto-Foiro, kie ĉiu povos vendi aŭ interŝanĝi siajn esperantaĵojn. . . La jubilea 20a Pupteatra Internacia Festivalo okazos kadre de la kultura festo.

Krom la kultura ankaŭ scienca aspekto de Esperanto estos traktata, kadre de la simpozio pri lingvaj problemoj ĉe la organizoj de UN.

Ni ripetas ĝin al vi, kun la peto partopreni. Jen la floro invitanta: el la jaro 1887 malfermiĝas la E-petaloj. Kien ni alvenis? Kien ni atingos?

Zagreb bonvenigas vin post Varsovio. Faru kun ni la unuajn paŝojn en la duan jarcenton de Esperanto. □

BRAVAJ EKSPEDICIOJ SUR JANGZI-RIVERO

Teksto de ĈEN BAŬHE Fotoj de LIŬ ĈJIGJUN

Kelkaj el la plej grandaj riveroj de la mondo, kiel Amazono kaj Misisipo de Ameriko kaj Nilo de Afriko, estas subigitaj de homoj unu post alia. Sed Jangzi-rivero, la tria granda rivero en la mondo, estis rigardata kiel nesubigebla antaŭ junio, 1985.

La rivero trapasas Ĉinion de okcidente orienten kaj enfluas en Pacifikon apud Ŝanhajo.

Jangzi-rivero longas je 6 300 km., kun totala faldistanco de 5 400 m. Ĝia supra parto de la riverfonto ĝis Jibin de Siĉŭan-provinco longas je 3 200 km., kun totala faldistanco de 5 100 m. Laŭ Ĝinŝa-rivero longa je 1 500 km., la lasta supra parto de Jangzi-rivero, dislokiĝas 780 danĝerejoj. Ĝuste tiuj naturaj danĝerejoj baras la vojon de ekspedicianoj.

Jaŭ Maŝu, 32-jara junulo de Siĉŭan-provinco, decidis traflosi Jangzi-riveron kaj li sola komencis flosadon ĉe la riverfonto en junio, 1985. Sed post unu monato li viktimiĝis en Ĝinŝa-rivero.

Unu jaron poste, volontulo-ekspedicianoj refoje faris provon por venki la danĝeran Jangzi-riveron. En la frua somero de 1986 tri ekspedicioj unu post alia veturis al la riverfonto de Jangzi.

EKFLOSO ĈE LA RIVERFONTO

Meze de junio 1986, la Ĉina Flosa Ekspedicio de Scienca

Esplorado pri Jangzi-rivero el junaj volontuloj kaj raportistoj de Tjanĝin, Pekino kaj Ŝanhajo kaj la provincoj Siĉŭan, Ĉinghaj kaj aliaj scienc-esploristoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj, la unuaj atingis la urbeton Ŭenĉjŭan (Termofonto) sudoriente de la neĝmonto Geladandong, kie fontas Jangzi-rivero. Tie la ekspedicio dividis sin en du grupojn, unu kun 13 membroj havis la taskon esplori la riverfonton kaj la alia kun 23 membroj veturis norden laŭ ŝoseo al Tŭotŭo-rivera ponto, la unua ponto super Jangzi-rivero, je pli ol 200 km. for de la fonto. De tie la grupo ekfloris laŭ la rivero.

Preskaŭ en la sama tempo la Lŭojang-a Flosa Ekspedicio atingis la riverfonton. La ekspedicio konsistis el ok junuloj de Lŭojang, Henan-provinco. Iliaj flosaj veturiloj estis speciale faritaj de la Ŝanhaja Kvara Kaŭĉuka Fabriko.

Post unu monato, en la mezo de julio, atingis la riverfonton ankaŭ la Ĉina-Usona Flosa Ekspedicio.

RIVERA LABIRINTO

Tŭotŭo-rivero fontas el Ĝjanggendiĵu-glacirivero kaj longas je 300 km. Ĝi kaj Damĉju-rivero kunfluas en Tongtjan-riveron. Tŭotŭo-rivero trafluas ebenan terenon kaj kelkloke havas diversajn fluojn, tiel ke estas malfacile distingi la ĉefan fluejon de la branĉaj. La ekspedicianoj ofte

eniris netraireblan akvovojon aŭ grundis en malprofundaĵo. Kvankam tiu ĉi parto de la rivero estis sendanĝera, tamen ili ne atendis, ke ilia flosado konsumis tie multe da tempo kaj energio. La Ĉina Flosa Ekspedicio de Scienca Esplorado, post ekflosi ĉe la Tŭotŭo-rivera ponto je la 16-a de junio, uzis kvar tagojn por trapasi akvovojon de 100 km. kaj atingis Tongtjan-riveron je la kvina tago.

LA UNUA DANĜERO

La 21-an de junio, dek kaŭĉukaj boatoj de la Ĉina Flosa Ekspedicio de Scienca Esplorado eniris en Tongtjan-riveron. Ili unuafoje spertis danĝeron en la loko.

La unua danĝerejo de Jangzi-rivero troviĝas ĉe riverkurbiĝo kun kruta rokmuro ĉe la bordo. Tuj post kiam la boatoj ĉirkaŭiris apikan krutajon, ili estis atakataj de vico da 3-metre altaj ondegoj. La boato iranta antaŭe estis subite ĵetita supren. Iu ekspediciano estis elĵetita el la boato. Dank' al sia kaptito de boata ŝnuro, li ne falis en la riveron. Antaŭ ol la membroj retranskviliĝis, ĵetiĝis sur la boaton alia vico da ondegoj. La akvo verŝiĝis en la boaton, en iliajn kolumojn kaj elfluis el iliaj manikoj kaj pantalonoj. Je la krio "Remu, reĝustigu la direkton de la boato!" la tri membroj en la boato plenforte remis. Alpuŝiĝis aliaj du vicoj da ondegoj, la boato fine reprenis sian direkton. La unua boato sukcesis trapasi la



Tibetanoj adiaŭas la ĉina-usonan kunflosan grupon.

danĝeran pasejon, trarompinte la ondegojn en forta tangado. Tiam la akvo en la boato jam estis 15 cm. profunda. La postaj boatoj bone preparis sin kaj trapasis glate, tamen la vestoj de la membroj tute malsekiĝis.

LA UNUAFOJA BOAT-RENVERSIĜO

La 28-an de junio la ekspedicio atingis Ĉjumarleb, la unuan gubernian urbon ĉe Jangzi-rivero kaj daŭrigis sian flosadon post dutaga ripozo.

Tagmeze de la 1-a de julio la ekspedicio trovis antaŭ si grandan falakvon kun alteco de 14.5 m. Por pliigi stabilecon de la boatoj oni kunligis la du antaŭajn kaŭĉukajn boatojn grandan kaj malgrandan flankon ĉe flanko. Kiam la du boatoj ĵetiĝis malsupren de la falakvo, ili estis ĵetitaj de ondegoj supren. Je tio la granda boato kovris la malgrandan. Du membroj en la malgranda boato falis en akvon. Feliĉe, ili sin savis, firme tenante en la manoj la ŝnuron de la boato.

De tiam plurfoje okazis al ili boat-renversiĝo. En la sekvanta tago oni veturis per boatoj du

malgrandaj kaj unu granda kunligitaj flankon ĉe flanko. Trapasante iun falakvon, la kunligitaj boatoj triope ĵetiĝis en torento al rifo meze de la rivero. En tiu kriza momento iu membro ĉe la pruo sprite premis la rifon per sia ligna remilo. La remilo rompiĝis en tri pecojn, sed la boatoj fine sekure ĉirkaŭiris la rifon. La tri boatoj estis portitaj de torento malsupren kaj preskaŭ vertikaliĝis sub premado de ondoj. Iu ekspediciano en la malgranda boato estis subite elĵetita alten sur la grandan boaton, alia en la granda plenforte kaptis lin kaj savis lin el la danĝero. Tamen kiam la boatoj estis levitaj de ondegoj alten, iu membro ĉe la pobo estis ĵetita en torenton. Oni sukcesis savi lin, trapasinte alian montgorĝon.

Flosante sur Tongtjan-riveron, la ekspedicio plurfoje renkontis danĝeron. Fine oni decidis kunligi la sep boatojn en formacion, kun unu en la antaŭo, tri en la mezo kaj aliaj tri en la malantaŭo por pliigi la stabilecon, kio rikoltis bonan rezulton, ke en la posta flosado tra Tongtjan-rivero ne plu okazis boat-renversiĝo kaj neniu dronis en la rivero.

ENDANĜERIGŬO ĈE JEBĀ

La 10-an de julio, la ekspedicianoj, kiuj faris esploradon ĉe la riverfonto, poste atingis la aliajn ekspedicianojn kaj la du grupoj renkontiĝis en la gubernio Juŝu, Ĉinghaj-provinco. Ili sukcese plenumis la flosadon tra Tongtjan-rivero.

La 19-an de julio la ekspedicio sendis dek membrojn, kiuj veturis per du grandaj kaŭĉukaj boatoj por flosi tra la Ĝinŝa-rivera parto de Jangzi. La sekvantan tagon ili trafiosis glate Tongĝjaŝja-montgorĝon, kie viktimiĝis la heroo flosanto Jaŭ Maŝu.

Trapasinte Tongĝjaŝja-montgorĝon, la dek ekspedicianoj konkeris la danĝeran pasejon Ĉaggang, la grandan falakvon La'ŭa kaj la grandan danĝeran pasejon de Keĵi, konsistantan el dekoj da malprofundaĵoj.

La danĝereco de Ĝinŝa-rivero forte skuis la animon de la ekspedicianoj trapasintaj pli ol cent danĝerajn pasejojn. Tie la rivero karakteriziĝas per mallarĝa fluejo, granda faldistanco kaj multaj danĝeraj pasejoj, kiuj sekvas unu post alia. Oni ofte devis trapasi plurajn, eĉ dekkelkajn

grandajn danĝerajn pasejojn en unu tago. Ofte okazis, ke tuj post traĵo de unu pasejo, la flosantoj devis trapasi la sekvantan sen sufiĉa preparo. Krome, ambaŭborde de la rivero staras apikaj rokmuroj, kie oni neniel povas albordegi. Tiukaze ili devis fari nenion alian krom antaŭenpuŝiĝi.

Kelkajn tagojn poste, la dek flosantoj ĉiuj enfalis en la riveron pro boat-renversiĝo. Feliĉe, ne okazis grava vundo.

La 25-an de julio, la ekspedicio renkontiĝis kun la ĵus atinginta lŭojang-a ekspedicio en Bajju-gubernio. Ili decidis post interkonsiliĝo, ke ĉiu sendu 4 membrojn por organizi kunflusan grupon kaj trapasi grandan danĝeran pasejon apud la urbeto Jeba.

La kunflusa grupo veturis per du boatoj interligitaj per ŝnuro. Gvidis ilin hermetika boato de la lŭojang-a ekspedicio.

La 27-an de julio, la kunflusa grupo veturis en la pasejon. Subite la malantaŭa boato estis transverse levita de ondegoj kaj la ŝnuro interliganta ambaŭ boatojn kroĉiĝis al roka fendo. La boato tuj renversiĝis de ondoj, ĝiaj kvin veturantoj falis en la riveron. La hermetika boato atakate de ondegoj rompiĝis ĉe la ŝnura kunligejo. Ondegoj forportis ĝiajn tri veturantojn. La ekspedicianoj renkontis la plej grandan malfacilon en la flosado.

Post kvin tagoj oni elsavis kvin enakviĝintojn, kiuj spertis neimageblan suferon. Sed la aliaj tri malaperis.

STURMO AL LA DEMONA MONTGORĜO

La endanĝeriĝo ĉe Jeba ne ŝancelis la firman volon de la du

ekspedicioj trapasi Jangzi-riveron.

Meze de aŭgusto, la ĉina ekspedicio post ripozo sukcesis trapasi la Pasejon de Kvin Grandaj Drakoj, la plej danĝeran pasejon en Batang. Dufoje okazis boat-renversiĝo, tamen la flosantoj estis savitaj. En la tria tagdeko de aŭgusto, ili trapasis Modingmontgorĝon, grandan danĝeran pasejon de la rivero en Siĉŭan-provinco, kaj veturis en la provincon Junnan. La ekspedicianoj sin preparis por trapasi la Tigrosaltan Montgorĝon, la plej danĝeran pasejon de Jangzi-rivero.

La montgorĝo longas 17 km. kun krutaj rokmuroj 3 000 m. altaj ambaŭborde. Ĝi havas sep altajn falakvojn kun totala faldistanco de preskaŭ 200 m. En la fluejo dissemiĝas ŝtonoj forruliĝintaj de la montoj. El ili la plej granda havas 1 500 kubmetrojn kaj baras la enirejon de la gorĝo. La fluejo estas dividita de la ŝtono en du akvovojojn. La okcidenta larĝas dekelkajn metrojn kaj la orienta kvin-ses metrojn. La torento barita de la roko formas ondegojn dek metrojn altajn kaj faras animskuan bruegon. Lokanoj nomas ĝin Tigrosalta Montgorĝo aŭ Demona Montgorĝo. La faŭko de la montgorĝo, kie la granda roko baras la fluon, nomiĝas Supra Tigrosalta Montgorĝo.

En la 4-a de septembro, la lŭojang-a ekspedicio faris provflosadon per unu hermetika boato kun hundoj ene. Apenaŭ preterpasinte la rokon, la boato jam estis rompita de la roko kaj la hundoj en ĝi malaperis.

La 10-an de septembro, Lej Ĝjanseng de la lŭojang-a ekspedicio, kiu saviĝis el la danĝero ĉe Jeba, kaj lia kolego Li Ĉinĝjan, en savvestoj kaj kun sako de oksigeno, sin fermis en her-

metikan boaton, multe fortikigitan kaj protektitan per aŭtaj aertuboj, por trapasi la Supran Tigrosaltan Montgorĝon.

Tuj post kiam la hermetika boato flosis en la ĉefan fluon, la torento ĝin rapide forportis kaj puŝis ĝin rekte sur la rokon, kion la boato tamen eltenis. Poste ĝi ruliĝis en la okcidentan fluon kaj trapasis la unuan falakvon. La hermetika boato kuris antaŭen ruliĝante en la torento kaj sekure trairis la duan falakvon, sed en ĝia trapaso de la tria falakvo rifo faris al ĝi breĉon, kiun la veturantoj tutforte ŝtopis per sia korpo. Tiel ili fine trapasis la trian falakvon. Kvin minutojn poste, iliaj kolegoj surbordigis la boaton ĉe malsupra granda akvokirlo. La ekspedicianoj unuafoje trairis la faŭkon de la Tigrosalta Montgorĝo.

La 11-an de septembro, ankaŭ Ŭang Jan kaj Li Dafang de la ĉina ekspedicio sukcese trapasis la Supran Tigrosaltan Montgorĝon.

La sekvantan tagon, la hermetika boato de la lŭojang-a ekspedicio rompiĝis en trapaso de Mantjanŝing-montgorĝo kaj la Meza Tigrosalta Montgorĝo. Du flosantoj enakviĝis, unu saviĝis kaj la alia malaperis.

La 24-an de septembro, Ŭang Jan kaj Jan Ke sturmis la Malsupran Tigrosaltan Montgorĝon en la hermetika boato. Dum la flosado kolizioj faris al ĝi du breĉojn. La flosantoj obstine luktis kaj fine trapasis la pasejon. Tio anoncis komencan venkon de la ekspedicio super Jangzi-rivero.

SUKCESOJ EN SCIENCA ESPLORADO KAJ EKSPEDI- CIADO

Ĝuste kiam la ĉina ekspedicio kaj la lŭojang-a ekspedicio tra-

pasis la Tigrosaltan Montgorĝon, venis la informo, ke la Ĉina-Usona Flosa Ekspedicio malsukcesis en la flosado. La 21-an de julio, la ekspedicio komencis sian flosadon ĉe la river-fonto de Jangzi. Ĉio iris glate en la postaj pli ol tridek tagoj. Sed kiam la ekspedicio atingis Jeba, kie la ĉina ekspedicio kaj la luoja-a ekspedicio siatempe renkontis grandan malfacilon, ĝi suferis gravan malsukceson. Kvankam ne okazis al ĝi morto, tamen unu el ĝiaj veturiloj estis serioze detruita kaj aliaj tri parte difektitaj. Tial la ekspedicio ne povis flosi plu kaj anoncis sian retiriĝon el la flosado.


Post trapaso de la Tigrosalta Montgorĝo la ĉina ekspedicio kaj

la luoja-a ekspedicio glate trafiosis la malsupran parton de Ĝinŝa-rivero, trapasis la provincojn Siĉŭan, Hubej, Hunan, Ĝjangŝji, Anhuj kaj Ĝjangsu kaj fine atingis la enfluejon de Jangzi-rivero respektive en la 13-a kaj 25-a de novembro 1986. Tiel per venko finiĝis la grava ekspediciado dum pli ol 150 tagoj.

Akiris ĝojigan rikolton ankaŭ la scienc-esploraj laborantoj, kiuj iris al la fonta loko de Jangzi-rivero kune kun la membroj de la ĉina ekspedicio kaj faris penigan sciencan esploradon laŭ la bordoj de la rivero. Ili plenumis la esplorojn kun temoj: "Pri la fonto de Jangzi-rivero", "Pri la riverujo de Ĝinŝa kaj la tersur-

faco kaj naturaj katastrofoj de montregionoj ĉe ĝi", "La formiĝo kaj tipoj de la danĝeraj pasejoj de la Tigrosalta Montgorĝo", "Scienc esploro pri Liĝjang-regiono", "Pri ekspluato de akvaj riĉfontoj de Jangzi-rivero", "Pri hidrologio kaj geologio de Jangzi-rivero", "Pri vivaĵoj de altebenaĵo", k. a. En la supra baseno de Jangzi-rivero sciencistoj kolektis pli ol mil specimenojn de vivaĵoj kaj unuafoje trovis fiŝojn en la riverfonto de Jangzi, kun alteco de 4 800 m. super la marnivelo. Krome, sciencistoj ricevis ankaŭ elokventan ateston pri daŭra leviĝo de la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo, la plej juna en la mondo. □

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Ĉinghaj-provinco
2. Siĉŭan-provinco
3. Junnan-provinco
4. Hubej-provinco

5. Hunan-provinco
6. Ĝjangŝji-provinco
7. Anhuj-provinco
8. Ĝjangsu-provinco

9. Sanhajo
10. Gujĝoŭ-provinco
11. Ŝandong-provinco
12. Suĝoŭ




La ekspedicio ĉe la fonto de Jangzi-rivero

Ji-nacieca ekspedicianino Ĝjihu Aŝa




Ŭang Jan, estro de la Ĉina Flosa Ekspedicio de Scienco Esplorado pri Jangzi-rivero





Flosado sur Ginja-rivero

Foto de CEN GJE



En flosado



Post boat-renversiĝo ekspedicianoj luktas kun torento. Foto de ĈEN ĜJE

Hermetika boato en torento



Rememoro pri Ŭang

Lujan kaj V. Eroŝenko

Ŭang Lujan estas mia kuzo, filo de frato de mia patrino. Ŭang Heng estis lia antaŭa nomo kaj Lujan lia plumnomo. Li naskiĝis en 1901 kaj estas pli aĝa ol mi je ok jaroj. Lia familio estis malriĉa, ĉar mia onklo estis ordinara komizo, tial li ne povis fini sian studon en elementa lernejo. Tamen li estis saĝa, diligenta, lernema kaj genia en muziko. En sia infaneco li ellernis ludi biron kaj *erhuon* (ĉina dukorda muzikilo ludata per arĉo). Mi ŝatis la de li luditan malĝojan muzikon jam de la infaneco. Mia kuzo ofte loĝis ĉe mia familio en sia infaneco. En sia 17-18-jara aĝo li foriris de sia hejmloko Ningbo por lerni metion en Ŝanhajo kaj de tiam li ekmigradis foren por la tuta vivo.

En la sekvanta jaro, post kiam Lujan veturis al Ŝanhajo, mia patro, fameta ĉinmedicina kuracisto, kune kun mi veturis al Pekino por tie labori. Post kiam ni ŝipveturis en Ŝanhajon, mia kuzo kune kun ni trajne veturis al Pekino kaj loĝis en la sidejo de la Samlokana Ligo de Ningbo. Mi ekvizitis la elementan lernejon dum Lujan partoprenis en la labora-lerna interhelpa societo kaj ĉeestis al la lekcioj en la Pekina Universitato. Mi ne scias, ĉu li eklernis Esperanton en Ŝanhajo, tamen estas certa, ke li neniam sciis fremdan lingvon antaŭ metilernantiĝo. En Pekino lia modesta vivo tute dependis de sia laboro, sed estis



Eroŝenko (staranta kun bastono), Ŭang Lujan (maldekstre staranta) kaj aliaj ĉinaj esperantistoj en 1923

mirinde, ke li ellernis Esperanton en malpli ol duonjaro, en la Pekina Universitato.

En 1921, pro neadaptiĝo al la malvarma klimato en la nordo mia patro veturis al Ningbo. Mi restis kune kun mia kuzo en la loĝejo de la Esperanta lernejo en

Pekino, kie loĝis multaj esperantistoj kaj progresemaj gejunuloj. Mia kuzo inklinitis al nova pensfluo. Tiutempe, oni proponis ke la knabinoj portu mallonge tonditan hararon, tamen mi ŝatis mian longan harligon kaj rifuzis lian admonon. Li do post-

kuris min kaj, kaptinte min, for-
tondis mian karan harligon.
Kvankam mi ploris de tio, tamen
de tiam ne portis plu longan
harligon.

Mia kuzo estis bone klerigita
dum li ĉeestis al la lekcioj de
Lusin en la Pekina Universitato.
Krome li havis plian kontaktigon
kun sinjoro Lusin, tial li poste
fariĝis fama verkisto kaj tradu-
kisto.

En 1922 kaj 1923 rusa blinda
poeto V. Eroŝenko instruis
Esperanton en la pekina Espe-
ranta lernejo. Mia kuzo funkciis
kiel lia asistanto kaj interpre-
tisto. La humanisma ideologio de
V. Eroŝenko grave influis mian
kuzon. Tio pliigis lian amon al
Esperanto kaj plifirmigis la deci-
don sin dediĉi al ĝi. La laboro
ĉe Eroŝenko multe levis lian
Esperantan nivelon. Li elespe-
rantigis multajn eminentajn lite-
raturaĵojn de Rusio kaj Orienta
Eŭropo en la ĉinan lingvon, kiaj
"Hebreaĵ Rakontoj", "Noveloj de
H. Sienkiewicz", "Portreto" de
V. Gogol de Rusio, novelo
"Konfeso" de Kroatio, "Kolekto
de Mondaj Noveloj" k.a. Li
multe kontribuis al la kultura
interŝanĝo de Ĉinio kaj aliaj lan-
doj kaj al la Esp-movado, kaj
ankaŭ al la disvolviĝo de la nova
literaturo de Ĉinio.

V. Eroŝenko estis tre fervora
al la ĉina Esp-movado. Tiam, li
ĉiutage rikiŝe veturis al la Espe-
ranta lernejo kaj mi helpis lin en
la sur- kaj derikiŝiĝo. Ifoje mi
ankaŭ kune kun li ekskursis ali-
loken. Tiam, Lujan estis nur
pli-ol-20-jara, dum V. Eroŝenko
pli aĝa ol li je ĉ. dek jaroj. Ta-
men la blindulo aspektis kiel
bonkora 50-jarulo. V. Eroŝenko
estis altstatura, kun longaj hel-
flavaj bukloj kaj lipharoj. Mal-
graŭ liaj sulketoj sur la frunto
kaj cerbumema mieno, li ĉiam

estis afabla kaj rideta. Liaj bluaj
okuloj senĉese moviĝis, tial estis
malfacile rimarki lian blindecon.
Li en malnovaj simplaj vestoj
kaj estis nek fumema nek drin-
kema. Li simple vivis kaj ŝatis
nur tomatojn kaj terpomojn.
Tagmeze mi kaj Lujan akompa-
nis lin tagmanĝi en la Esperanta
lernejo. Mi scipovis nur simplan
Esperantan konversacion, tial mi
ne povis flue interparoli kun li
same kiel mia kuzo. Li ja sin-
cere prizorgis min. Lia dolĉa ri-
deto, specialaj gestoj, varmeta
mano karesinta mian kapon, ĝis
hodiaŭ klare restas en mia me-
moro.

Same kiel mia kuzo, V. Ero-
ŝenko estis pasia en muziko.
Portante sian bivon Lujan mi-
gradis aliloken, dum V. Eroŝen-
ko ĉiam portis sian liuton simi-
lan al la ĉina bivo en la formo.
La de ili luditaj melodioj estis
same malĝojaj. Iuvespere, nelon-
ge post la atingo de la Esperanta
lernejo, portante sian liuton li
veturis, kune kun mi en rikiŝo,
al la Dua Civitana Vesperlernejo
de la Pekina Universitato, por
ĉeesti amuzan vesperon. Kiam
komenciĝis la programo, li aten-
te aŭskultis kun viglaj okuloj.
Pro emociiĝo, li suriris sur la
podion, kaj mem ludis sian mu-
zikilon kaj bele kantis. Diman-
ĉe li, mia kuzo kaj mi kune vizi-
tis parkojn kaj la pitoreskejojn
en okcidenta montaro de Pekino.

Post unujara instruado en la
Esperanta lernejo, pro nostalgio
V. Eroŝenko forlasis Pekinon
kun sia muzikilo. Ankaŭ mia
kuzo foriris de Pekino en la
somerfino aŭ aŭtunkomenco de
1923. Li ĉie migradis kaj perdis
la kontakton kun mi kaj liaj
familianoj de la hejmloko. Oni
diris al mi poste, ke en 1933 li
revenis al sia hejmloko. Tamen,
mi ne vidis lin, ĉar tiam mi jam

edziniĝis kaj loĝis en iu insuleto
de Ĝouŝan-insularo. Post aliaj
pli ol dek jaroj, mi eksciis el
malnova ĵurnalo, ke li mortis de
malsano en 1944 en la urbo Guj-
lin de Gŭangŝji. Mi informiĝis
ankaŭ, ke li ĉiam persiste propa-
gandis kaj disvastigis Esperan-
ton en malfacilego kaj mizero.
Estas korŝire por mi, ke la long-
tempa malriĉeco kaj pulmomal-
sano forrabis lian vivon.

Post mia disiĝo kun V. Ero-
ŝenko en Pekino, mi neniom plu
sciis pri li. Mi ĉiam profunde
sopiras al tiu sincera amiko de
la ĉina popolo. Ĉiufoje kiam mi
rememoris mian kuzon, liaj pa-
roloj kaj ridetanta vizaĝo ekŝve-
bis en mia memoro. Estis
sovetia ĉinologo, Dragunov
Aleksandr Aleksandroviĉ, kiu
multjare laboris en Ĉinio antaŭ
la Liberiĝo de nia lando kaj sin
okupis pri esploro pri Lusin,
plurfoje skribis al mi de 1956 ĝis
1960, informiĝinte ke Lujan estis
mia kuzo. En 1960 li ankaŭ sen-
dis al mi foton de V. Eroŝenko,
Lujan kaj aliaj ĉinoj. En sia letero
li diris, ke la foto estis trovita
en la antaŭa loĝejo de V. Ero-
ŝenko en Ukrainjo. Li petis min
sciigi lin, kie oni faris tiun foton
kaj kiuj estas la homoj sur la
foto. Mi tuj respondis. En la
foto, V. Eroŝenko kun modesta
mallonga surtuto staras en la
mezo kaj ambaŭflanke de li sta-
ras dek homoj ĉiuj en robo. Be-
daŭrinde, mi ne kopiis la foton.
Tio estis la unua fojo por mi vidi
la foton de mia kuzo kaj V. Ero-
ŝenko, post 37-jara disiĝo kun
ili.

La kuranta jaro estas la 43-a
datreveno de la morto de Lujan
kaj la 35-a datreveno de tiu de
V. Eroŝenko. Ni ne devas forge-
si la kontribuojn de tiuj pioniroj
al Esp-movado, kiam ni celebras
la 100-an jubileon pri la naskiĝo
de nia lingvo. □

Unu plia solida briko

En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj, kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitajn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekompencas pro la kontribuadoj per niaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj metiartaĵoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kritikoj de la recenzantoj.

La Red.

GERMANA ANTOLOGIO (763 — 1700 p.K.) tradukita de Wilhelm Herrmann kaj Helmut Rössler, redaktita de Ortwin Brodt, eldonita de Bleicher Eldonejo. Formato: 12 × 19 cm. 327 p. Prezo: 31.50 gld.

La apero de la Germana Antologio ŝtopis la longe sentatan breĉon en la Esperanta literaturo kaj refoje rimarkigas al ni la daŭrigindan tradicion de eldonado de antologioj. Mi ĵetis ĉiokaze retrospektivan rigardon al la eldonado de antologioj en Esperanto, kaj konstatis, ke tiu afero komenca de Kabe per sia modesta Pola Antologio en 1906 bone progresas. Antaŭ la Dua Mondmilito aperis entute 7 antologioj, nome la pola, la kataluna (1925), la bulgara (1925), la hungara (1933), la ĉeĥoslovakia (1935), la sveda (1935) kaj la svisa (1939). Post la milito aperis la aŭstria (1953), la angla (1957), la Esperanta (1958), la volumo 1949 — 1959 de la Ĉina Antologio (1960) kaj ĝia alia volumo 1919 — 1949 (1986), la dana (1961), la slovaka (1977), la makedona (1981), la novaj pliamplek-

igitaj Hungara Antologio (1983), Esperanta Antologio (1985) kaj la Germana Antologio (1985). Se ni enkalkulas ankaŭ la Antologion de Brazilaj Rakontoj (1953), la Antologion de Portugalaj Rakontoj (1958) kaj Antologion de Argentinaj Noveloj (1979), ni ricevas entute 14 volumojn. Estas rimarkinde, ke komenciĝis la tendenco eldoni antologiojn el pluraj volumoj, kiel oni faris pri la Ĉina Antologio. Laŭ la antaŭparolo de la Germana Antologio, ĝia “dua volumo ampleksanta la germanan literaturon ekde la racionalismo ĝis la nuntempo estas planita”. Ĝia unua volumo estas unu plia solida briko aldonita al la konstruo de la Esperanta literaturo. Mi esperas, ke baldaŭ jam aperos la planita dua volumo.

Per tiu 327-paĝa unua volumo de la Germana Antologio, oni prezentas al ni riĉan kaj varian serion de elektitaj pecoj el la germana literaturo en la frua periodo 763 — 1700 p.K. Ni povas legi en ĝi “La Hildebrand-kanton” el la fruĝermana epoko, pri duelo inter patro kaj filo, belajn amkantojn el la tempo de la trobadoroj, fragmentojn interligitajn per necesaj klarigoj el la longa eposo “Parsivalo” el preskaŭ 25 000 versoj, parton de “Sendletero pri la tradukado” de M. Luther, eseon de G. W. Leibniz “Pri justeco” kaj rakontojn spicitajn per sprito kaj humuro. Kompreneble, oni ne povas enpremi ĉiujn legindaĵojn de la dirita periodo en tiun 327-paĝan volumon, kaj cetere estas neeble kontentigi ĉiujn kun diversaj gustoj preferataj. Germana amikino konfirmis la aserton de la eldonintoj,



“Germana Antologio”

ke la antologio estas utila eĉ por germanaj esperantistoj, ĉar “sen temporaba lingvistudado ili ne plu komprenas la arkaikan germanan aŭ latinan lingvon de la tekstoj verkitaj dum la unuaj ok jarcentoj”.

En ligo kun la elektitaj verkoj, oni aldonis sufiĉajn notojn pri la germana literatura historio. Tio estas tre bonvena, ĉar sen kono de la historia fono oni foje ne povas bone kompreni specifajn verkojn. Bedaŭrinde, oni ne donis biografiajn notojn pri la aŭtoroj je la fino de la libro, kiel oni faris al la Ĉina Antologio. Tiaj notoj povus helpi la legantojn koni la verkintojn kaj trajtojn de la germana literaturo en la koncerna periodo.

La lingvo de la traduko estas bonstila kaj spicita per freŝaĵoj.

Menciinda estas la elizio de "e" en "d" okulaj briloj" (p. 187, oka linio). Ŝajnas al mi, ke tio estas akceptebla pro metrika bezono. Kompreneble, oni devas zorgi pri evito de miskompreno okaze de uzo de tiu licenco. La preso estas eleganta kaj enŝteliĝis al la tekstoj nur tre malmultaj preseraroj. Entute verko havinda por ĉiuj legemuloj.

Recenzis **LAŬLUM**

NOVE RICEVITAJ LIBROJ

ESPERANTO LERNOLIBRO DE LA INTERNACIA LINGVO daŭriga kurso laŭ la Zagreba metodo, verkita de Jim Cushing, Spomenka Stimec, Nikola Rašić kaj Zlatko Tišljar, eldonita de Internacia Kultura Servo. Formato: 14.5×20.5 cm. 41 p. Prezo ne montrita.

LOGKULTURO DE STJEPAN PLANIĆ esperantigita de Lucija Borčić, eldonita de Radničko sveučilište "Božidar Maslarić". Bele ilustrita verko pri arkitekturo. Formato: 20×24 cm. 46 p. Prezo ne montrita.

CU RAKONTI NOVELE krimnoveloj originale verkitaj de Johan Valano. Eldonita de Flandra Esperanto-Ligo. Formato: 14.5×21 cm. 144 p. Prezo: 20 gld.

KIAMANIERE DISTINGI LA FUNGOJN? de Mario Simondetti, esperantigita de Giovanni Barbieri. Al la itala kaj Esperanta tekstoj aldoniĝis ilustraĵoj. Formato: 14.5×21 cm. 62 p. Prezo: 15 gld.

PLUPO KAJ LA MARO de Inga Borg, esperantigita de Malte Markheden. Bildrakonto kolore ilustrita por infanoj. Formato: 15.5×16 cm. 26 p. Prezo ne montrita.

PLUPO KAJ LA GRUOJ de Inga Borg, esperantigita de Malte Markheden. Bildrakonto kolore ilustrita por infanoj. Formato: 15.5×16 cm. 26 p. Prezo ne montrita.

PLUPO KAJ LA LUPO de Inga Borg, esperantigita de Anna-Maria Lange. Bildrakonto kolore ilustrita por infanoj. Formato: 15.5×16 cm. 24 p. Prezo ne montrita.

LA POKALO EL BLANKDIAFANA PORCELANO romano de Takeyama Mitio, esperantigita de Zin Kiyosi, eldonita de MEROS, 1986. Formato: 18×26 cm. 134 p. Prezo ne montrita.

MINI ROZMOWKI ESPERANCKIE de Andrzej Pettyn kaj Alina Wojcik. Konversacia poŝlibro por poloj, eldonita de Wiedza Powszechna. Formato: 10×14 cm. 95 p. Prezo: 80 zlotoj.

ESPLORADO DE VIVĜOJO de Hidemaru Deguĉi, eljapanigita de Eizo Itoo, eldonita de Tenseiŝa. Formato: 14.8×21 cm. 203 p. Prezo: 25 gld.

POR KOMENCANTOJ

PAPAGO

Papago vivis en la sudo. Iu sudano ĝin kaptis kaj pritondis ĝian langon rondaforma por ĝin paroligi home. Iom post iom ĝi vere povis tion fari. Tamen ĝi ellernis nur kelkajn simplajn vortojn. Ĉiutage ĝi ripetas nur la samon.

BANKEDO DE PASERO

Iutage pasero invitis alcedon kaj aglon al bankedo. La pasero diris al la alcedo: "Vi, en tiel brilkolora vesto, kompreneble devas sidi sur la honora loko." Tuj poste ĝi turnis sin al la aglo kaj diris: "Kvankam vi estas iom pli granda tamen vi vin vestas ĉifone, tial mi petas vian pardonon, ke vi sidu sur tiu modesta loko." La aglo kolere diris: "Kial vi, lakeo, tiel maljuste traktas min?" La pasero diris: "Kiu ne scias, ke

Iutage cikado ĉirpis en la korto. Aŭdinte la ĉirpadon, la papago ridis moke. Tiam la cikado diris al la papago: "Estas ne malbone, ke vi povas paroli home. Tamen vi parolas ne plu en via propra lingvo kaj ne povas paroli laŭ via volo kiel mi!" La papago honte mallevis sian kapon. De tiam ĝi ne plu imitis homan parolon.



mi estas malgrandanima kaj malproksimvida?"

Ĉie troviĝas tiaj homoj, kiuj respektas nur la veston, sed ne la homon. Evidente, ĉiuj tiaj homoj fariĝis el pasero.

NOVA ALBUMO

Vojaĝo tra Ĉinio

Ĉinio kun vasta teritorio kaj historio de 5 000 jaroj havas sennombrajn historiajn restaĵojn. La albumo konigas al vi 23 turismajn urbojn de Ĉinio kaj la Tri Gorgojn de Jangzi-rivero. Ĝi helpas vin koni ĝenrojn, pladojn kun loka gusto, modernajn hotelojn kaj ĉefajn vidindajn lokojn, kiaj la fama antikva ĉefurbo Pekino, la urbo Ŝjjan konata kiel muzeo de la ĉina historio, la "paradizoj" Suĝoŭ kaj Hangĝoŭ, la urbo Gujlin kun pejzaĝoj plej belaj en Ĉinio kaj la urbo Lhasa sur la monda tegmento. Tiuj urboj povas reprezenti la malfermitajn turismajn rbojn de Ĉinio. La albumo estis kompilita de la redakcio de "El Popola Ĉinio" kaj eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Ĝi, 136-paĝa kun 166 koloraj bildoj kaj 25 klaraj turismaj mapoj, bone servos al la vojaĝantoj en Ĉinio kaj havigos al niaj legantoj, kiuj ankoraŭ ne vizitis Ĉinion, belan ĝuon, kvazaŭ ili mem vojaĝus en tiuj lokoj.



Formato: 185 mm. × 260 mm.

Prezo: US\$12,50 £8,80

(85-Es-284p)

**Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Peranto de EPC**

aŭ Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* 46-j kemiistino dez. kor. kun ĉinaj esperantistoj pri diversaj temoj. Helga Ufer, Hans Kollwitz-Str. 2/721, Schwerm, 2760 DDR.

* S-ino Nerina Francisca Brumini

20-j instruistino de angla lingvo interesiĝas pri ĉiuj temoj. Rua Eca de Queiroz 257 apto.4, 04011-Sao Paulo-Sp-Brazilo.

* Nick Fraser, 17-j studento, 38 Collieston Way, Aberdeen, Scotland, Britio, volas korespondi kun geesp-istoj tutmonde.

* Bonvenigu fondon de lerneja klubo: "Unu Mondo". Ni salutis ĉiujn. Reading school, c/o Mr. Mervyn C. Jackson, 17 Uffington Drive, Harmans Water, Bracknell, Berks, Anglio, RC12 3Hp.

* Dez. interŝanĝi t.m. monerojn, banknotojn, neuzitajn pm-jn kaj utk-jn pri Esperatno, floro, faŭno, arto, ktp. Interesiĝas pri landoj, popoloj fremdaj lingvoj, literaturo, ktp. S-ano Sebastiao Pereira, Rua Jose de

Farias, 4-Mustardinha, 50760 Recife, Brazilo.

* 24-j Molnar Eniko interesiĝas pri skiado, turismo, legado kaj muziko. Adr.: 3731 Bors, Str. Principala, n-ro 161, Jud: Bihor, Rumanio.

* S-ino Eva Feriancova (28-j), Volgogradska 29/42, 036 08, Martin 8-Priekopa, ĈSSR, dez. kor. pri lingvoj, kudrado, plektado, fotado, pk, birdoj, novaj moneroj, pop-muziko kaj fason-vesto-magazinoj, Esperante, germane, ruse, bulgare kaj angle.

* 11-j knabo dez. kor. kun sam-aĝuloj. Jeremy Bierbach, 1424 Mohican Drive, Pittsburgh PA 15228, Usono.

* 32-j Jan Arendarczyk, Plac Wolnosc 13/3, 58-420 Lubawka, Pollando, dez. kor. tutmonde.

Generale ni kolektas materialojn por la rubriko "Esp-novaĵoj" de la sekvanta numero antaŭ tri monatoj. Pro tio ni atentigas diversajn E-organizaĵojn kaj niajn legantojn, ke ili sendu al ni informojn pri Esperantaj agadoj, kiujn ili deziras aperigi en EPC, nepre antaŭ la deka de ĉiu monato. En la pasinteco ni ne aperigis tiujn informojn, kiujn ni opiniis malfruaj.

La Red.

MEMORIGA POŝTMARKO POR LA CENTJARIĜO DE ESPERANTO EMISIOTA EN ĈINIO

La ĉina revuo "Filatelo" informis, ke la 26-an de julio la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisios poŝtmarkon memore al la centjariĝo de Esperanto.

NOVAJ ESP-ORGANIZOJ

Post la 71-a UK aperis novaj Esp-organizaĵoj en provincoj, urboj kaj gubernioj de Ĉinio. La 4-an de oktobro pasintjare, en Harbin, la ĉefurbo de Hejlongĝjang-provinco, fondiĝis la Hejlongĝjang-a Junulara Esperanto-Asocio, kiu estas la unua tiaspeca Esp-organizaĵo en la ĉinaj provincoj. Ŭenĝoŭ-sub-

provinco de Ĝeĝjang, Ĝiŭĉjŭan-subprovinco de Gansu, Hŭang-gang-subprovinco de Hubej kaj Nanjang-subprovinco de Henan kaj la urboj Hŭajhŭa kaj Hengjang de Hunan-provinco ekhavis siajn Esp-organizaĵojn. Krome, ankaŭ Ŝjifeng-gubernio de Ljaŭning, Tjanmen-gubernio de Hubej kaj Ŝinjang-gubernio de Henan starigis Esp-organizaĵojn. Ĉiuj tiuj Esp-organizaĵoj ricevis subtenon de la loka registaro kaj sociaj rondoj.

ESPERANTO-KURSO EN LA HUHHOTA RADIO

Memore al la centjariĝo de Esperanto, la Esperanto-Asocio de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kaj la Huhhota Radio funkciigas elementan kaj mezgra-

dan Esp-kursojn, en kiuj lernas multaj mongolaj gejunuloj.

LA UNUA KURSO DE ĈKEI FINITA

Post unu kaj duona jaroj 9 100 lernantoj de la Ĉina Koresponda Esperanto-Instituto (ĈKEI) jam finis sian lernadon. Okazis la ferma ceremonio en Pekino la 23-an de novembro 1986 kaj multaj elstaraj lernantoj estis premiitaj. Ĝin ĉeestis la honora rektoro Hŭang Naj, rektoro Li Ŝiĝjun kaj Ĝang Ĉjiĉeng, ĝenerala sekretario de ĈEL, kaj donis parolon al la lernantoj, ke ili daŭre lernu nian lingvon kaj kontribuu al la ĉina Esperanto-movado kaj la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj aliaj landoj. Krome, la 7-an de decem-

Premiado al elstaraj lernantoj de la unua kurso de ĈKEI en la ferma ceremonio





La fondkunveno de la Nanyang-a Esperanto-Asocio de Henan

bro 1986 iris en Pekino la inaŭguro de la tria kurso de ĈKEI.

INTERNACIAJ AKTIVADOJ OKAZONTAJ EN ĈINGDAŬ

Kurantjare en la bela ĉina marborda urbo Ĉingdaŭ okazos la unua bier-gustuma aktivado kaj la dua internacia fiŝhokado. Dume

la Ĉingdaŭ-a Esperanto-Asocio aranĝos Esperantan aktivadon kaj favoros turistojn per sia servo. La bier-gustumado daŭros de la 5-a ĝis la 15-a de julio. Tiam la turistoj povos ĝui, krom la famaj Ĉingdaŭ-biero, minerala akvo de Laŭŝan kaj Laŭŝan-kokakolo, ankaŭ diversajn etmanĝaĵojn kun loka


gusto, vidindaĵojn, popolajn kantojn, dancojn kaj akrobataĵojn, i.a. fari komercan traktadon. La fiŝhokado daŭros de la 12-a ĝis la 15-a de oktobro. Interesitoj skribu al: Ĉingdaŭ-oficejo, Ĉina Internacia Turisma Servo, Qingdao, Ĉinio

EL LA PROGRAMOJ DE GDREA POR LA JUBILEAJARO

Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA) havas sian planon por la centjariĝo de Esperanto. Laŭ la informo de d-ro Detlev Blanke ni aperigas jenajn detalojn.

1. Aperos speciala poŝtmarko, unuataga koverto kaj porokazaj stampoj.
2. Aperos represo de la germanlingva broŝuro "Esperanto kaj Scienco" (Esperanto und Wissenschaft), kiu pruviĝis tre taŭga informilo por sciencistoj, aparte lingvistoj kaj scienc-aplikantoj.
3. Aperos speciala numero de la organo de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA), "der esperantist", kiu enhavos superriardon pri Esperanto en teorio kaj praktiko kaj pri GDREA.
4. La tradicia Internacia Foira Esperan-

La Esperanto-Asocio de Ĉampina Grande, Brazilo, en parado okaze de la Nacia Tago de Sendependado



La Tutmonda Kvadrilo el esperantistoj de Ĉampina Grande, Brazilo, kiuj en diversnaciaj vestoj prezentas ĉiujare en tradiciaj festoj por diskonigi Esperanton.



ŬANG JANPING

“RUGAJ ŜUOJ”



Ŭang Janping

tista Renkontiĝo okazonta tuj antaŭ la mondfama Internacia Foiro de Lepsiko, t.e. de la 13-a ĝis la 15-a de marto 1987, havos la kadrano temon “Cent jaroj de Esperanto, lingvo de interpopola kompreniĝo”. Ĝi estas la centra solema internacia aranĝo de GDREA dum la jubilea jaro (vidu la bulleton). Ĉi tiu aranĝo okazos sub la aŭspicioj de la UNEKO-Komisiono de GDR; 5. Okazos du centraj gazetaraj konferencoj en Berlino kaj Lepsiko; 6. Ankaŭ la VI-a Centra Konferenco de GDREA, kiu elektos novan estraron de la asocio, okazos de la 3-a ĝis la 5-a de aprilo 1987, sub la signo de la jubileo; 7. En la gazetaro kaj fakaj ĵurnaloj, laŭ aparta plano, aperos superrigardaj studoj kaj informoj pri Esperanto; 8. Fine de la jaro 1987 GDREA okazigos internacian seminarion pri la temo “Al la dua jarcento: strategiaj demandoj de la evoluo de Esperanto kaj ĝia lingvo-komunumo”; 9. Dum julio 1987 la porjunulara (lerneja) redakcio de Radio GDR disaŭdigos programon pri Esperanto; 10. En Wehlen ĉe Dresden, kie restadis L.L. Zamenhof dum la jaro 1908, oni inaŭguros memortabulon okaze de la 100-jariĝo de Esperanto.

NOVA ELDONAĴO EN ARGENTINO

“La Nova paradigmo en Psikologio” verkita de Rubén Feldman Gonzalez, la unua prezidinto de la Argentina Esperantista Junulara Organizo kaj kunfondinto de la Pasporta Servo de TEJO (1966), estas originale hispanlingva verko, publikigita de Paidós, Bonaero, Argentino, tradukita en kelkajn lingvojn (la anglan, nepalan, ĉinan ktp.). La libro traktas pri nova observado (Unuiga Perceptado) valida por estonta revolucio en ĉiutaga vivo, edukado kaj psikoterapeŭtiko. Ĝi resumas universitatajn kolokvojn en 14 landoj de Norda kaj Latina Ameriko kaj Eŭropo dum kvin jaroj. □

Atente trapasinte vicon da gasboteloj kaj senordaj objektoj en la koridoro, mi eniris en ŝian ĉambron de dekkelkaj kvadrataj metroj. Tamen ĝi estis artisme meblita. Tio draste kontrastis kun la senordeco en la koridoro.

En la ĉambro staris ŝranko kun diversaj artaj ŝuoj, kiujn la mastrino alportis el landoj, en kiuj ŝi turneis. Kiam mi sidiĝis, ŝi metis antaŭ min cindrujon. Ĝi estis porcelana ŝuo! Oni ne scias, de kiam ŝi ekhavis tiel intiman rilaton kun ŝuoj.

Jen nia interparolo komenciĝis de ŝuoj.

En la aĝo de 9 jaroj, ŝi ekhavis sian propran paron da baletŝuoj. Ĝi estis donacita de onjo en baleta trupo. Oni ne scias, kial la onjo donacis al ŝi la ŝuojn. Ĉu pro tio, ke ŝi de tempo al tempo aperis ĉe la pordo de la ekzercejo de la trupo, kun pieca mieno? Aŭ pro tio, ke ŝiaj okuloj siatempe radiis de pasia inklino al baletoj? Aŭ. . . Estis tute egale, ke fakte ŝi havis verajn baletŝuojn! Estis unusola manko, ke la ŝuoj estis tro grandaj. Malgraŭ tio, ŝi sur-

metis la ŝuojn, imite ekstaris sur la piedpintoj, piruetis kaj ekzercis sin apogante sur stango.

Ili fariĝis ŝiaj “ruĝaj ŝuoj” neniam demetebaj!

11-jara, ŝi sukcesis en ekzameno por eniri en la Pekinan Dancan Instituton. Diplomite, ŝi fariĝis aktorino de la Ĉina Baleta Trupo, la plej renoma en Ĉinio. En la dekkelkaj jaroj ŝi rolis preskaŭ en ĉiuj eksterlandaj elstaraj baletoj, kiujn oni ludis en Ĉinio, ekzemple “Donkiĥoto”, “Giselle”, “Cigna Lago”, “Preludo” kaj ĉinaj baletoj “Ruĝa Virina Taĉmento”, “Benopeta Ofero” kaj aliaj.

Parolante, ŝi ĉiam direktas la okulojn antaŭen, nemalproksimen. La linioj de ŝia vizaĝo klara, kvazaŭ skulptitaj, vidigas persistemon kaj firman volon. Sed ŝiaj okuloj aspektas trankvilaj kaj nebulecaj, kvazaŭ portante delikatan melankolion.

Tia melankolio estas komuna ĉe tiuj, kiuj strebas al la kerno de arto. Ĝi estas movoforto por artisto kun firma karaktero. Fakte, ĝi esprimas strebadon al pli alta etapo de arto.


KAJ ŜIAJ

De la unua tago, kiam ŝi komencis lerni en la instituto, ŝi jam decidis malfermi la pordon de baletto, la "kruela arto", kiel ĝin nomis la sovetia baleta majstrino Galina Ulanova. Por atingi pli altan nivelon en la arto ŝi sin ekzercis ofte ĝis rompiĝo de piedungoj kaj sangado de la piedfingroj.

La patro de Ŭang Janping estas dramaktoro. Eble sub la influo de sia patro, ŝi havas grandan intereson roli en baletto de diversaj stiloj kaj krei rolojn de malsamaj karakteroj. Ŝi ĉiam aspiregas ludi novan rolon. Nova rolo ĉiam vekas ĉe ŝi la tutan entuziasmon de kreado.

El la forta aspiro rezultis ŝia mirinda ludarto. Foje ŝi ludis la rolon de hinda dancistino virga kaj bonkora en la baletto "Dancistino". Kiam la perfida amato de la dancistino edziĝis, ŝi dancis en la nupto kaj estis mordita de vipuro. Ŝi ne falis tuj, sed faris plian pirueton. Per sia ekstra movo ŝi faris multe pli kortuŝa la indignon de la dancistino antaŭ la morto.

Ŭang Janping estas knabino



*Sceno el la baletto "Benopeta Oferto"
kun Ŭang Janping kiel ĉefrolulo*

kvieta. En Britio kaj Sovetunio, kiam ŝiaj kamaradoj ekskursis, ŝi sola legis en ĉambro dum kelkaj ĥoroj. Sed sur scenejo, ŝi pasie dancis pretervole.

En la "Preludo" direktata de fama usona koregrafo-reĝisoro B. Stevenson ŝi montris superban kapablon de kreado de rolo, kion li laŭdis foje refoje. Tio estis tre malfacila moderna baletto. Per kunigo de klasika ba-

leta tekniko kun la movoj liberaj, facilaj kaj graciaj de la moderna baletto, ŝi kaj ŝiaj kamaradoj plene esprimis delikatajn kaj kompleksajn sentojn de paroda junaj geamantoj malfacile esprimeblajn per vortoj.

Post "Preludo" ia maltrankvilo kaptis ŝin. Ŝi senpacience serĉis novan rolon kaj novan stilon. Tial la melankolio denove envolvis ŝin. □



NOVA LIBRO EI
FENIKSA LIBRARO:

TAJĜIĈJŬAN

Tajĝiĉjŭan estas unu el la specoj de la ĉina luktarto. Ĝi havas historion de pli ol 300 jaroj. La praktikado en la lastaj jarcentoj pruvis, ke tajĝiĉjŭan estas grava rimedo por sanigo kaj preventado de malsanoj. Multaj opinias, ke, krom plifortigo de la korpo, ĝi ankaŭ donas tre bonan efikon por kuraci hipertension, ulceron, kormalsanon, ftizon ktp.

La libro detale klarigas al legantoj la fiziologiajn efikojn de tajĝiĉjŭan, ekz. la influoj de tajĝiĉjŭan al la funkcioj de la sistemoj nerva, kardiovaskula kaj spira; la influoj de tajĝiĉjŭan al la ostaro, muskoloj, artikoj; kaj la influo de tajĝiĉjŭan al la metabolo de substancoj en la korpo. Aliaj du artikoloj de tiu ĉi libro respektive prezentas la karakteron kaj esencon de tajĝiĉjŭan kaj la teniĝon de diversaj korpopartoj dum ekzercado, kaj la tri stadiojn de la ekzercado per tajĝiĉjŭan.

La Simpligita Tajĝiĉjŭan, prezentata en tiu ĉi libro, estis rekomendita de la Fizikkultura kaj Sporta Komisiono de la Ĉina Popola Respubliko al la tuta Ĉinio en la kvindekaj jaroj. Ĝi kun movoj facilaj konservas la fundamentan karakteron kaj efikon de la arto. Kun klarigo kaj bildo por ĉiu teniĝo.

Formato: 118 × 184 mm. 70pĝ.

Prezo: £ 1,30 US\$ 2,50

Numero: 17-Es-2065P

Mendu ĉe:

Libroservo de UEA

Perantoj de EPĈ

aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

La pekina opero aperis en la lastaj jaroj de la 18-a jc. en Pekino kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Ĝi estas antikva loka teatraĵo, plej vaste ludata kaj influhava. Ĝi multe asimilis la bonajn trajtojn de pluraj lokaj teatraĵoj kaj fariĝis teatraĵo kunfandiĝinta kun artaj formoj de literaturo, danco, muziko, belarto, *uŝu* (luktarto) kaj karakterizita per brilaj naciaj trajtoj.

La ŝminko de la aktoroj de la pekina opero estas unu el la specialaj artoj de la ĉinaj operoj. La vizaĝo estas ŝminkita per strioj kaj desegnoj en diversaj koloroj. En projekciado, desegnado kaj kolorigo oni devas observi certajn regulojn. En la dinastioj Tang, Song kaj Jŭan oni portis maskon en dancado kaj teatraĵo kaj poste oni rekte kolorigis sian vizaĝon. Per reala skizo kaj simboligo oni montras la aspekton kaj trajtojn de la roloj, kaj laŭ ties trajtoj, vizaĝoj, aĝoj kaj okupoj faras troigon kaj figuron, por pli klare vidigi la karakterojn de roloj, pliigi teatran efikon kaj riĉigi esprimovon de la pekina opero.

En la pekina opero estas kvar specoj de roloj, t.e. *ŝeng*, *dan*, *ĝing* kaj *ĉoŭ*. *Ŝeng* estas rolo de



Pentritaj vizaĝoj de aktoroj en la pekina opero

de ŜIŬ BJAN

viroj. Pro diferencoj inter aĝoj kaj okupoj *ŝeng* dividiĝas en la maljunan, militistan kaj junan. La tiel nomata maljuna *ŝeng* estas rolo maljuna aŭ mezaĝa kun barbo, dum la senbarba estas juna *ŝeng*. La herooj, bravuloj estas nomataj militistaj *ŝeng*. *Dan* estas rolo de virinoj kaj estas dividita en specojn ĝentilan, gajan, militistan kaj maljunan. Inter ili la ĝentila *dan* montras seriozan, ĝentilan virinon junan aŭ mezaĝan. Gaja *dan* — naivan kaj gajan junan knabinon aŭ junan sinjorinon. *Ĝing* estas rolo de viroj bravaj aŭ insidemaj. La militista *ĝing* ludas brave, malĝentile kaj ĉefe per batalo.

Ŝeng, *dan*, *ĝing* kaj *ĉoŭ* havas ĉiu sian pentritan vizaĝon. La vizaĝoj de *ŝeng* kaj *dan* estas pentritaj simple, kun malmulte

da ŝanĝoj. *Ĝing* havas diversajn specajn pentritajn vizaĝojn, t. e. blanka, ruĝa, blua, verda, flava, nigra, ora, arĝenta k. a. Tiuj malsamaj koloroj simbolas malsamajn karakterojn kaj sencojn, ekz. ruĝo montras honestecon kaj lojalecon, blanko — insidemon, flavo — bravecon, bluo kaj verdo prezentas ribelantajn heroojn aŭ diajn kaj monstrajn figurojn. La nigra vizaĝo montras neflekseblecon, la ora kaj arĝenta estas destinitaj por montri diojn. Laŭ strukturo la vizaĝoj povas esti dividitaj en integran, tri-tegolan, krucan, pecetan, nesimetrian, figurecan k. a. La vizaĝoj de *ĉoŭ* dividiĝas en civilan, arlekenan, maljunan kaj militistan.

Integra vizaĝo estas pentrita per unu koloro. Ekz. la rolulo

de la fama generalo de la antikva Ĉinio Ĝuan Ju havas ruĝan vizaĝon, kio devenis de la prikskribo en la romano "Tri Regno", ke lia vizaĝo estas jujubruĝa. Ĝuan Ju estis lojala kaj brava, tial ruĝa koloro fariĝis simbolo de bravaj kaj lojalaj homoj.

Tri-tegola vizaĝo estas farita tiamaniere: Oni kolorigas la frunton kaj la vangojn de la rolulo, ke ili simulu al tri pecoj da tegoloj, rezulte de tio evidentiĝis la kvin sensoroj sur la fono de la tuta vizaĝo.

Kruca vizaĝo estas farita tiamaniere: Oni faras koloran strion sur la glabelo inter la okulkavoj, tiel aperis kruco sur la vizaĝo. Ĝi evoluis de tri-tegola vizaĝo.

Bildo de 13 eminentaj pekin-operaj aktoroj en teatraj kostumoj farita de la fama pentristo Ŝen Jongpu de Ĉing-dinastio je la fino de la 19-a jc.





Sceno el pekina opero: Maljuna ŝeng (maldekstre) juna ŝeng (meze) kaj ĝing (dekstre)

Peceta vizaĝo: Ankaŭ ĝi evoluis de la tri-tegola, tamen sen la ĉefa koloro sur la vangoj, kiun anstataŭis komplikaj strioj kaj koloroj.

Figureca vizaĝo estas uzata ĝenerale por montri spiritojn, diojn kaj monstrojn. Ĝiaj bildoj simbolas la vizaĝajn trajtojn de birdo, besto, fiŝo kaj insekto. Ekz. la vizaĝo de Sun Ukong estas pentrita laŭ la priskribo en la ĉina mita romano "Pilgrimado al la Okcidento". Lia vizaĝo estas keroforma kun pinta buŝo, kuspita nazo kaj harformaj strioj sur la vangoj, kio donas viglan kaj petolan aspekton de simio. Oni tuj komprenas ĉe ekvido, ke li estas transformita el simio.

Ankaŭ dia vizaĝo evoluis de la tri-tegola. Ĝi estas uzata ĉefe por prezenti diojn kaj budhojn. La vizaĝo estas ŝminkita per ora kaj arĝenta koloroj.

Cetere troviĝas ankaŭ sesbloka, nesimetria, sel-forma vizaĝoj k. a.

La pentritaj vizaĝoj donas ankaŭ simolan efekton. Per la desegnoj kaj koloroj de la vizaĝo oni montras la sorton de la rolo, liajn karakteron, kapablon k. a. La pentrita vizaĝo de Baŭ Ĝeng, oficisto de la antikva Ĉinio, estas integra vizaĝo ŝminkita ĉefe per nigra koloro. Tio simbolas lian nekorupteblecon kaj noblecon kaj la lunarko sur la frunto simbolas, ke li estas justa kaj honesta, kiel la luno sur la ĉielo. La kuntiritaj brovoj simbolas lian patriotismon kaj simpatian al la popolo. La pentrita vizaĝo de antikva generalo Meng Ljang estas alia bona ekzemplo. Li kapablis fari brulegon al malamiko per sia fajra kalabaso, tial oni pentras sur lia vizaĝo ruĝan kalabason por montri lian specialan kapablon. La pentrita vizaĝo de Ŝjang Ju, tirana reĝo en la antikva Ĉinio, havis ŝtalan forkon sur si. Pro la obstina memfido li rifuzis ĉian konsilon kaj sin mortigis pro kompleta malvenko. Oni pentris lian vizaĝon funebra kaj

pentris sur la tempioj kaj frunto ĉinajn ideogramojn signifantajn longvivecon, kio tamen simbolas, ke li estos mallongviva. La pentrita vizaĝo de politikisto, strategiisto de la antikva Ĉinio Caŭ Caŭ estas blanka, kio simbolas, ke li lertas maski sian internan mondon per falsaj manovroj. Caŭ Caŭ estis ankaŭ erudicia literaturisto, tiel el lia glabelo vidiĝas lia literatura talento kaj la okuloj ĉiam ridetas, kio simbolas, ke li alte taksas talentulojn kaj ĉiam ĝentile traktas siajn subulojn, tamen el lia rideto elrigardas krueleco, kaj sur liaj lipoj mielo, dum en lia koro malico.

La arto de pentritaj vizaĝoj de la pekina opero komenciĝis en la feŭda socio, kaj pro tio la arto estis katenita de pentrado kaj kolorigo. Kun disvolviĝo de la pekina opero, la figuroj en ĝi fariĝis pli kaj pli multaj kaj ĝiaj intrigoj pli kaj pli interesaj, tial en la novaj historiaj dramoj evoluis ankaŭ la vizaĝoj de diversaj roloj. La pentritaj vizaĝoj vidataj sur la scenejo fariĝis jam specifa arto kaj estas vaste uzataj en pentrado, papertondado kaj farado de metiartaĵoj. La arto estas multe ŝatata de ĉinoj. □

Multan dankon al ĉiuj, kiuj afable sendis al ni salutojn okaze de Novjaro. Kore ni reciprokas iliajn bondezirojn.

La Red.



Militista dan



Maljuna dan

Gentila dan



Gaja dan





Aparta vizaço



Sel-forma vizaço



Blanka vizaço



Tri-tegola vizaço



ĉoŭ



Civila ĉoŭ




Militista ĉoŭ



Figureca vizaĝo



Kruca vizaĝo




Peceta vizaĝo



Maljuna ŝeng



Juna militista ŝeng



Juna civila ŝeng

ZENG ĜŬO:

RESPONDO DE KNABINO



*Ne paradu vian talentofekundon
kiel brua roĵo proksimfunda
amas mi la maron
tiel vastan kaj profundan*

*Ne elverŝu haste 1' sentojn el la koro
ĵetu vian belan vorton
en la tempofornon
por ekzameni ĉu ĝi estas ŝton' aŭ oro*

*La enigm' antikvas, verdas
Se iu demandas, kio amo estas
mi silentos en majesto
Mi tro junas kaj senspertas*

*Mi nur scias, ke inspiras ĝi sublimon
tre sincere oni devas ĝin eldiri
kaj por ĝin akiri
oni devas fajre hardi la animon*

BAJ HANG:

LA AMIKOJ

*Ni havis multe da amikoj
kaj perdis multe da amikoj
Ilian belon aŭ malbelon
mezuras la epokaj ĝojoj kaj tragikoj
La amikeco
ja ne similas al la surfoj, kiuj
frakasiĝas*

*renaskiĝas
L' amika koro
laŭ mia volo
kristale klaru kiel pura roĵo
daŭradu ĉiam kiel sunfavoro*

Esperantigitaj de LAŬLUM

(daŭrigo de p. 59)

ojn al akademiaj konferencoj; gajni al si specialan stipendion kaj subvencion por esploro; sendi specialistojn eksterlanden por esplori, studi kaj sin trejni; inviti oficistojn kaj specialistojn de Unesko al Ĉinio por esplori, fari lekciojn kaj teknikajn konsultojn, subtenate de Unesko funkciigi tutlandajn trejnajn kursojn aŭ organizi internaciajn fakajn kunvenojn, partopreni redaktan laboron de gravaj verkoj, traduki kaj eldoni librojn kaj periodaĵojn

de Unesko k.a. Krome, Ĉinio partoprenis konsiliajn organizojn sub Unesko pri la registaraj planoj, kiaj "Homo kaj Biosfero", "Plano pri Ĝeneralaj Informoj", "Interregistara Oceana Komitato", "Interregistara Sporta Komitato", "Internacia Eduka Buroo" k.a.

Pere de tiuj kunlaboroj, la akademiaj rondoj kaj intelektulaj rondoj de Ĉinio pliiĝis interŝanĝon kun siaj kolegoj de aliaj landoj, kio levis nivelon de akademiaj studoj de Ĉinio. Dank' al

tio la popolo kaj intelektulaj rondoj de Ĉinio pli bone konis la eksteran mondon, pliiĝis amikecon kun ili.

Okaze de la 40-a datreveno de la fondiĝo de Unesko, la Ĉina Nacia Komitato de Unesko organizis celebrajn aktivadojn, inkl. de celebra kunveno ĉeestita de centoj da personoj, tradukis kaj eldonis libron "40 jaroj de Unesko" redaktita de Unesko.

Brilan perspektivon al Unesko! Sukceson al la kunlaboro inter Ĉinio kaj Unesko!

“Kroniko de la Historio”

kaj ĝia aŭtoro Sima Ĉjan

de MEJ ĜI



Sima Ĉjan

“Kroniko de la Historio” estas ne nur verko el registraĵoj pri la grandaj historiaj eventoj kaj biografioj, sed ankaŭ literaturaĵo. La verko notis la historian evoluon dum la 3 000 jaroj de la prahistoria tempo ĝis la regpenco de la imperiestro Udi (140-87 a.K. sur la trono) de la Okcidenta Han-dinastio. La majstraĵo estas valorega materialo por studo de la ĉina historio.

La tuta verko “Kroniko de la Historio” konsistas el 130 artikoloj kun 526 500 ideogramoj. La verko ampleksas grandajn eventojn en la diversaj periodoj de la historio, fakajn historiojn pri astronomio, kalendaro, irigacia konstruado, ekonomio, kul-

turo kaj arto, registron pri politika aktivado de antaŭaj regantoj, faroj de aristokratoj, kaj ankaŭ biografiojn de diversaspecaj personoj el diversaj socitavoloj. La plej majstraj pecoj el la verko estas biografioj. Dank’ al tiuj biografioj la “Kroniko de la Historio” havis superban artan infektemon kaj fariĝis senmorta historia verko kaj ankaŭ literatura verko.

La biografioj en la verko priskribas diversajn personojn. Inter ili estas imperiestroj, reĝoj, generaloj, korteganoj, plebanoj, elstaraj ŝtatestroj, eruditoj, sikarioj, kavaliroj, aktoroj, aŭguristoj, meritoplenaj oficistoj, gvidantoj de kamparanaj ribeloj, kaj ankaŭ malsukcesintoj en la historiaj eventoj. Unuvorte, la “Kroniko de la Historio” prenis tiujn reprezentajn personojn por fidele speguli la historion. Tamen la artikoloj en la verko ne estas monotonaj en la stilo kaj sengustaj simplaj protokoloj. Ĉiu el la priskribitaj personoj estas viveca kaj vereca. Ili spegulis la ŝaton kaj malŝaton de la aŭtoro al la historiaj eventoj kaj lian trafan juĝon pri ili.

Imperiestro Liŭ Bang (202-195 a. K. sur la trono), fondinto de Han-dinastio (202 a. K.-220 p. K.), estis kompetenta politi-

kisto ludinta gravan rolon en la historio. Sed en la verko la aŭtoro ne priskribis lin kiel misteran homon. Anstataŭ tio la aŭtoro kredinde priskribis lin kiel vivecan kaj realan personon en la historio. Rakontante pri la nefleksebleco, malcedemo kaj grandanimeco de Liŭ Bang, la aŭtoro ne preterlasis liajn friponaĵojn: kiel li dronis en orgio, kiel li malkonfesis sian ŝuldon al drinkejo, kiel li defraŭdis manĝon, kiel li sidis sur la nuko de kortegano kaj demandis lin pri lia impresio. Priskribante Liŭ Bang, la aŭtoro ofte priskribis lian insultadon. Ekzemple, foje kiam Liŭ Bang estis sieĝata en Ŝingĵang, lia kortegano Han Ŝin sendis por peti Liŭ Bang nomi lin “Aganta Reĝo” (ranganta nur sub la reĝo). Liŭ Bang insultis en kolerego: “Sieĝate mi tagnokte esperas lian helpon, sed nun li volas fari sin reĝo!” Tiam liaj konsilianoj Ĝang Ljang kaj Ĉen Ping surtretis lian piedon kun sugesto, ke jam ne estis eble malpermesi al Han Ŝin reĝiĝi, kaj male, konsenti al lia peto evitos lian perfidon. Liŭ Bang rekonsciigis kaj denove insultis: “Mi jam donis al li feŭdon kaj kompreneble li jam estas vera reĝo, ĉu estas necesa por li la titolo de aganta reĝo?” La dufojaj insultoj estis malsamaj

en humoro, jen en tio sufiĉe figuriĝis la impertinenteco, ruzeco kaj ankaŭ la indulgemo de Liŭ Bang. Ĉu ne estas iom sarkasme, ke la aŭtoro registris ankaŭ tiajn kondutojn de digna imperiestro en historian verkon?

La ideologia signifo de la "Kroniko de la Historio" karakteriziĝas ankaŭ per varmaj laŭdoj al la honestaj kaj saĝaj popoloj, kiuj venis de malalta socitavolo tamen ludis grandan rolon en la historio, al la patriotoj, kiuj faris multajn meritoplenajn kontribuojn aŭ oferis sian vivon pro la nacio, kaj al la eminentaj regantoj, kiuj humile kaj egalrajte traktis siajn subulojn. En la "Biografio de Markizo Hŭajjing" la aŭtoro dediĉis malgrandan pecon al priskribo pri ordinara laboranta virino kiu vivtenis sin per lavado de vatoj. Han Ŝin, kiu poste estis titolita de Liŭ Bang kiel Markizo Hŭajjing, ludis ŝlosilan rolon en la surtroniĝo de Liŭ Bang. En sia knabeco Han Ŝin estis malriĉa kaj ofte molestita de kanajloj en sia vilaĝo, sed tio neniom ŝancelis lin en lia strebo al heroa kariero. Bonkora kaj honesta silkovatulavistino senĉese donis al Han Ŝin manĝon en dekoj da tagoj. Sed kiam Han Ŝin diris al ŝi, ke li certe abunde rekompencos ŝin estonte, ŝi kolere diris al Han: "Vi viro ne povas vin vivteni, kaj mi donas al vi manĝon pro simpatio al vi. Ĉu mi deziras vian rekompencon?" Vortoj tre simplaj, tamen profunde impresis onin pri la honesteco de ordinara laboranta virino. Cetere, kontraŭe al la feŭda koncepto pri la ribelantaj kamparanoj kiel "banditoj" kaj "rabistoj", la aŭtoro respektoplene enskribis en la kronikon Ĉen Ŝeng kaj U Gŭang, gvidantojn de la kamparana insurekcio en la lastaj jaroj de Ĉin-dinas-

tio (221-206 a. K.), alte taksante ilian heroaĵon. Tia noto de kortegaj kronikistoj estis senprecedenca.


La ideologia signifo de la verko karakteriziĝas ankaŭ per drasta kritiko. La verko senkompate malkaŝis kaj kritikis siatempan imperiestron Udi, kiu senĉese levis militojn kruele vringante la popolon, malkaŝis la kruelaĵojn de diversrangaj regantoj, kiuj facile kondamnis homojn al morto kaj mortigis dekojn kaj eĉ milojn da senkulpujoj okaze de krimfaro de unu homo. En la "Kroniko de la Historio" legiĝas specialaj ĉapitroj por krueleĝaj altrangaj ŝtatoficistoj.

Biografioj en la verko posedas efektan artan forton. La plej elstara karakterizaĵo de la "Kroniko de la Historio" estas la lerteco en elektado de materialoj plej efike figurantaj la karakterojn de herooj. Ni ekzemplu tion per la "Biografio de Ŝjang Ju". Ŝjang Ju (232-202 a. K.) estis posteulo de aristokrato de Ĉu-regno (?-223 a. K.). Iam li partoprenis en la kamparana ri-

belo gvidata de Ĉen Ŝeng kaj U Gŭang kaj gvidis ĉefan forton de la ribelaj trupoj. Post pereado de Ĉin-dinastio, por gajni la regpotencon, li militis kvin jarojn kontraŭ Liŭ Bang. Ŝjang Ju estis fortega, brava en batalo, simplanima, kaj ankaŭ flamiĝema, sensprita kaj hezitema. En konkuro kun Liŭ Bang por la regpotenco, liaj militaj fortoj superis tiujn de Liŭ Bang, sed fine li estis venĝita de Liŭ. En la biografio estis detalaj rakontoj pri tri gravaj eventoj, nome kampanjo de Ĝjulu, festeno en Hongmen kaj sieĝo en Gajŝja.

En la kampanjo de Ĝjulu, Ŝjang Ju kaj Song Ji kune komandis la armeon laŭ ordono de la reĝo de Ĉu. Song Ji negative observadis sen ajna ofensivo, kaj Ŝjang Ju mortigis lin. Li gvidis sian armeon transiri la Flavan Riveron, firme kaj brave batalis kontraŭ la armeo de Ĉin-dinastio. Venkinte la armeon de Ĉin, Ŝjang Ju fundamentis por si la pozicion de ĉefkomandoro de la armeoj. La artikolo vivece priskribis la militon: Por helpi Ĉin-armeon venis al Ĝjulu multaj

"Kroniko de la Historio" nove eldonita



trupoj, sed neniu el ili kuraĝis rivali kun Ŝjang Ju. Kiam la armeo de Ŝjang faris sturmon al la armeo de Ĉin-dinastio, la generaloj de la helpaj trupoj nur rigardis senfare ĉe sia tendaro. La soldatoj de Ŝjang montris mirindan bravecon en la milito, la krio de la sturmantoj skuis la teron. La helpaj trupoj estis teruritaj, kaj kiam Ŝjang Ju gajnis la militon kaj venigis la komandorojn de la helpaj trupoj, ili genuiĝe rampis antaŭ Ŝjang Ju kaj ne kuraĝis levi rigardon al li. La priskribo plene montris la kuraĝon de la trupoj de Ŝjang kaj lian altan dignecon.

La festeno en Hongmen estis la ŝlosila turnopunkto por la konkuro inter Ĉu kaj Han. Tiam Ŝjang Ju komandis armeon el 400 miloj da militistoj, dum Liŭ Bang tiun el 100 miloj. En la festeno en Hongmen Ŝjang Ju havis la ŝancon mortigi Liŭ Bang, kaj sekve li povus akiri la regpotencon super la tuta lando. Sed Ŝjang Ju, malkaŝema kaj honesta, ne volis intrige superi la rivalon. En tiu ŝlosila momento li hezitis kaj perdis la bonŝancon. Liŭ Bang sukcesis fuĝi de la danĝera festeno. La paragrafo estas tre pompa en priskribo de la streĉiteco de la atmosfero de la festeno kaj la hezitemo de Ŝjang Ju en decido ĉu mortigi Liŭ Bang.

La tria grava afero estis la sieĝo en Gajŝja, kie komplete malvenkis Ŝjang Ju. Pro la atako de la sieĝantaj trupoj de Liŭ Bang, restis al Ŝjang Ju nur 28 militistoj. Gvidate de Ŝjang, la 28 bravuloj morte batalis. La priskribo pri lia braveco en batalo estis tre impresiva. Ŝjang Ju sturmis kriante kaj la malamikoj diskuris en paniko. Li pikmortigis unu malamikan generalon. Alia generalo rajde persekutis

lin. Li faris tondran krimon al la generalo, kaj tiu terurite retiriĝis kelkajn kilometrojn. Trovinte, ke estis neeble rompi la sieĝon, Ŝjang Ju venis al la rivero Uĝjang. La loka estro albordigis sian boaton al Ŝjang Ju kaj diris al li: "Kvankam la regiono trans la rivero estas malgranda, tamen ĝi vastas milon da li-oj (li, ĉina mezurunuo por longo, egala al duonkilometro) kaj havas centojn da miloj da loĝantoj, kaj tio sufiĉas por ke vi reĝu tie. Mi petas vin tuj transiĝi." Sed Ŝjang Ju respondis kun veo: "Jen la destino pereigas min, ĉu estos utile se mi transiros la riveron? Ok mil soldatoj el via regiono sekvis min al milito, sed nun neniu revenis de la milito, kaj mi hontas revidi la popolon oriente de la rivero. Mi hontas ankoraŭ pli, ke la popolo simpatias kun mi kaj neniom plendos kontraŭ mi." Fine li sin mortigis ĉe la rivero.

En la simpla analizo pri la "Kroniko de la Historio" oni facile trovas, kiel eminenta historiisto kaj literaturisto Sima Ĉjan estis. La aŭtoro Sima Ĉjan naskiĝis la 145-an a. K., sed oni jam ne povas determini, en kiu jaro li forpasis. Multaj el la antaŭaj generacioj de lia familio estis kortegano-kronikistoj. Lia patro Sima Tan estis kortegano-kronikisto de la imperiestro Udi de la Okcidenta Han-dinastio. En sia knabeco li vivis ĉe sia patro kaj lernis tre diligente. En la aĝo de 10 jaroj li venis kune kun sia patro al la ĉefurbo Ĉang-an. En la aĝo de 20 jaroj li studis ĉe la tre famaj eruditoj Dong Ĝongŝu kaj Kong An-gŭo. Dum sia vivo li multfoje vojaĝis tra la lando. Ĉe sia unuafoja vojaĝo en la aĝo de 20 jaroj li ekskursis al la lokoj, kie laŭ legendo Da Ju jungis riverojn. Li vizitis la riveron Milŭo, en kiu sin droni-

gis la granda poeto Ĉju Jŭan. Li vizitis ankaŭ la hejmlokon de Kongzi (antaŭe skribita Konfucio), la templon por Kongzi, rigardis liajn veturilojn, vestojn kaj ritajn objektojn kaj persone perceptis la ritojn difinitajn de Kongzi. Tiuj vojaĝoj kaj esploroj liveris por lia verkado de "Kroniko de la Historio" abundon da materialoj kredindaj sed de multaj homoj sciataj. En 110 a. K. lia patro forpasis kaj li heredis la oficon post tri jaroj. De tiam li ĉiam penadis por realigi la deziron de sia patro pri verkado de kroniko pri la historio. Li legis la grandkvantajn historiajn arkivojn tenatajn ĉe la kortego kaj faris necesan preparon por la verkado. Sed ĝuste en tiu tempo lin trafis katastrofo. La 98-an a. K. generalo Li Ling ekspedis al hunoj gvidante siajn trupojn el 5 000 soldatoj. Sed la trupoj estis sieĝataj de kelkdek mil hunaj husaroj. La sagoj kaj provianto estis elĉerpitaj, kaj Li Ling estis kaptita. En la senelirejo li kapitulacis al la hunoj. Imperiestro Udi volis severe kondamni Li Ling, sed Sima Ĉjan pledis por li. Pro tio li ŝokis la imperiestron kaj estis enkarcerigita. Li estis liberigita post kasta puno. Li kontraŭvole toleris la malhonoradon nur pro tio, ke lin instigadis verkado de la kroniko por la historio. Li senĉese verkis en 6 jaroj kaj fine plenumis la senmortan libron "Kroniko de la Historio".

La lastaj jaroj de la vivo de Sima Ĉjan estis jam nekonstateblaj. Oni scias nur, ke li havis solfilinon, kaj ties filo Jang Jun estis la publikiginto de la kroniko. Poste li estis kondamnita al morto. Malprosperaj estis la posteuloj de Sima Ĉjan, tamen lia verko "Kroniko de la Historio" starigis por li eternan monumenton.

Du Fragmentoj el "Kroniko de la Historio" de Sima Ĉjan

Fragmento el "Biografio de Markizo Liŭhoŭ"

Ĝang Ljang estis promenanta sur ponto de Ŝjapi. Venis antaŭ lin maljunulo en jaketo el kru- da ŝtofo. La maljunulo ĵetis sian ŝuon de sur la ponto kaj diris al Ĝang Ljang fiksan- te la rigardon sur li: "Knabo, iru repreni por mi la ŝuon!" Ĝang Ljang ofendiĝis kaj volis bati lin. Sed, konsiderante pri lia maljuneco, li toleris kaj iris preni la ŝuon. Tiam la maljunulo ordonis al Ĝang: "Surmetu ĝin por mi!" "Mi jam alprenis por li la ŝuon, do mi surmetu ĝin por li," tiel pensante Ĝang Ljang genui- ĝe surmetis la ŝuon al la malju- nulo. La maljunulo etendis la piedon kaj ĝin enŝuigis. Poste la maljunulo foriris kun rido. Ĝang Ljang estis surprizita kaj sekvis la maljunulon per la ri- gardo. La maljunulo foriris ĉ.

duonkilometron kaj revenis al Ĝang Ljang: "Vi knabo estas instruebla. Ĉe la tagiĝo post kvin tagoj vi rendevuu min ĉi tie." Ĝang Ljang genuiĝe kon- sentis en mirego. Ĉe la tagiĝo post kvin tagoj Ĝang Ljang iris al la loko, kaj la maljunulo jam estis tie atendanta. Li koleriĝis kaj diris al Ĝang: "Kial vi mal- fruiĝis en rendevuo kun malju- nulo?" La maljunulo foriris, ordonante al Ĝang, ke li refoje venu al la loko frumatene post kvin tagoj. Post kvin tagoj, ĉe la unua kokeriko Ĝang Ljang iris al la loko kaj refoje la mal- junulo tie atendis. Li koleriĝis: "Kial vi denove malfruiĝis?" Forirante la maljunulo postlasis la saman ordonon. Post kvin tagoj, Ĝang Ljang iris al la loko en la noktomezo. Post nelonge

venis la maljunulo. Ĉi-foje la maljunulo ĝojiĝis kaj laŭdis lin. Li donis al Ĝang libron kaj diris: "Leginte tiun libron, vi fariĝos instruisto de reĝo. Via kariero prosperiĝos post dek jaroj. Kaj post dek tri jaroj vi vidos min en Ĝjibej; la flava ŝtono ĉe la piedo de la monto Guĉeng ja estos mi." Tion di- rinte la maljunulo malaperis kaj post tio Ĝang Ljang neniam vi- dis lin plu. Kiam tagiĝis, li tro- vis, ke la libro estas nenio alia ol "Milita Strategio de Taj- gong". Ĝang Ljang alte taksis la libron kaj ofte legis ĝin.

** Markizo Liŭhoŭ estis la lasta honora titolo de Ĝang Ljang en lia vivo. Li estis unu el la fondintoj de la Okcidenta Han-dinastio. La fragmento prezentas anekdoton pri lia juneco.*

Fragmento el "Biografio de Princo Uĝji de Ŭej-regno"

En Ŭej-regno estis 70-jara malriĉa ermito Hoŭ Jing, kiu servis kiel pordisto de la orienta pordo de la urbo Daljang. In- formiĝinte pri lia stato, princo Uĝji vizitis lin kaj volis donaci al li monsumon. Sed Hoŭ rifu- zis la donacon kaj diris al la princo: "Mi kulturis min per virto dum dekoj da jaroj, kaj mi ne devas akcepti vian donacon pro mia malriĉeco de pordisto." La princo do preparis grandan festenon kaj invitis multajn gas- tojn. Kiam ĉiuj venis al la fes-

teno, la princo veturis per kaleŝo kun vakanta maldekstra sidlo- ko* al la orienta pordo por bon- venigi s-ron Hoŭ. Hoŭ iom ordi- gis siajn ĉifonajn vestojn kaj ĉapelon, ascendis la kaleŝon kaj sidiĝis sur la maldekstran sidlo- kon, sen ajna ĝentilaĵo, por ek- zameni la sintenon de la princo. Sed la princo pli humile veturi- gis la kaleŝon. Post momento Hoŭ diris al la princo: "Mi ha- vas amikon en la bazaro, kaj mi volas iri tien per via veturilo." La princo do kondukis la kale-

ŝon en la bazaron. Hoŭ descen- dis la kaleŝon, salutis sian ami- kon Ĝu Haj kaj strabe subrigar- dis la princon, longe parolante kun sia amiko. Sed la princo montris pli da humileco. Tiam ĉiuj gastoj estis atendantaj, ke la princo komencu la festenon. La urbanoj vidis, ke la princo kon- dukas veturilon por Hoŭ, kaj la sekvantoj de la princo kaŝe blasfemis kontraŭ Hoŭ. Hoŭ rimarkis, ke neniom ŝanĝiĝis la humileco de la princo. Hoŭ adiaŭis sian amikon kaj reascen- dis la kaleŝon. Atinginte sian domon, la princo kondukis s-ron Hoŭ al la honora sidloko kaj prezentis al Hoŭ la gastojn unu post alia. La gastoj multe miris

Gravuraĵoj sur haro

— Pri mikrogravura arto de Ŝen Ŭejĝong


Antaŭe oni prenis kiel gravur-materialojn nur lignon, ŝtonon kaj oston. Nun oni faris miraklon en la gravura historio — gravuri

ideografiaĵojn kaj bildojn sur haro.

En la Metiarta Instituto de Suĝoŭ mi vidis mirindaĵon helpe

de mikroskopo, kiu pligrandigas objekton centoble: Sur 14-milimetra blanka haro estas gravurita aforismo el sep ĉinaj

Surhare gravuritaj figuroj de kvar herooj en la ĉina mita romano "Pilgrimado al la Okcidento"




Budhostatuo gravurita sur eburo en grandeco de rizgrajno



ideografiaĵoj kaj subskribo el ok ĉinaj ideografiaĵoj; sur 4-milimetra nigra haro estas gravuritaj la vortoj "ĉie en la mondo estas niaj amikoj" en la ĉina kaj angla lingvoj; kaj sur unu-centimetra blanka haro estas gravuritaj la figuroj de kvar herooj en la ĉina mita romano «Pilgrimado al la Okcidento», kun malsamaj pozoj: Sun Ukong staranta sur nuboj, kun mano ŝirmanta la okulojn kaj levita kapo; Ŝjüanzang en robo, kun afabla vizaĝo kaj kunmetitaj manoj; Ĝu Baĝje stultaspekta, kun erpilo en mano kaj nudaj brusto kaj ventro; bonzo Ŝaseng fidelmena, en grandpaŝa irmaniero, kun alte tenata bonza bastono. Sub la bildo estas gravuritaj la ĉinaj ideografiaĵoj "figuroj de pilgrimantoj al la Okcidento" kaj la dato kaj du ruĝaj sigeloj ĉe la fino.

La tri haro-gravuraĵojn faris la 39-jara duaklasa majstro-metartisto Ŝen Ŭejĝong de la nomita instituto. Antaŭe li estis laboristo de iu skribmaŝina fabriko. Li neniam vizitis belartan lernejon. Li sin ekokupis pri mikrogravurado tute hazarde, nur antaŭ du jaroj.

Jam en mezlernejo Ŝen Ŭejĝong ekamis belarton, kaligrafion kaj gravuradon. Se nur li trovis ŝtonpecon taŭgan por gravuro, li disponis ĝin laŭplaĉe. Li poluris malnovan ŝtonan sigelilon, faris grazuraĵon sur ĝi, kaj tion ripetadis foje refoje. Kiam diversformaj figuroj de kokido, cervido, simio, elefanto k.a. naskiĝis el sub liaj manoj, li tuj droniĝis en plezuro kaj kontenteco. Pro manko de materialo liaj ŝtonpecoj ĉiam pli malgrandiĝis kaj ankaŭ la gravuritaj figuroj. Estis tute ekster lia atendo, ke tio ja metis bazon por lia posta mikrogravurado. Poste li memlernis gravuradon de sigeliloj. Por per-



Ŝen Ŭejĝong


fektiĝi sian gravurarton sur kupra, agata kaj kristala sigeliloj, li studis teknologion de metalprilaborado, koniĝis kun la kvalito de diversaj alojaj ŝtaloj kaj serĉis gravurajn instrumentojn taŭgajn por malsamaj materialoj. Kaj tiel li elfaris diversajn grifelojn. Li komencis lerni mikrogravuradon aprile de 1979.

Tiam li laboris en iu skribmaŝina fabriko. Iutage post laboro, promenante sola surstrate, li hazarde vidis eburan gravuraĵon en montrofenestro de iu butikoj. Kiel li volis atente rigardi surebure gravuritajn poemon kaj bildon en grandeco de rizgrajno. Pri tia artaĵo li aŭdis, sed neniam vidis! Sed li ne povis klare vidi ĝin pro la reflektita lumo de lupeo. Li petis vendiston montri al li la mikrogravuraĵon, sed la lasta tute ne volis respondi lin, ĵetinte ekrigardon al liaj laboristaj vestoj. Li revenis hejmen kun bedaŭro. Li pensis: ĉia vojo en la mondo estas malfermita de homoj, kial mi ne ellernos mikrogravuran

arton? Li do komencis gravuri sur rompita ebura manĝbastoneto.

Li aĉetis la libron «Mikrokirurgio» por lerni metodon labori per mikroskopo kaj mildigi mantremadon. Li vendis sian elektran gramofonon por aĉeti malnovan mikroskopon. Krome li provfaris ankaŭ mikrogrifelon. Ĉiutage post laboro li ekzercis sin en mikrogravurado ofte ĝis sekvanta mateno. Senĉesa laborado alportis al li fruktojn. Unu monaton poste li jam povis venki pulsan impulson kaj gravuris sur eburo en grandeco de rizgrajno antikvan poemon el 28 ĉinaj ideografiaĵoj. Poste sur samgranda eburo li povis gravuri pli ol 80 ĉinajn ideografiaĵojn kaj pli poste 16 poemojn de Tangdinastio kaj subskribon, sume 472 ĉinajn ideografiaĵojn.

Post kiam lia mikrogravura arto estis vaste konata, oni sendis lin al la metiarta instituto, ke li povu ekskluzive studi mikrogravuron kaj fari mikrogravura-



Tang-dinastia poemo gravurita sur eburo kun diametro de 3 milimetroj

jojn. Kiel fiŝo en akvo, li povas disvolvi plene sian talenton. Surbaze de bareliefoj li kreis aron da reliefoj, aĵuraj kaj tridimensiaj skulptaĵoj. Ebura budho-statuo skulptita de li, inkluzive soklon, niĉon kaj aŭreolon, estas en grandeco de tri kvinonoj de rizgrajno. La dikeco de ceremonifara fingro de la budho estas nur du trionoj de haro. Ĝi povas esti kalkulata kiel la plej malgranda budho-statuo en la mondo. Lia plej elstara verko estas ebura drakoŝipo kun longeco de du trionoj de la montra fingro. Sur la ŝipo

estas tri-etaĝa pavilonforma sonoril-turo, 26 dancistoj kaj muzikistoj, 30 standardportantoj kaj 44 remistoj.

Tamen Ŝen Ŭejĝong ne kontentis pri siaj sukcesoj. Li ofte pensis, ĉu li povas krei novan artan miraklon en mikrogravura kampo. Foje en barbirejo subite venis en lian kapon ideo: Ĉu oni povas gravuri ideografiaĵon sur haro? Li decidis tion provi hejme.

Observante per mikroskopo, li trovis, ke haro estas tuboforma,

kun tavolo da ege maldika epidermo, sub kiu estas fibro histo. Ĝia centro estas malplena. Li komprenis, ke oni devas gravuri ideografiaĵojn nur sur la epidermo, ne farante vundon kaj tratanĉon al la fibro histo de haro, alie la haro facile rompiĝas.

Malgraŭ varma aŭgusto en suda Ĉinio li komencis sian novan provon. Li sentis, ke ju pli malgrandaj estas la gravurataj ideografiaĵoj kaj bildoj, des pli evidenta la tremo de la mano kun grifelo. Tio estas kaŭzita de pulso de la homo. Tian pulson oni eĉ ne povas rimarki per nudaj okuloj pro ĝia malforteco. Tamen per mikroskopo oni povas klare vidi, ke la skalo de la balancetoj de la grifelpinto estas multoble pli granda ol la diametro de haro. Dum gravurado oni devas kutimigi sin al reteno de spiro, streĉo de atento, uzo de parta muskolo de pojno por regi kaj redukti la skalon de pulso kaj al alta koncentro de sia energio sur pojnon kaj fingrojn. Post centoj da eksperimentoj kaj malsukcesoj, miraklo finfine aperis. Li faris sinsekve la tri haro-gravuraĵojn, pri kiuj mi jam rakontis en la komenco de ĉi artikolo. Poste li faris pliajn haro-gravuraĵojn. Li gravuris 56 ĉinajn ideografiaĵojn sur unu-centimetre longa haro kaj kvin antikvajn poemojn sur 1.2-centimetre longa haro.

Nun lia esploro de la mikrogravura arto ankoraŭ daŭras. □

(Daŭrigo de p. 41)

pri tio. En ekstazo pro ebrieto la princo stariĝis kaj iris antaŭ Hoŭ por gratuli lin pro la 70-a datreveno de lia naskiĝo. Tiam Hoŭ diris al la princo: "Hodiaŭ mi tro multe ĝenis vin. Mi estas gardisto de la urbopordo, sed vi persone veturis al mi kaj ho-

noris min per via bonvenigo antaŭ la publiko. Via princa moŝto ne devas humiliĝi, sed fakte vi tro humiligis vin pro mi. Tial mi intence retenis vian kaleŝon longe en la bazaro por disfamigi vin. Parolante kun mia amiko, mi rigardis vin kaj rimarkis, ke vi fariĝis pli humila. Ĉiuj rigar-

das min fiulo kaj opinias, ke via princa moŝto humile traktas subulojn." Post tio Hoŭ fariĝis tre respektata amiko por la princo. □

* Laŭ moro de ĉinoj, sidloko maldekstre de mastro estas por la plej honora gasto.

NIA ESPERO

LA AFEROJ DE ĈINIO KAJ DE ESPERANTO KUNFLUAS

Nun mi volas skribi ion pri la artikoloj en la junia numero de EPĈ. Unue venas en miajn pensojn la ideo, ke ĉinaj altranguloj verkis artikolon por la stimulado de Esperanto! Tio estas vere honoriga por nia komuna afero kaj por la ĉina Esperanta afero aparte. Mi cetere ricevis stimulon realan al mia espero, ke la aferoj de Ĉinio kaj de Esperanto kunfluas — ambaŭ aferoj estante fortaj motivoj por paco kaj evoluo homama. Ĝenerale la sinteno je Esperanto reflektas en ĉi tiu mondo la bonan volon aŭ la mankon de bona politika volo; tio estas mia konvinko post komparo de diversaj estraroj. Mi kredas je la leĝo: “Kiu ne volas pacon, ankaŭ Esperanton ne bezonas.” Feliĉe do ke en Ĉinio Huang Hua envortigas la bonan volon klare kaj nedusence.

Leginte la artikolon “Kien iros la reformado de la ĉina ekonomia sistemo?” mi pensas nun, ke tia strukturo (kunmetado de diversaj ekonomiaj rimedoj, kiuj estas adaptitaj al la lokaj realecoj) postulas reton de viglaj estroj kaj spertuloj, kiuj ne timas averti la estraron super ili, kiam ili trovas troigojn aŭ deflankegojn aŭ kiam ili vidas, ke la nova sistemo estas jam fariĝanta malpli efika. Tiuj avertoj devos esti elparolitaj ankaŭ kiam temas pri “amataj ĉevaletoj” de su-

perulo. La superuloj devas posedi saĝon kaj malfermitan menson.

Kun intereso mi legis la artikolon de Hŭa Kujjŭan (en n-ro 9), kiu enkondukas nin en la problemaron de unua graveco ĉe la gvidado de urbigo. La plej granda malutilo, kiun oni devis venki, estas la historia malbona baro en kombino kun la urbiga eksplodo. Oni povas imagi, kiel rapide kaj tamen precize la ‘planistoj’ devis (devas) labori! Mi havas demandon: tiu rapida evoluo (jam kvante) certe postulas ankaŭ ‘atencon’ sur la energio-kvanto, dum tiu energio estis (estas) urĝe bezonata de la industrio, kiu estas la vivigilo de la urbigo. Kiel oni solvas tiun problemon?

J. V. HOEVEN (Nederlando)

ĈIU POPOLO KONSERVU SIAJN PERSONECON KAJ FOLKLORON

Antaŭ nelonge mi legis en la 5-a numero de EPĈ, kiun mi abonis de longa tempo, artikolon kun foto kiun mi tre ŝatis. Mi vidis en ĝi kun surprizo sur la 33-a paĝo fotografiaĵojn de la hotelo en nacia stilo.

Jam mi vidis fotojn de novaj domoj en via lando. Bedaŭre ofte ili estas konstruitaj en moderna eŭropa stilo. Ĝi ne estas, laŭ mi, tre bela, ĉar en ĝi nun oni penas konstrui ekonomie, sen stilo.

Mi tre ŝatas, ke ĉiu popolo konservas siajn personecon kaj folkloron.

Se sur la tuta tero oni vestus sin same, loĝus en similaj domoj, manĝus la samajn pladojn, la vivo estus moroza kaj al ĝi mankus spicaĵo. La uniformeco naskas enuon.

Mi esperas, ke vi konstruos ankoraŭ domojn laŭ la kutimo antikva kaj laŭ modo de via lando.

LEMAIRE (Francio)

Solvoj:

(1) Kiu la unua atingos la finon? Homo. Ĉar ĉevalo kaj aŭto estas pli pezaj kaj ne povas akiri en mallonga tempo altan rapidecon.

(2) Kion li diris? La saĝa malliberulo diris: “Mi estos senkapigita”, kio embarasis la reĝon. Se li vere senkapigos la malliberulon, lia diro do estos vera, sed la vero-dirinto devas esti pendumita. Se li pendumos lin, do lia diro “mi estos senkapigita” fariĝis malvera, sed la malvero-dirinto devas esti senkapigita. Tial, la antaŭa decido de la reĝo estis nepraktikebla, la reĝo estis devigita liberigi la malliberulon

(3) Solvoj de enigmoj: 1. fiŝo
2. elektra lampo.

VOJBARADO — ORIGINALA BONVENO AL GASTOJ

En la pasinta jaro ni pekinaj raportistoj oficvojaĝis al la nacimalplimultaj regionoj de Gujĝoŭ-provinco. Tie ni estis bonvenigataj per originala ceremonio — vojbarado. La gastigantoj metis obstaklojn sur strato, ĉe vilaĝa enirejo aŭ antaŭ pordoj de siaj domoj por bari al ni la vojon. Malantaŭ la obstakloj kolektiĝis gejunuloj en festaj naciaj vestoj gvidataj de vilaĝestro. Ili, ĉiu kun glaso da arako en la mano, staris en vicoj kaj pretis reciproki kantojn kun ni. Sen kanti kaj trinki arakon absolute ne eblis trapasi la obstaklojn kaj muron el homoj.

La voj-barado ofte okazas ĉe la dung-a nacieco en sudorienta Gujĝoŭ-provinco. Kiam junuloj de iu vilaĝo iras engastiĝi en alia loko, ili ofte renkontas knabinojn de la gastiganto-vilaĝo, kiuj baras la vojon per ŝnuroj kunligitaj kun arbofolioj kaj pajlofasko kaj eĉ iam per ŝpinradoj, teksmaŝinoj, bambuaj korboj, kokkaĝoj k. a. ĉe vojkruciĝoj kaj pordoj. La knabinoj staras en vicoj kaj la unuaj kantas pri kialoj de sia barado,

Dung-aj knabinoj metas obstaklojn por bonvenigi gastojn.



la junuloj devas kantdueli por senbazigi la kialojn. La rigardantoj aplaudas ilian kantadon. Iu tekstas jene:

La knabinoj:

*Tabuo ĉe ni nun validas,
vizito do ne permesitas.
Demandu Dion se nin vi ne kredus;
se li per skrib' al ni dekretus
kaj la tabuon li jam ŝanĝus,
akcepton al vi ni aranĝus.*

La junuloj respondas:

*Vi ŝanĝu tuj la tabu-ordon,
malfermu al ni vian pordon.
Ni jam demandis nian Dion.
Li diris: "Mem aranĝu ĉion."
Li ne sin ĝenas per homaj aferoj
kaj li ne skribas per niaj literoj.*

La knabinoj rifuzas denove:

*Ni estas en tabua tago,
naskiĝis al ni nokte kato;
fremdulojn do ni ne enlasos.
Revenu post ol hodiaŭo pasos*

Tiam la junuloj repliktas:

*Sed ne tabuu en ĉi tago,
por katonask' ne taŭgas ĉi monato.
Se l' nasko veras, do vi havas bonan
sorton;
malfermu tuj trankvile vian pordon.*

Kiom ajn bele la junuloj kantas, ili ne povas ricevi la permeson, ĉar ili devas lerte respondi en kantado diversajn demandojn, kiujn donas al ili la knabinoj en sama maniero. Antaŭ ol eniri la vilaĝon, ili devas kantante peti, ke la knabinoj formovu la obstaklojn, kaj trinki la arakon de la knabinoj. Tia aktivado ofte okazas en la tempo, kiam gejunuloj de la du vilaĝoj faras kontakton aŭ oni bonvenigas novedzinon. La vojbara kanto kun ŝercaj kaj amindumaj vortoj interkomprenigas la gejunulojn kaj metas bazon por ilia pluapŝa kontakto.



Nur trinkinte arakon, la gasto povas eniri la vilaĝon.

Pluvetis, kiam ni atingis la vilaĝon de dung-oj en Liping-gubernio, sudorienta Gujĝou-provinco. La vojo al la vilaĝo estis barita de du benkoj, ŝnuroj kaj pajlofaskoj. La vilaĝestro kaj gejunuloj kun ombreloj super si kantis vojbaran kanton por bonvenigi nin. Bedaŭrinde, ni ne lertis en kantado. Neniu el ni kuraĝis kantdueli kun ili, kaj anstataŭe laŭ la loka kutimo ni eksplodigis krakfajraĵojn por esprimi niajn bondezirojn al la vilaĝanoj. Ĉe tio la gastigantoj formovis la obstaklojn kaj regalis nin per arako. Gvidate de orkestro kaj knabinoj, ni venis antaŭ la plej grandan tamburturon de la vilaĝo. Ni kaj la vilaĝanoj en granda cirklo kune ekdancis akompanate de kantado.

En la najbara gubernio Ĵongĝjang ni partoprenis en nupto de paro da dung-oj. Tie sur strato ni refoje vidis obstaklojn. Sur la ŝnuroj estis pajlofasko kaj sur la tabloj bovloj da arako, peklitaj fiŝoj, glueca rizaĵo kaj koloraj ovoĵoj. Post finiĝo de la vojbara kanto, ni trapasis la obstaklojn. La akompanantinoj ligis sur nia brusto du

malhel-ruĝajn ovoĵojn simbolantajn feliĉon, kaj poste proponis trinki la arakon. Ili ankaŭ manĝigis al ni peklitajn fiŝojn kaj gluecan rizaĵon proprajn al la dung-a nacieco, ĝis nia buŝo tro pleniĝis kaj ni ne povis eldiri eĉ unu vorton. Nur tiam ni estis lasitaj rigardi la novedzinon en la geedziĝa ĉambro.

La tambura turo estas konstruaĵo kun tipaj naciaj karakteroj de dung-oj. Ĝi funkcias kiel emblemo de vilaĝo aŭ klano, kaj ankaŭ estas centro de kultura aktivado. Antaŭ nia vizito, la tieaj dung-aj knabinoj ligis sur la streĉitaj ŝnuroj multe da alplandaĵoj por bari al ni la vojon kaj nin bonvenigi. Kiam ni estis trinkantaj la arakon kaj ĝuantaj prezentadon antaŭ la turo, la knabinoj donacis al ni la alplandaĵojn kiel memoraĵon. Oni diras, ke tiaj ordinaraj vivbezonaĵoj ne estas donacataj senpripense. La alplandaĵoj kun koloraj strioj delikate faritaj de la knabinoj servas ĝenerale, kiel emblemo de amo. Ilin knabino donacas al sia amato. Ĉar ni estis gastoj

de malproksima Pekino, tial ni feliĉe ricevis la karan donacon.

Ĉe nia forlaso de la gubernio, la mjaŭ-oj loĝantaj ĉe la lima ŝoseo de la gubernio en festaj kostumoj muzikis per ŝalmo kaj en vicoj sur la ŝoseo adiaŭis nin per vojbarado. Ili blovis foje refoje, kantis kaj kantadis, kio esprimis ilian bedaŭron en la adiaŭo kun ni. Fine ni devis trinki arakon por trairi la baritan vojon. La mjaŭ-oj prenas bubalkornon kiel vinujon, tial oni devas eltrinki per unu tiro la tutan kornon da vino. Trinki tiom da arako por ni nedrinkemuloj estis tre malfacile.

Ni facile eniris vilaĝon de buji-oj, sed estis malfacile eniri iliajn domojn. Multaj knabinoj kun arako en la mano, staris antaŭ la pordoj por malhelpi nian eniron. Ili kantante alproksimiĝis al ni kun arako en la mano kaj proponis ĝin al ni. Laŭ la buji-a kutimo ni ĉiuj trinkis arakon kaj iu el ni eĉ eltrinkis sinsekve tri glasojn, antaŭ

ol ni estis lasitaj endomiĝi. Kiam ni estis forlasontaj la vilaĝon, la gastigantoj metis kvadratan tablon kun bovloj da arako ĉe vilaĝfino. Por elvilaĝi ni devis trinki arakon. La buji-oj opinias, ke satigi kaj ebrigi la gastojn estas esprimo de sia amikeco kaj komplezo.

La golaŭ-a nacieco konsistanta el pli ol 20 000 homoj estas unu el la plej malgrandnombraj ĉinaj nacimalplimultoj. Kiam ni veturis al Ŭanzi-vilaĝo de golaŭ-oj, la tieaj gejunuloj en naciaj teatraj vestoj kaj kun maskoj kaj du longaj plumoj flirtantaj surkape bonvenigis nin ĉe vilaĝfino tenante flagojn. Komprenoble, ni devis kanti, eksplodigi krakfajraĵojn kaj trinki arakon por eniri la vilaĝon.

En la tagoj, kiam ni oficvojaĝis en la regiono de nacimalplimultoj en Gujĝoŭ-provinco, ni spertis diversformajn vojbarojn kaj ĝuis sufiĉe da vojbara arako, kio sentigis al ni apartan intimecon, kvankam iom prokrastiga en la vojo. □

KORESPONDI DEZIRAS

- * Maljuna esp-isto en Uzbekio serĉas leter-amikojn ĉiulandajn, S-ro Eugeno Perevertajlo, Abonkesto 140, Su-700 000-Taskent, USSR.
- * S-ro Rene Bastong, ĉefa respondeculo de Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista, mortis la 6-an de novembro en Parizo pro grava vundiĝo kaŭze de bombado lanĉita de teroristo. Bonvolu ne plu sendi leterojn al lia adreso.
- * Studento, 22-j, dez. kor. t.m. esperante, ruse kaj angle pri ĉ.t. S-ro Zhao Qingchun, 44831 Beijing Gongye Xueyuan, Beijing, Ĉinio.
- * Membroj de Rondo de Esperanto en Bielawa, diversaĝaj kaj diversinteresiĝaj, volus korespondi kun gesamideanoj tutmondaj. Adr.: Rondo de Esperanto ZDK "Bielbaw", ul. Bieruta 1, 58-260 Bielawa, Pollando.
- * Haveblas 8 bildkartoj (nigra-blanka bildo) de "Persepeliso"

(Kastelo) konstruita antaŭ pli ol 2400 jaroj. Skribu al: La Omid Kultura Asocio, P.O. Box 749, 71365 Shiraz, Irano. Prezo: kvin rpk.

* F-lo Valmir Tolicci, str. "Carlos Campos" 626, Parque Sao Vincente Maua Sao Paulo Cep-09300, Brazilo, dez. kor. pri ĉ.t. k. interŝ. bk.

* F-ino Joanathana Marie-Honorette, studentino, dez. kor. pri sporto, muziko, vojaĝoj, filmo kaj libroj. Adr.: Logt. 1876/1-bis Cite 67 Ha, Antanarivo, 101, R.D.Malagasy, Madagaskaro.

* F-ino Denise Parfnte, Schotenhofdreef 24, B-2120 Schoten, Belgio, pri popolaj dancoj.

* Gemembroj de Infana Esperanto-Klubo en Pardubice serĉas samaĝajn geamikojn en diversaj landoj. Skribu al: S-ino Jarmila Ryznarova, Na Okrouhliku 953/21, 530 03 Pardubice, Ĉeĥoslovakio.

* F-ino Dana Ceralova, lerneĵano, Pod Zahradami 481, 530 03 Pardubice, Ĉeĥoslovakio, pri glumarkoj, pm, bk.

* En la urbo Rosario kaj sub la


apogo de "Biblioteca Pop. Estimulo al Estudio" kaj en ties sidejo, komenciĝis elementa kurso de Esperanto sub la gvidado de S-ro Enrique Kohei. 33 gelernantoj plejparte junaj partoprenas en la lecionoj kun granda entuziasmo ĉiun ĵaŭdon vespere. La instruado estas farata per Ĉe-metodo, tial ili jam dekomence parolas en Esperanto. Ĉi tiuj gelernantoj volas kontaktiĝi kun aliaj kolegoj tutmondaj, precipe tiuj kies lingvoj ne estas la hispana. Nepre skribu karton akceptante korespondon, je la sekva adr.: Kurso de Esperanto-Biblioteca Pop. Estimulo al Estudio-Av. Alberdi 830, 2000 Rosario, Argentino.

* Astronomia Grupo de Kordovo; esperanto-sekcio; Avenida del Corregidor, 4-1º-2. 14004-Kordovo, Andaluzio, Hispanio, dez. kor. kun tm. esperantistaj astronomoj.

* Por mia ekspozicio sendu bk. Mi sendos bk. reciproke. Adr.: Haŝiguĉi Ŝigejuku, 847 Sagaken, Karacu-ŝi, Kooda 2064-1, n-ro 223, Japanio.

EN BUJI-A VILAĜO

Foto de LI ŬEN kaj ŜJU ĈJANG




Buji-a vilaĝo

Nemalproksime de la fama akvofalo Hŭanggŭoŝu en la suda parto de Gujĝoŭ-provinco estas vilaĝo sin kroĉanta al monto kaj akvo. En ĝi la stratoj estas pavimitaj per ŝtonoj kaj ankaŭ la domoj masonitaj el ŝtonoj, kun tegmento el grizbluaj ardezoj. En la kortoj estas ŝtonaj tabloj kaj seĝoj. La vilaĝo impresas kiel ŝtona urbo kaj en ĝi vivas buji-oj.


Estas multaj specoj de kostumoj de la buji-aj virinoj. Ili estas zorge faritaj kaj havas sufiĉe altan nivelon en brokado, brodado, vaksinturado kaj kolorigado, el kiuj la vaksinturado ĝuas la plej grandan renomon. Preskaŭ ĉiuj buji-aj knabinoj eklernas vakstinkturadon en la aĝo de 11-12 jaroj. La buji-oj estas drinkemaj kaj gastamaj. Kiam gastoj venas

viziti ilin, ĉi tiuj en novaj vestoj kolektiĝas ĉe vojkruciĝo, enirejo de la vilaĝo aŭ pordo de sia hejmo, baras al ili la vojon kaj kantante proponas al ili vinon. La gastoj siavice reciprokas kanton. Trinkinte la vinon, ili estas lasitaj eniri en la domon kaj varme akceptataj de la gemastroj.

Ne mankas festotagoj al la buji-oj. La plej solena estas la novjara tago. En tiu tago la tuta familio kultas siajn prapatrojn, ĝuas novjaran manĝon kaj sin amuzas per frapado de latuna tamburo kaj ludo de surnao kaj flagoletoj. Gejunuloj ĵetas unu al alia flordesegnan saketon, piedbatas volanon kaj ludas trapezon. Ili reciprokas kantojn kaj per tio esprimas sian amon.



Knabinoj en festaj vestoj



Bonvenigo de gasto per vino

En festo



Vakstinkturado



POŝTMARKOJ PRI PAPILIOJ

Teksto de GJI SING



ĈINAJ POŝTMARKOJ

Papilio estas insekto ŝatata de ĉinoj. En Ĉinio ne mankas specoj de papilioj. La papilioj, kiujn oni desegnis por tiu ĉi poŝtmarkoserio el 20 pecoj, estas de raraj specoj en diversaj partoj de Ĉinio. La poŝtmarkoj estis emisiitaj la 5-an de aprilo 1963.



POŝTMARKOJ DE ĈINIO

de LAN ŜAN

En antikva libro estas notite, ke antaŭ 2 700 jaroj ĉinoj komencis transdoni informojn per signalfajro kaj starigis primitivan postiljonan sistemon. En Handinastio (206 a.K. — 220 p.K.) establiĝis integra postiljona sistemo kaj malfermiĝis poŝtvojoj al Centra Azio, Okcidenta Azio kaj Eŭropo, kiuj faciligis transdonon de informoj inter Ĉinio, Persio kaj Romano. Sed tiam la poŝta stacio estis oficiala oficejo, kiu transdonis nur dokumentojn. En Ming-dinastio (1368-1644 p.K.) aperis civilaj poŝtagentejoj, kiuj peris privatajn korespondaĵojn. En Ĉing-dinastio (1644-1911 p.K.) en Ĉinio funkciis miloj da civilaj poŝtagentejoj, kiuj peris ne nur korespondaĵojn, sed ankaŭ monon kaj paketojn. Tiam la servolinio sin etendis ĝis Sudorienta Azio. Oni ne afran-

kis la poŝtaĵojn per poŝtmarkoj, sed stampis sur ili la nomojn de la koncernaj poŝtofacejoj. Nun la kovertoj kun tia stampo estas kolektaĵoj por filatelistoj.

Post la Opia Milito en 1840-1842, Britio, Francio, Japanio, Germanio, Rusio, Usono k.a. funkciigis poŝtofacejojn en ĉinaj apudmaraj urboj kaj iuj gravaj landinternaj urboj, kiuj respondecis pri fremdlandaj poŝtaĵoj ekster kontrolo de la ĉina registaro. Tiuj poŝtofacejoj estis fermitaj en 1922.

En 1866, la registaro de Ĉing-dinastio establis poŝtofacejon en siaj doganejoj por transigi korespondaĵojn de fremdlandaj ambasadorejoj kaj tiujn inter siaj doganejoj. Poste la poŝtofacejoj komencis akcepti civilajn poŝtaĵojn. En 1896 la registaro funkcii-

gis oficialan ŝtatan poŝton, kio markis komencon de la ĉina poŝto.


La unua serio da poŝtmarkoj de Ĉinio estis emisiita en 1878, kun desegno de drako, la emblemo de imperiestro. En la sekvaj 33 jaroj antaŭ la pereco de Ĉing-dinastio, oni emisiis sume 16 seriojn da poŝtmarkoj el pli ol cent pecoj. Krom la drakaj poŝtmarkoj, estis ankaŭ serio da draketaj poŝtmarkoj emisiita de la dogana poŝto en 1885, tiu de "jubileaj poŝtmarkoj" el 9 pecoj emisiita en la 7-a de novembro 1894, memore la 60-jaran datrevenon de la naskiĝo de la imperiestra patrino Ciŝji, kaj poŝtmarkoj kun stampo — ruĝa fiska

Poŝtmarkoj emisiitaj de la Soveta Poŝto de la ĉina revolucia reĝimo en 1932

Poŝtmarko kun desegno de drako




La unua memoriga poŝtmarko emisiita en 1938 en la liberigitaj regionoj de Ĉinio.





Poŝtmarkoj kun portreto de d-ro Sun Jatsen emisiitaj en 1939



marko kun aldona stampo emisiitaj en 1897. Tiuj poŝtmarkoj estis emisiitaj frue kaj malgrandkvante, sekve nun ili estas rigardataj kiel raraĵoj de la filatelistoj.

Post renverso de la feŭda reĝimo de Ĉing-dinastio, fondiĝis la Respubliko de Ĉinio kaj ankaŭ la Ĉina Poŝto. De 1912 ĝis 1947 la Ĉina Poŝto emisiis nur dekojn da specoj de poŝtmarkoj. La fruaj poŝtmarkoj surhavis fremdlingvajn skribaĵojn, kaj ankaŭ aldonajn, korektajn kaj limigajn signojn. En 1912, por memorigi la Revolucion de 1911, la Ĉina Poŝto emisiis poŝtmarkan serion el 12 pecoj kun portreto de d-ro Sun Ĝongŝan (Sun Jatsen). Sed pro malhelpo de nordaj militaristoj, la uzado de la poŝtmarkoj estis limigita, kaj nun ili fariĝis tre valoraj.


Post 1927, en siaj liberigitaj regionoj la Komunista Partio de Ĉinio fondis sian propran poŝton. Komence la transportado de leteroj estis senpaga. Poste, pro prosperiĝo de la poŝtaj aferoj, oni komencis emisi poŝtmarkojn en

la liberigitaj regionoj. Ĝis la fondiĝo de la nova Ĉinio en la unua de oktobro 1949, la liberigitaj regionoj emisiis sume pli ol du mil specojn de poŝtmarkoj. Tiam la kondiĉoj por presado de poŝtmarkoj estis tre malfacilaj. Oni uzis litografion, ksilografion kaj eĉ mimeografion, kaj la de-

segnoj estis simplaj, paperoj maldelikataj kaj koloroj monotonaj. Pro senĉesa militado nun konserviĝas nur malmultaj el tiuj poŝtmarkoj.

En la nova Ĉinio rapide progresas la poŝtaj aferoj. En mallonga tempo formiĝis poŝt-komunika reto tra la tuta lando kun la ĉefurbo Pekino kiel la centro. La Ĉina Poŝta-Telekomunika Ministerio monopole emisiis poŝtmarkojn. La poŝtmarkoj de Ĉinio havas 3 kategoriojn: ordinaraj, memorigaj kaj specialaj. Krome Ĉinio kelkfoje emisiis ankaŭ aerpoŝtajn, ŝuldo-pagajn kaj filantropiajn poŝtmarkojn. La memorigaj kaj specialaj poŝtmarkoj konsistigas naŭ dekonojn de la serioj de la emisiitaj ĉinaj poŝtmarkoj. La memorigaj poŝtmarkoj estis emisiitaj por memorigi gravajn politikajn eventojn, tagojn, historiajn personojn en kaj ekster la lando. La specialaj prezentas modernan kaj antikvan kulturojn, sciencojn, artojn, animalojn, vegetalojn kaj multajn aliajn temojn. Kun granda formato, gracia desegno

Miniatura folio emisiita en 1986 okaze de la Dua Kongreso de la Ĉina Filatela Federacio





Poŝtmarkoj emisiitaj de Ĉinio post 1949

kaj delikata presarto, la poŝtmarkoj prezentas specifan stilon kaj arton de la ĉina nacio.

Ekde la unua serio de memorigaj poŝtmarkoj emisiita en 1949, la ĉina poŝto alprenis novan matrikulan sistemon de la numero kaj emisia jaro de poŝtmarko. Eble tio estas specifa karakterizaĵo de la ĉinaj poŝtmarkoj. Sen legi poŝtmarkajn katalogojn filatelistoj povas informiĝi pri la emisia jaro, nombro de la pecoj de la serio kaj ĝia numero laŭ la indiko malsupre de poŝtmarko. Tio helpas precipe fremdlandajn filatelistojn facile informiĝi pri la ĉinaj poŝtmarkoj kaj ilin kolekti kaj ordigi.

La indikoj de la poŝtmarkoj emisiitaj en la periodo de 1949 ĝis marto 1967 estis ideogramoj 纪 signifanta "memorigan" kaj 特 "specialan". En tiu periodo oni emisiis sume 124 seriojn da poŝtmarkoj el 406 pecoj kun in-

diko 纪, kaj 75 seriojn da poŝtmarkoj el 444 pecoj kun indiko 特. De aprilo 1967 ĝis julio 1970 oni emisiis 19 seriojn da poŝtmarkoj el 80 pecoj sen indiko. Ekde aŭgusto 1970 la ĉinaj poŝtmarkoj ekhavis sur si sube maldekstre numeron kaj sube dekstre la emisian jaron. Ĝis oktobro 1973 oni emisiis sume 21 seriojn da poŝtmarkoj el 95 pecoj kun tia indiko. Ekde la fino de 1973 oni denove komencis presi sur la memorigaj poŝtmarkoj la literon "J" kaj sur la specialaj "T". Ĝis la fino de 1986 oni emisiis 134 seriojn da J-poŝtmarkoj kaj 113 seriojn da T-poŝtmarkoj. En la sama tago de la emisio de novaj poŝtmarkoj oni emisias ankaŭ unuataĝan koverton kun la novaj poŝtmarkoj kaj memoriga stampo. Krom tio, oni emisias ankaŭ miniaturan folion, kompletan folion, plurpecan serion, memorigan koverton, poŝtkarton k.c. ŝatatajn de filatelistoj. □



Sovetia danc-ensemblo en Pekino



La danco "Ni Estas Sovetianoj"

En la lasta aŭtuno la Virskia Stathonorita Akademia Danc-ensemblo de la Ukrajna Socialista Soveta Respubliko invitis turneis en Pekino.

La sovetiaj dancistoj prezentis belajn dancojn, kiel "Nia Hejmloko Ukraino" kaj "Malgranda Betularo", kiuj profunde impresis la pekinajn rigar-

dantojn. Dum sia restado en Pekino ili vizitis ĝiajn vidindejojn, kiuj donis al ili belan rememoron pri la longa historio kaj brila kulturo de Ĉinio. Krome, la sovetiaj dancistoj kaj iliaj ĉinaj kolegoj sin amuzis kaj interŝanĝis dane-arton kaj per tio profundigis la amikecon inter si.

Jang Ĉeng'u kaj aliaj ĉinaj gvidantoj kun sovetiaj dancistoj





Interŝanĝo de dancarto



En la Imperiestra Palaco de Pekino

Danco kun tintiloj



MULTESUKCESA UNESKO

Unesko fondiĝis la 4-an de novembro, 1946. Kion ĝi faris en la pasintaj kvardek jaroj? Kia estas ĝia nuna stato kaj perspektivo? Tio interesas multajn homojn en la mondo.

INTELEKTA SUPERECO

Per pliiĝo de eduka, scienca kaj kultura kunlaboro inter diversaj landoj kontribui al paco, sekureco, justeco kaj homa progreso estas nobla misio farita de la fondintoj de Unesko en la organiza principo. Por tio Unesko faris multajn internaciajn kunlaborojn en eduko, naturaj sciencoj, sociaj sciencoj, kulturo,

ĵurnalismo, eldonado kaj aliaj kampoj.

En la unuaj jaroj post sia fondiĝo, Unesko aktivadis ĉefe en Eŭropo kaj oferis servon al reprospiriĝo de eduko kaj kulturo en la postmilita Eŭropo. Ekde la mezo de la 50-aj jaroj, kiam Sovetunio kaj orienteŭropaj landoj membriĝis al ĝi, komenciĝis la kultura interŝanĝo inter landoj orientaj kaj okcidentaj. En la 60-aj jaroj multaj nove sendependiĝintaj landoj eniĝis en la organizon, kaj de tiam Unesko iris en novan historian periodon. Ĝia aktivado multe ŝanĝiĝis kaj havis novajn enhavojn fari klopodon kontraŭ analfabeteco,

rasismo, rasa apartigo k.a. En la 70-aj jaroj, laŭ la historia disvolviĝo la organizo aktive akcelis la disvolviĝon de evoluantaj landoj. Ĝi faris multajn laborojn por reformi neracian internacian ordon de ekonomio kaj disvolvi mondiskalan sciencon studon. Krome, ankaŭ la sinteno de Unesko al Esperanto estas laŭdinda. Lastjare ĝi faris decidon alvoki diverslandajn registarojn subteni la jubileon de la centjariĝo de Esperanto. Tio sendube estas kuraĝigo por esperantistoj.

Nun Unesko havas 158 membrolandojn kaj tenas kontaktigon kun pli ol 500 neregistraj internaciaj organizoj. Kial Unesko povas kontaktiĝi kun tiel multe da organizoj? Ĝia supereco ne estas en tio, ke ĝi donas subtenon monan kaj materian al siaj membrolandoj, sed en ĝia kapablo por intelekta kunlaboro. Oni diras, ke Unesko estas intelekta organizo. Tio estas vera. Ĝi havas superecon en intelekto. En ĝia ĝenerala oficejo en Parizo koncentriĝis multaj specialistoj de diversaj fakoj kaj ofte venis tien unuaklasaj erudiuloj de ĝiaj membrolandoj. Ĝi penas sekvi novajn sciencojn, studas pri la socia influo de progreso de sciencoj kaj tekniko kaj pri ties kontribuoj al la homa disvolvo, ekz. interregistraj planoj pri la scienca esploro pri oceanografio, hidrologio, komparo de geologio, homo kaj biosfero k.a. Ĝi donis grandan helpon al multaj landoj en makro-

En 1983 la ĝenerala direktoro de Unesko Amadon Mahtar Mbow (la dua en la maldekstra vico) triafoje vizitis Ĉinion. Jen li kaj la ĉina eduka ministro He Dongĉang en interparolado.



skop-disvolva strategio kaj konkretaj politikoj pri eduko, sciencoj kaj kulturo. Tial ĝi estas alte taksata de multaj membrolandoj.

Ĝiaj taskoj estas organizi registarajn kaj neregistarajn internaciajn konferencojn; okazigi simpoziojn, seminariojn kaj trejnajn kursojn; interŝanĝi fakulojn kaj informojn; konduki internacian movadon kontraŭ analfabeteco kaj por protekti historiajn objektojn.

NEEVITEBLA REFORMO

En la lastaj jaroj Unesko disvolviĝas ne glate. Kial?

Kompreneble, la mondo estas en tumulto. Tiu streĉa kaj komplika situacio nepre implikas specialajn organizojn de UN, inkl. de Unesko.

Estis evidenta ekzemplo, ke Usono kaj Britio sin eltiris el Unesko. Sendube tio estas ne utila al Usono kaj Britio mem kaj la malfacilo implikis ankaŭ Uneskon. Ekz. la kotizo pagita de Usono kaj Britio konsistigis 30% de la totala budĝeto de Unesko, tial Unesko devas kontraŭvole redukti parton de siaj planoj kaj kiel eble plej rapide ilin reformi.

Kompreneble, oni devas vidi, ke la bezono de la evoluantaj landoj multe ŝanĝiĝis en la 80-aj jaroj kompare kun tiu en la komencaj jaroj post la Dua Mondmilito. Kiel internacia organizo de multflanka kunlaboro, Unesko devas senĉese sin reformi por ludi pli grandan rolon. En la 124-a kunveno de la plenumkomitato majo de 1986 la ĉeestantoj plene konfirmis la reformon faritan de la ĝenerala direktoro s-ro Amadon Mahtar Mbow kaj la sekretariato kaj esperas, ke ili daŭrigos la reformon.

Nun en la mondo estas iuj, kiuj dubas, kritikis kaj eĉ neas



En 1979 la ses-jara ĉina knabo Hu Sjaŭĝoŭ ricevis premion "2000-jara Scienco kaj Tekniko" en la konkurso de geknabaj pentraĵoj okazigita de Unesko. Jen la ĝenerala direktoro de Unesko Amadon Mahtar Mbow (maldekstre) kaj Hu Sjaŭĝoŭ.

la multflankan kunlaboron. Tamen la internacia multflanka kunlaboro estas necesa por protekti pacon kaj akceli disvolviĝon, ĝi estas konforma al la intereso de ĉiuj landoj. La multflanka kaj duflanka kunlaboro kompletigas unu la alian. La duflanka kunlaboro ne povas anstataŭi la multflankan. Kiu povas anstataŭi Uneskon — internacian organizon kun apartaj trajtoj? Tia organizo ne ekzistas nek povos naskiĝi. Protekti kaj senĉese plifortigi la multflankan kunlaboron estas komuna deziro de la tutmondaj popoloj kaj ankaŭ komuna devo de ĉiuj landoj. Se ĉiuj membrolandoj harmonie kaj unuanime kunlaboros sincere, Unesko certe venkos malfacilojn survoje de sia disvolviĝo kaj havos prosperan estonton.

ĈINIO KAJ UNESKO

Ĉinio estas unu el la 44 iniciatintoj de Unesko. En oktobro de 1971 Unesko restarigis legitiman lokon de Ĉinio. Marte de 1974 Ĉinio unuafoje sendis sian konstantan delegacion al Unesko. Kiam la ĝenerala direktoro de Unesko s-ro Amadon Mahtar Mbow vizitis Ĉinion en 1978, li subskribis kunlaboran memorandon inter Ĉinio kaj Unesko. En februaro de 1979 la Ĉina Nacia Komitato de Unesko fondiĝis, kio markas, ke la kunlaboro inter Ĉinio kaj Unesko iris en novan periodon.

En la pasintaj jaroj Ĉinio aktive partoprenis decidanta laboron pri gravaj problemoj kaj internaciajn kunlaborojn, ekz. sendi specialistojn kaj erudiciulojn
(Daŭrigo sur p. 37)

PENSU K RESPONDU

(1) Kiu la unua atingos la finon?

Okazos 10-metra vetkuro inter homo, ĉevalo kaj aŭto. Pensu: kiu la unua atingos la finon?

(2) Kion li diris?

En la antikva Grekio estis reĝo, kiu decidis mortigi grupon da malliberuloj. Tiam oni ekzekutis ofte per senkapigo kaj pendumo. Kiamaniere plenumi la ekzekuton al tiuj malliberuloj? La reĝo decidis permesi al la malliberuloj memelekti metodon por sia mortigo. Li do deklaris, ke ĉiu malliberulo povos laŭvole diri po unu frazon, kies verecon oni povos tuj pruvi. Tiu, kiu diros la veron, estos pendumita kaj tiu, kiu diros la malveron, estos senkapigita. Rezulte, multaj vero-dirintoj estis pendumitaj kaj malvero-dirintoj senkapigitaj, kaj ankaŭ tiuj kiuj nenion diris estis pendumitaj kiel la vero-dirintoj.

Kamparanoj observas la okgamban porkidino.



Inter ili, unu tre saĝa malliberulo eldiris frazon, kiu embarasis la reĝon. La reĝo povis nek pendumi nek senkapigi lin, male.

nur devigite liberigis lin.

Do kion la saĝa malliberulo diris?

HUMURAĴO

Iu junulo pretendis sin bela, kiam li havigis al si barbon imitante rolon en iu filmo. Por serĉi ŝancon trovi al si fianĉinon, li foje memvole riparigis biciklon por iu nekonata junulino sur strato. Je adiaŭo, la junulo demandis: "Permesu al mi demandi, kian impreson vi havas pri mi?" La knabino respondis: "Laŭdirinde, tiel maljuna vi tamen faras bonon sur strato!"



ENIGMOJ

(1) Navedo pinta ĉe ambaŭ ekstremoj, facile naĝadis en ondo.

(Animalo)

(2) Sur liano elkreskas kristala melono.

Ĝi ekbrile floras ĉe noktiĝo.

La ora floro estas tiel granda, ke la tutan ĉambron ĝi plenas.

(Objekto ĉiutage uzata)
(Solvaj troveblaj en ĉi numero)

OKGAMBA PORKIDINO

(Kurioza informo)

Antaŭ nelonge nigra porkino bredita de kamparano de Fuĝjan-provinco de Ĉinio naskis 6 porkidojn. Unu el ili, insekse, kun haroj samkoloraj kiel tiuj de sia patro, havas ok gambojn, kaj altiras multajn vizitantojn per sia rara variigo.


La interesa porkidino estas vigla, manĝema, bonapetita kaj sana. Ĝi estas 2 kilogramojn pli peza ol la aliaj 5 porkidoj. Or opinias, ke tiu rara variigo liveras objektan atestilon por la esplorado pri reproduktiĝo kaj variigo, kaj estas esplorinda. Kiam la porkidino estis trimonata, la Televido de Fuĝjan filmis ĝin. □

BONFARO


(FABLO)




1. Osto blokas la gorĝon de lupo.




2. La lupo sin turnas al gruo-kuracisto.




3. La gruo-kuracisto akceptas la lupon.




4. La gruo-kuracisto elprenas la oston per la beko.



5. Anstataŭ danki la gruo-kuraciston, la lupo diras: "Mi jam bonfaris al vi per tio, ke mi lasis vin retiri vian kapon senvunda."



6. Post kelkaj tagoj la lupo denove suferas de ostoblokado ĉe la gorĝo kaj krias de dolorego.



7. La lupo denove petas helpon de la gruo-kuracisto. Ĉi tiu diras: "Dankon, ĉifoje mi ne bezonas vian bonfaron."



8. Pro la doloro la lupo nenion povas manĝi kaj fine mortas de malsato.

KORESPONDI DEZIRAS

- * 40-j Lucjan Lopucki dez. kor. kun ĉiu-aĝaj e-istoj tm. interŝ. pri E-libroj, pm. bk. ktp. Adr.: 20-007 Lublin, ul Pstrowskiego 4/6, Pollando.
- * 33-j oficistino kolektas bk, kalendarojn, interesiĝas pri ĉ.t. Adr.: Veselka Dimitrova, "IV. Nenov" 14ap. 11, 3000-Vraca, Bulgario.
- * Fenyvesi Mihaly dez. kor. t.m. Adr.: 7623 Pecs, Kolozsvari u. 12, Hungario.
- * 22-j junulo dez. kor. kun gejunuloj t.m, pri diversaj junularaj problemoj. F-lo Sabin-Dorel Ŝuler, str. Karl Marx Nr. 18, Ap. 2; Ro. 3400 Cluj-Napoca, Rumanio.
- * Amafora Pajaco kaj Jonglulo dez. kor. kun t.m. pajacoj/jongluloj pri komunaj travivaĵoj. S-ro Chao Hensley, P.O. Box 1327, Redlanos California 92373, Usono.
- * Angla ceramikistino maljuna eklernis Esperanton antaŭ 9 monatoj, dez. kor. kun gekorespondamikoj el aliaj landoj. Intereso: ĉiaj artoj kaj metioj, floroj, birdoj, bestoj, ankaŭ vegetara kuirado. Bonvolu skribi al: Dorothy Charwood, 85 Three Bridges Road, Crawley, Sussex RH10-IJR, Anglio.
- * Jaegy Joseph serĉas katalogon kaj modelon pri ĉinstila pentrarto sur silko. Kompense sendos pm. aŭ ilustritajn pk. Adr.: 28, Rue Lina, 94260 Fresnes, Francio.

KOREKTO

Anstataŭ "Naboj" legu "Baboj" en la 1-a kolumno, 3-a strofo, 2-a linio, p. 48, 12-a numero, 1986.

Same en la 1-a linio de la dua piednoto.

STABILE KRESKAS INDUSTRIO DE ĈINIO

De januaro ĝis novembro 1986 la totala industria produktovaloro de Ĉinio atingis 812.6 miliardojn da ĵuanoj, je 8.4% pli multe ol tiu en la sama periodo de 1985.

En la pasintaj 11 monatoj la produktovaloro de la malpeza industrio de Ĉinio kreskis pli rapide ol tiu de la peza industrio. Kompare rapide kreskis energio kaj krudmaterialoj urĝe bezonataj de produktado, konstruado kaj popola vivo. Rapide kreskis ankaŭ produktado de facile vendeblaj varoj. El la 100 specoj de ĉefaj industriaj produktajoj antaŭtempe plenumiĝis la jarplanoj de produktado de 40 specoj, kiaj prilaborita oleo, benzino, giso, bicikloj, koloraj televidiloj, silko, ŝtofo kaj biero. Plenumiĝis aŭ superplenumiĝis la jarplanoj de produktado de elektro, nafto, lavita karbo, ŝtalaĵoj, cemento, fridujoj, papero, kartono k.a. Ne bone statis la produktado de

aŭtoj kaj traktoroj malfacile vendeblaj.

NOVAJ ĈINAJ LEĜOJ APROBITAJ

Decembre de 1986, la 18-a Sesio de la Konstanta Komitato de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko aprobis la Leĝon de Bankroto de Entrepreno de ĈPR (Provaĵo), la Leĝon de Landlima Kvaranteno de ĈPR, la Leĝon de Poŝto de ĈPR kaj aliajn koncernajn decidojn.

ĈINAJ AKROBATOJ EN MONDA KONKURSO

Ĉinaj akrobatoj estis premiitaj per 22 el la 25 oraj medaloj en la 11-a Monda Akrobata Ĉampioneca Konkurso okazigita en Londono antaŭ nelonge kaj tiel gajnis la teaman ĉampionecon.

Dekoj da akrobatoj el 7 landoj partoprenis la konkurson. La ĉinaj akrobatoj prezentis diabolludon,

ekvilibron sur sinsekvo da seĝoj kaj piedludon de benko.

ĈINAJ SCIENCISTOJ MEMBRIĜIS AL LA INTERNACIA ASTRONAŬTIKA AKADEMIO

En la 26-a jarkunveno de la Internacia Astronaŭtika Akademio okazinta antaŭ nelonge ĉinaj specialistoj Tu Ŝou'e, Hŭang Ŭejlu, Ĉen Ŝin, He Ĉjiĝi kaj Ĝuang Hongĉun estis elektitaj kiel membroj aŭ korespondaj membroj de la akademio.

Nun inter la membroj kaj korespondaj membroj de la akademio estas 17 ĉinoj.

ARTEFARITA SANGO SUKCESE FARITA EN ĈINIO

La Tria Medicina Universitato de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj la Organika-kemia Instituto sub la Ŝanhaja Filio de la Ĉina Akademio de Sciencoj kune provfaris artefaritan sangan, la unuan en Ĉinio. Oni uzis ĝin por 377 malsanuloj kaj la kuracefiko atingis la internacian nivelon. La frukto estis ekspertizita de profesoroj kaj aliaj fakuloj de 32 organizoj, inkluzive la Ĉinan Medicinan Akademion.

PEKIN-ĈINHŬANGDAŬ-A ELEKTRA FERVOJO AKCEPTITA DE LA ŜTATO

La dutraka elektra fervojo inter Pekino kaj Ĉinhŭangdaŭ antaŭ nelonge estis akceptita de la ŝtato. Por tiu 281-kilometra fervojo la ŝtato investis ĉ. 2 miliardojn da ĵuanoj. La fervojo estas destinita ĉefe por transporti eksportotan karbon el Ŝanŝji-provinco, la plej granda karbobazo de Ĉinio. En la venontaj jaroj ĝia jara transportokvanto atingos unue 43 milionojn

En laborejo de Hongĝuang-trikejo en Uhu, Anhuj-provinco



da tunoj kaj poste 87 milionojn da tunoj.

KOLEKTIVAJ BANKOJ EN KANTONO

La unuaj 4 kolektivaj bankoj antaŭ nelonge ekfunkciis en kreditaj kooperativoj de Kantono, kio rompis la ŝtatan monopolon super la financoj.

La kreditaj kooperativoj estas starigitaj per investado de loĝkvartaloj. Nun ili estas akciaj, ĉiu kun kapitalo de pli ol 100 000 jŭanoj. Ili memstaras en entreprenado kaj saldado, mem respondecas pri profito kaj malprofito kaj praktikas demokratian administradon. Ili estas ekonomiaj entoj de leĝa persono. Tie la interezo por deponanto estas kalkulata laŭ la normoj difinitaj de la ŝtato, dum la procentaĵo de interezo de pruntedono de mono varias certgrade.


NOVAJ ATINGOJ EN KURACADO DE MIKROĈELA PULMA KANCERO

Kiel pulma tumor, mikroĉela pulma kancero plej rapide kreskas. Ĝi estas la plej maligna kaj plej facile disvastiĝema el la diversaj pulmaj kanceraj. Ĝi estas malsano tutkorpa kaj sistema. Antaŭe oni ĉiam opiniis, ke operacio estas ne taŭga por kuraci ĝin, kaj ĝenerale malpli ol 5% de la operaciitoj povis plu vivi 5 jarojn.

La Ŝanhaja Toraka Hospitalo ekde 1980 kuracis 80 malsanulojn suferantajn mikroĉelan pulman kanceron per kemiterapio, operacio kaj refoja kemiterapio aŭ kemiterapio post operacio. Dank' al tio 37.5% de la kuracitoj plu vivis 5 jarojn.

ĈINIO REDUKTIS SIAN NACIDEFENDAN ELSPEZON

Ĉinio decidis laŭeble redukti sian nacidefendan budĝeton kaj aplikis serion da malmalaj rimedoj, inkl. de malmobilizo de miliono da oficiroj kaj soldatoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. La proporcio de la totala budĝeto por la nacidefendo en la nacia budĝe-



Ĉinaj akrobatoj sur sinsekvo da seĝoj

to de Ĉinio malleviĝis de 17.5% en 1979 al 10.5% en 1985.

SOVAĜAJ BESTOJ EN LA DEZERTO TAKLIMAKAN

Taklimakan, la plej granda dezerto en Ĉinio situas en la Ŝinĝang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono.

Ĝi estis ĉiam rigardata kiel regiono sen bestoj. Antaŭ nelonge ĉinaj geologoj trovis sovaĝajn kameleojn, gazelojn, cignojn, strigojn kaj leporojn en la mezo de la regiono. Tie mankas akvo, maldensas vegetaĵoj. Per kio la bestoj sin vivtenas, tio restas enigmo.



Ĉina vicĉefministro Li Peng tondas rubandon por la Sovetunia Industri-komerca Ekspozicio.

ĜEMELOJ NASKIĜIS PER ARTEFARITA FEKUNDIGO

La Ĝuangdong-a Ginekologia-pediatria Hospitalo faris artefaritan fekundigon al virino nenaskipova, ke ŝi gravediĝis je du fetoj. Post naŭ monatoj ŝi naskis du virseksajn bebojn, kiuj estas la unuaj ĝemeloj naskitaj per artefarita fekundigo en Ĉinio. La unua bebo pezis 2.95 kg. kaj la dua 3.2 kg. Nun ili kreskas normale.

PROVTUBAJ BESTOJ NASKITAJ

Naskiĝis 5 kuniklidoj, la unuaj provtubaj bestoj de Ĉinio. Tio estas grava frukto en studo de eksterkorpa fekundigo de bestoj far embriologoj de la Agronomia Akademio de Ĝjangsu-provinco de Ĉinio kaj du usonaj profesoroj. La studo montris, ke el netraktita ovario oni povas ricevi 11.2 ovojn. Tio prezentis vastan perspektivon en utiligo de ovario de buĉitaj bestoj por akiri grandan kvanton da embrioj.

FRATINIĜIS TRI FRATOJ

En la Centra Ginekologia-obstetrika Hospitalo de Tjanĝin tri fratinoj de sama familio fariĝis fratinoj.

Ili estis pseŭdohermafrodita anormaliuloj. Antaŭ la operacio ili estis atribuitaj al vira sekso, tamen suferis denaskan sindromon de surrenaj glandoj. La hospitalo faris al ili vulvoformigan operacion kaj aplikis al ili hormonoterapion. Nun du el ili havas menstruan.

PROGRESAS LA ĈINA-SOVIETUNIA KOMERCO

En 1986 Ĉinio kaj Sovetunio okazigis grandajn industri-komercajn ekspoziciojn en Moskvo kaj Pekino. En la lastaj tri jaroj la ekonomiaj rilatoj inter la du landoj disvolviĝis rapide. Laŭ la interkonsento farita de la du registaroj en 1985, Sovetunio jam komencis reformi 17 industriajn entreprenojn konstruitajn en la 50-aj jaroj en Ĉinio kun helpo de So-

vetunio. En 1986 la totala komerca sumo de la du landoj estis iom malpli ol 2 miliardoj da rubloj. La Sovetunia Industri-komerca Ekspozicio okazigita de la Sovetunia Industri-komerca Federacio decembre de 1986, en la Internacia Ekspozicita Centro, Pekino, estis la unua kaj plej granda ekspozicio, kiun Sovetunio okazigis en Ĉinio en la pasintaj 30 jaroj. La eksponejo kovris 4 600 kvadratajn metrojn, kun pli ol 500 grandaj ekspoziciaj kaj multaj presaĵoj, modeloj kaj popolaj metiartaĵoj.

LA PLEJ GRANDA ĈINA MAGAZENO EN EŬROPO

Antaŭ nelonge en Parizo inaŭguriĝis ĉina komerca domo kun plank-areo de 5 000 kvadrataj metroj. Ĝi vendas diversajn ĉinajn manĝaĵojn, ĉiutagajn bezonaĵojn, ŝtofojn, vestojn, metiartaĵojn, librojn k.a. Krome, tie estas ankaŭ ĉinaj restoracioj, ekspoziciaj salonoj kaj salonoj por negoca traktado. □

Mirindaĵoj ĉe la fonto de Jangzi-rivero

Teksto de ĈIU HŬANŜING Fotoj de ĴU SUJĈU

La fonta regiono de Jangzi-rivero, kvankam senhoma, absolute ne estas dezerta kaj certe ne "tabua por kreskaĵoj", kiel asertis iuj eksterlandaj esploristoj. Ni vidis tie mirindajn pejzaĝojn kaj kuriozajn sovaĝajn bestojn malfacile videblajn en la landinterno.

BELAJ FLOROJ SUB LA NEĜLINIO

Por esplori la fonton de Buĉju (Buĉju signifas serpentforman riveron en la tibeta lingvo) ni trapasis danĝeran vojon. Kiam nia aŭto rampis sur kruta deklivo, nin minacis eventuala aŭtrenversigo. Trapasante rojon, eĉ pro eta malatento nia aŭto povus enŝlimiĝi. Veturante sur seka

strando kovrita per gruzoj grandaj kaj malgrandaj, la aŭto balanciĝis ebrie.

Kiam ni trapasis danĝeran deklivon, tuj frapis niajn okulojn neatendita pejzaĝo: konkuras inter si pri beleco verdaj herboj, aromaj floroj kaj diverskoloraj ŝtonetoj sur la subneĝlinia monto.

Ni eĉ ne povis kredi, ke troviĝas tiel bela loko apud la glaci-rivero, ĉe pasejo de Tanggula-montaro 5 400 metrojn super la marnivelo. Ĉie tie blindige pompas floroj ruĝaj, purpuraj, ore flavaj, neĝblankaj, verdetaĵaj kaj bluaj. Iu kolego, kiu bone scias pri altebenaĵaj plantoj, sciigis al ni iliajn nomojn.

La lokaj plantoj havas tri karakterizaĵojn. Unue, ili estas malaltaj kaj malgrandaj, kusenformaj aŭ rampantaj surtere por rezisti al ŝtormo; due iliaj trunketoj kaj folioj estas plene kovritaj per lanugo kaj maldikaj dornoj por redukti akvovaporiĝon kaj rezisti al frostoj kaj sekeco; kaj trie, la floroj estas ekstreme helkoloraj pro sufiĉa sunbrilo kaj intensaj ultraviolaj radioj de la altebenaĵo.


La plej okulfrapa el la abundaj floroj estas neĝlotuso. Ĝiaj verdaj trunketoj kaj folioj kaj floroj dense kovriĝas per blanka lanugo, kun grupiĝintaj stamenoj kvazaŭ malgrandaj sunfloroj.

Neĝlotuso estas konata kiel "altebenaĵa florreĝo". Ĝi ne falas pro vento, ne rompiĝas de hajlo, ne mortas en frostoj kaj ne velkas sub la arda suno. Sur ŝtorma altebenaĵo ĝi staras kun profundaj radikoj kaj prosperaj folioj. Ĝi estas valora drogo por kuraci artriton, hipertension kaj virinajn malsanojn.

BLUA MOREN-LAGO

Trapasinte herbaron kaj grim-pinte sur naturan ŝtonan baraĵon ĉe pasejo, ni vidis bluan moren-lagon nomatan Ĉiela Lago.

La Ĉiela Lago ĉ. 140 m. longa de norde suden kaj 100 m. larĝa de okcidente orienten estas ĉir-



kaŭita triflanke de glaĉero kaj neĝkovrita monto. La glaĉero finiĝas per la lago, kvazaŭ oblikve tranĉita de giganta kristala jada ekrano. Kunfluiĝinta degelinta glaciakvo torente enfalas en la Ĉielan Lagon, formante akvofalon 20 metrojn altan.

Ĉirkaŭirinte laŭ la lagbordo, ni venis al la akvofalo. Super ni prezentiĝis kvazaŭ perla kurteno aŭ blanka silkaĵo, kiu falis kaj disĝis en akverojn.

Malsupre, la ombra parto de la lago havas kristalan glacian surfacon, dume en la suna parto de la lago ondetas blua kaj klara akvo. En ĝi speguliĝas lazura ĉielo kaj blankaj nuboj, impona neĝkovrita monto kaj kristala glaĉero.

La Ĉiela Lago formiĝis pro glaĉero. Malrapide malsupren moviĝanta glaĉero per sia giganta forto antaŭenpuŝis rokojn kaj ŝtonojn de monto kaj valo kaj post la lasta glacia periodo de la kvaternaro, kiam la klimato varmiĝis kaj la degelinta glaĉero retiriĝis, la rokoj kaj ŝtonoj tie

amasiĝis kiel arkforma ŝtona baraĵo, kiu baris la degelintan glaciakvon kaj formis la morenlagon.

Malgranda fluo tranĉis la ŝtonan baraĵon en du partojn, ebligante al la akvo de degelinta glacio elflui. La fluo estas tiel mallarĝa, ke oni povas facile ĝin transsalti. Ĝi ja estas la fonto de Buĉju, unu el la kvar gravaj riveroj de la supra parto de Jangzi.

Sude de la moren-lago ni trovis multe da brilkoloraj rokoj, skarlatataj, smeraldaj, nigraj, ore flavaj kaj kristalaj, grandaj kiel bovo kaj malgrandaj kiel fabo. Estante tie, ni sentas nin kvazaŭ en gema mondo. Ekzameninte la specimenojn de ercoj alportitajn de tie, koncerna departemento trovis altgradajn kalkopiriton, magnetiton, piriton kaj kupran kaj kristalan mineralojn.

TERMOFONTARO SUR ALTEBENAĴO

Je 70 kilometroj for de la pasejo de Tanggula-montaro tro-

viĝas amaso da termofontoj, kaj pro tio la loko ricevis la nomon Ŭenĉjŭan (Termofonto). Sur la frosta altebenaĵo ĝi estas tre altira, kaj ni decidis ĝin viziti.

Rigardate de malproksime okra teraso jen aperis, jen sin kaŝis post nebulon. Ascendinte la terason, ni vidis, ke el dekoj da vaporantaj fontoj, kvazaŭ bolanta akvo, fluas de la teraso en zigzagan rivereton, poste en Buĉju, kaj fine en Jangzi. La termofontaro 4 900 metrojn super la mar-nivelo eble estas la plej alta en la mondo.

La teraso kun alteco de pli ol 50 metroj, longeco de 30 m. kaj larĝeco de ĉ. 12 m. formiĝis jaron post jaro el sedimentoj de kalcio, natrio, kalio, magnezio, sulfuro kaj aliaj solveblaj elementoj. De supre ĝis malsupre ĝi surhavas belkolorajn ŝtuparkaj ondoformajn vejnojn. Kaj pro tio ĝi ricevis la nomon Ĉjŭanhŭa signifantan fontofloron, kiu estas tre versimila.

Norde de Ĉjŭanhŭa ondas serpentanta monteto proksimume 100 m. longa kaj 3 m. alta, kun multaj fendegoj, el kiuj elfluas fontakvo. Rigardate de malproksime, ĝi aspektas kiel ora drako kuŝanta sur verda herbejo.

Tiea termofonta akvo kun sulfuro kaj aliaj mineraloj kaj kun temperaturo de 50°-60°C efikas por kuraci haŭtan malsanon kaj artriton. Ni ĉiuj kaŭre lavis al ni la vizaĝon kaj manojn per mantuko por forviŝi la laciĝon de longa vojaĝo.


Estas interese, ke ĉe la pasejo de Tanggula-montaro estas termofonto kun tre malgranda aper-turo kaj granda interna diametro. Tagmeze en sunradioj brilas en ĝi riĉaj koloroj. Kia mirindaĵo! Ĝi estas admirata kiel "bunta fonto".

Termofontaro kaj Ĉjŭanhŭa-teraso





Altebenaĵa planto



Nigrakola gruo

En la lastaj jaroj ĉinaj sciencistoj faris multajn esplorojn sur la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo. Ili konstatis, ke la loko havas abundajn riĉajn termofontojn. Estas tre malofte videblaj tiel multaj termofontaj manifestiĝoj kaj intensaj aktivadoj. Antaŭ kelkaj jaroj la Tibeta Aŭtonoma Regiono konstruis en Jangbaĝjan tervarman elektrejon, kio prezentis vastan perspektivon por utiligo de tervarmo.

Tervarma aktivado liveris scian bazon por esplori la kialon de la leviĝo de la altebenaĵo. Oni povas konkludi el tieaj elĉerpitaj fontoj, ke nun ankoraŭ daŭras movado de tiuj ĵurasaj stratumoj, kies aktivada tendenco estas: iom post iom leviĝas la suda Tanggula-montaro kaj iom post iom malleviĝas la norda Kekeŝjili-baseno.

Neniu montokonstrua movado sur nia tero estas menciinda,

krom tiu de la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo. Sciencistoj trovis tie multe da fosilioj de trilobitoj, naŭtiloj, iĥtiosaŭroj, koraloj kaj aliaj maraj vivaĵoj, kiuj atestis, ke tiu loko travivis transformiĝon. Sciu, la nuna "Monda Tegmento" ja estis senlima maro antaŭ kelkcent milionoj da jaroj.

RAKONTO PRI ĈJŬEMO-LAGO

La nomita lago kun areo de 95 kvadrataj kilometroj estas bela landinterna lago. En senventa tago la lago, blua kaj klara kiel spegulo, ridas al la blua ĉielo, blankaj nuboj kaj montaroj. Kiam ventego levas altajn ondojn frapantajn bordojn, oni sentas sin kvazaŭ ĉe maro.

Kiel neatenditaj gastoj, ni surprizis akvajn birdojn ripozantajn ĉe la lago. Nigrakolaj gruoj kaj blankaj cignoj svingantaj siajn

flugilojn malaperis de super la vasta lago. Tiuj migrantaj birdoj forflugas vintre kaj alvenas somere.

Dum nia mallonga ripozo tibeta paŝtisto rakontis al ni legendon pri la lago.

Antaŭ tre tre longa tempo tie ne estis Ĉjŭemo-lago, nek la neĝkovrita monto Geladandong, fonto de Jangzi. Tiam iu paŝtista mastro posedis tiun vastan stepon kaj sennombrajn bovojn, ŝafojn kaj sklavojn.

Estis sklavino nomata Ĉjŭemo, kiu ĉiutage paŝtis bovojn kaj ŝafojn, tordis bovharajn ŝnurojn kaj melkis bovinon por la mastro. Sed la mizeraj tagoj ne perdigis al ŝi revon pri la vivo, ĉar en ŝia koro jam ĝermis amo al la laboremata paŝtisto Geladandong.

Foje, informiĝinte pri ilia rendevuo, la mastro eksplodis de ko-



Blanklipa cervo

lero kriante: "Aĥ! Tuj kaptu ilin!"

Geladandong faligis lakeojn de la mastro per pugnobatoj, saltis sur ĉevalon kaj forrajdis. Kiam li venis al monteto, lian koron trafis venena sago. Sed li ne falis, li ankoraŭ rajdis surĉevale, kiel brava heroo. Subite li altiĝis, altiĝis... kaj fine fariĝis alta neĝkovrita monto.

La mastro flamiĝis kaj ordonis bategi Ĉjüemo. Iun profundan nokton ŝi eskapis el la karcerero. Kun glavo en la mano ŝi rajdis al la mastro por sin venĝi. La mastro vekigis de surprizo. Li kaj liaj lakeoj sin ĵetis al ŝi kiel furiozaj lupoj. Ili postkuris ŝin. Apenaŭ ili kuratingis ŝin, subite enkavigis tero kun bruego kaj elfluis akvo. Tiel estiĝis lago. Kaj la kruela mastro kaj liaj lakeoj ĉiuj dronis en la lago.

Poste oni nomis la neĝkovritan monton Geladandong kaj la lagon Ĉjüemo memore al la necesdemaj geamantoj.

Kompreneble tio nur estas legendo. Nun oni bone scias, ke

ĉio ĉi estas kaŭzita de la montokonstrua aktivado dum kelkcent milionoj da jaroj. Ĉjüemo-lago estis formita pro faŭlto. Nun Tanggula-montaro ankoraŭ laviĝas iom post iom. Tamen per tiu legendo la tibeta popolo esprimas sian amon al la montoj kaj riveroj de sia naskiĝloko.

NATURA ZOOLOGIA ĜARDENO

Antaŭ longe ni aŭdis, ke la altebenaĵo estas natura zoologia ĝardeno. Vere la famo ne trompas. Survoje ni jam renkontis spritajn tibetajn antilopojn, amindajn blanklipajn cervojn, rapidkurajn gazelojn, ruzajn leporojn, kruelajn grizajn lupojn, grasajn marmotojn kaj lertajn linkojn. Ni informiĝis, ke tie vivas ankaŭ furiozaj brunaj ursoj kaj gruntbovoj, neĝleopardoj kaj aliaj.

Tie estas multaj bestoj de diversaj specoj. Iun vesperon ni vidis gregon kaj gregon da gazeloj trinkantaj ĉe rivero. En seksarda periodo kolektiĝas centoj da gruntbovoj sur stepo de profunda monto. Vintre sur la stepo kiangoj iras en longa vico, sekvante sian gvidanton, kiel marŝanta kavalerio. Centoj da kiangoj iras en vico kaj povas elpremi hufe vojon meze de stepo.

La sovaĝaj bestoj sur la altebenaĵo havas interesan vivmanieron. Kiango estas bona vojevdisto. Oni ne falos en marĉon, se oni sekvas ĝiajn spurojn. Neĝleopardo havas interesan metodon kapti predon. Ĝi sin kaŝas en monto tiel ke ĝin tute ne rimarkas gazelo herbon voranta. Tuj kiam la lasta proksimiĝas, la naĝleopardo rapide sin ĵetas sur ĝin kaj mordas ĝin por sin satigi.

Tiuj sovaĝaj bestoj estas ankaŭ gravaj ekonomiaj riĉfontoj.


Marmoto, linko kaj leporo kun densa lanugo kaj longa hararo liveras bonkvalitajn felojn. Vianĉoj de gazelo, gruntbovo kaj kiango estas bongustaj, krome iliaj feloj estas materialo por fari ledon. Kornoj de tibeta antilopo, galveziko de bruna urso kaj junaj kornoj de blanklipa cervo estas valoraj drogoj.

Por protekti riĉfontojn de sovaĝaj bestoj, la ŝtato kondiĉis, ke estas malpermesite ĉasi la bestojn, escepte de gazelo, leporo kaj marmoto.

Tieaj bestoj plejparte ne timas homojn ŝajne pro tio, ke ili neniam renkontis homojn aŭ neniam estis vunditaj de ili. Post kiam ni starigis tendon ĉe la fonto, tibetaj antilopoj kaj kiangoj venis "viziti" nin. Kontraŭ tiuj amikaj "gastigantoj" ni tuj levis fotilon anstataŭ fusilon.

Ĉasado ne estas facila sur la altebenaĵo. Iun frumatenton la ŝoforo ĉasis gazelon sur la kontraŭa bordo. Li vokis nin helpi lin, ĉar li sola ne povis ĝin levi. Ĝuste kiam ni nin klinis por levi ĝin, neatendite ĝi eksaltis kaj forkuris. Post nelonga kuro ĝi refalis. Kiam ni anhelante atingis ĝin, ni apenaŭ povis stari pro morta laco. Ni povis nur sidiĝi apud la besto por iom ripozi. Aĥ, neniue atendis, ke ĝi leviĝis baraktante kaj ekkuris denove. La ŝoforo do levis fusilon. Du pafoj trafis ĝin kaj ĝi falis kaj senmoviĝis.

En la riveroj kaj lagoj de tiu regiono abundas malvarmakvaj fiŝoj kun maldikaj skvamoj. Tie oni hokas fiŝojn sen logaĵo. Ni povis facile hoki fiŝojn per ŝnuro ligita kun kurbigita pinglo aŭ tufo da ŝafharo. Eĉ tiuj, kiuj suferas de altmonta reakcio, havas apetiton vidinte la bongustan fiŝsupon. □



Altebenaĵaj vegetaloj kreskantaj apud glaciriveroj kaj lagoj



Blanklipaj cervoj



Linkoj




Ĉe la riverfonto

Foto de **ĈU SIMING**





*Altebenajaj vegetaloj kreskantaj
apud glaciriveroj kaj lagoj*
Foto de **ŜEN JANTAJ**





Makulkapaj sovaĝanseroj